

Julio
BAGHY



SONGÈ
SUB POMARBO

S T A F E T O

JULIO BAGHY

Neniu el la esperanto-verkistoj estas tiomgrade esperantisto, neniu el ili vivas tiom en la esperanto-vivo, neniu sentas tiom da respondeco por la kultura progreso de la movado, kiel JULIO BAGHY. Elstarajn verkistojn ni havas, sed tiel ekskluzive esperantistan kiel BAGHY ni havas nur unu antaŭ li: D-ron Zamenhof. Tio ne estas nur frazo; pripensu nur, ĉu iu el la direktantoj de nia esperantista vivo havis tiel ampleksan laborkampon, kiel BAGHY, kiu estas vigla propagandisto, organizanto, instruisto kaj eminenta verkisto, iaspaca konscienco de nia movado, kiu ankoraŭ nun senerare sentas, kio mankas. Tion oni povas sperti, kiam temas pri la literaturo mem; BAGHY angore sekvas la vojon de la literaturo kaj krom la verkado li observas la tutan kampon reagante pri ĉiu signo, pri ĉiu manko kaj ekagante tuj por doni impulson. Dum nia tempo BAGHY ĉiuklopede donas sin al la dramverkado, ne nur, ĉar lia talento estas destinita al la dramverkado, sed ĉar li sentas, ke ni bezonas urĝe prizorgi, ke la dramo, kiel artospeco, aperu kvante kaj kvalite egale al la aliaj, pli frue evoluintaj literaturaj grupoj. Tiuj ĉi malmultaj vortoj ne permesas paroli pri la gravo de la dramo en la esperanta vivo, pri la specialaj postuloj de la esperanta dramo, sed mem la aludo nepre vekas la pensojn, kaj neniu konscias pli bone pri la bezono kaj la specialaj postuloj de la *kamerodramo* de la esperanta literaturo, prezentebila sen eksteraj pretendoj, sed provizita per grandpretenda literatura valoro, ol JULIO BAGHY.

JULIO BAGHY (nask. 13. jan. 1891) laŭ la matrikulo ne estas junulo, sed li apartenas al la raraj homoj, kiu konservas sian plej flaman junecon, kaj la sama BAGHY, kiu iam en la rusa kaptiteco trovis vojon al la esperanto-poezio, trovis novan signifon al la vorto, bildoj kaj rimo, kiu kreis vastskalajn novelojn, romanojn de pasia, sentema animo, de kiu oni atendis multe kaj neniam oni trompiĝis en tiu atendo, estas ankoraŭ la sama, verva artisto, la sama spitanto de ĉiuj danĝeroj kaj la sama surpriza talento, kiu ne ripozas sur la molaj kusenoj de la jam akirita famo, sed estas preta por novaj penoj kaj sinturmentoj, ĉar lia principo koincidas kun tiu de Ibsen: *La verkado estas sinjuĝo*.

En 1922 lia unua poemaro, *Preter la vivo*, eksonis per tembroj de individua voĉo, kun arda sincero, spontana sprito, elasta formvario. La dua poemaro, *Pilgrimo* (1926), atestis la maturiĝon de potenca poeta talento. Samjare aperis la

romano *Viktimoj*, kiu, kun sia daŭrigo *Sur sanga tero*, staras en la unua vico de nia originala romanarto. En 1927 BAGHY debutis kiel novelisto, kaj la kolekto *Dancu marionetoj* restas ankoraŭ unu el la plej gravaj novelaroj de nia literaturo. Sekvis en 1930 lia vasta satira romano *Hural*, kaj la postan jaron la kolekto *Migranta plumo* (noveloj, poemoj, teatraĵoj) kaj la longa novelo *Printempo en la aŭtuno*. Tria poemaro, *La vagabondo kantas*, kaj *Verdaj donkiĥotoj* (romano kaj karikaturaj) eliris en 1933, kaj plua kolekto de noveloj kaj skizoj, *La teatra korbo*, aperis en 1934. Speciale por komencantoj li verkis la novelojn *La verda koro* kaj *Nik Nek kaj Kat Jen*. BAGHY estas krome aŭtoro de deko da unuaktaj teatraĵoj. La manuskripto de plua romano, *Insulo de l' espero* (daŭrigo de *Hural*), pereis dum la milito. De liaj verkoj, noveloj, poemoj, pluraj eldoniĝis en diversajn lingvojn el esperanto.

Nun, post 25 jaroj, la eterna freŝa talento de BAGHY liveras al ni novan sensacion. *Sonĝe sub pomarbo* estas juneca idilio, ĉarma lirika komedio verkita per rimitaj versoj tiel fluaj, ke ili legiĝas kvazaŭ vigla konversacia prozo. Neniam la arto estis plej arte kaŝita: nur la atenta okulo malkovros la virtuozecon de tiuj glataj versoj, sed ĉiu leganto senpere ŝatos la kristalan stilon kaj la ravan interludadon kaj templekton de ĉi tiu aroma dramo.

* * *

Estas jam sub preso la ĉie streĉe atendata

Eseoj II

LINGVO KAJ VIVO

originalaĵo de

GASTON WARINGHIEN

grandioza monumento, absorbega lingvistika analizo de la esperanto-vivo, ĝiaj problemoj kaj ĝiaj perspektivoj, en unu el la plej frapantaj simbioziĝoj de akre postulema erudicio, de unu flanko, apud verva ŝorĉlingva eksponado, de alia. Unika ĝisdata fenomeno en Esperantujo de originala esplorado far' de samtempe penetrema lingvisto kaj beletristo unuaranga.

KUNHELPU PLUPORTI LA TORĈON !

£1.70
€1.25

STAFETO



BEL-LITERATURA ELDON-SERIO

JULIO BAGHY

SONĜE^A SUB POMARBO

TRIAKTA LIRIKA KOMEDIO
EN SES FANTAZIAJ BILDOJ

KUN ANTAŬPAROLO DE
MARJORIE BOULTON

J. RÉGULO - ELDONISTO - LA LAGUNA

KANARIAJ INSULOJ

1958

SONĜE SUB POMARBO

Libro originale verkita en esperanto

Dekoracioj de Stefano Barta

Kovrilo de John Hartley

IMPRESA GUTENBERG.—LA LAGUNA DE TENERIFE

DEPÓSITO LEGAL .TF 162 - 1958



Julius Zaghy

LA AŬTORO PRI SIA VERKO

LA JUNA KORO, obsedata de amo, ofte promesas ion grandiozan al tiu, kiun ĝi deziras servi per siaj sentoj. En simila promeso ekĝermis la grajneto de tiu pomarbo, kies frukton hodiaŭ mi proponas al la leganto. Per citaĵo el mia rakonto Printempo en la aŭtuno (kies heroaj figuroj havis la samajn nomojn kiel tiuj de ĉi tiu lirika komedio), mi dezirus prezenti al vi la grajneton. Jen:

«La rigardo de la studento renkontis grandan apudvojan arbon.

— Rigardu, Eva, la pomujo . . . nia pomarbo . . . ĉu vi rememoros pri ĝi?

— Mi memoros pri la revo, kiun via koro donacis al mi sub ĝi. Ho, kiel bela, kiel neforgesebla ĝi estas!

— Jes, Eva. Tre bela revosongô. Ni songîs tiun arbon la arbo de la Eterna Vivo . . .

— Kaj mia mano ŝiris de ĝi la frukton de la eterna vivo.

— Tiel, kiel en la biblio . . .

— Tiel, kiel en la biblio Adamo kaj Eva . . .

— Kaj ni songîs, ke por ĉiam ni unuîĝis. Super nia juneco sen postsignoj preterpasis miljaroj, jam neniu vivis sur la tero, nur ni. Jes, sole ni kaj la printempo tamen pasis neniam for. Por ni vivis la naturo kaj la maljuna Tero fariĝis edeno de la eterna juneco. Por ni,

por la lasta Homoparo, kiu manĝis el la frukto de la Eterna Vivo ... La lasta homoparo: Adamo kaj Eva... Kiel bela sonĝo estis!

— Jes, Adamo, tre bela. Nia koro teksis ĝin.

— Foje mi priverkos tiun temon. En versoj kun tintaj rimoj »

Pardonu, kara leganto, se iom fuŝe mi plenumis la promeson. Intertempe la juna koro maljuniĝis, al suna flanko de la Vivo ĵetiĝis monstraj ombroj. Nur la ama sento, kiel hedero, restis freŝe verda, nevelkebla: mia fidela amo al la lingvo, kies muziko narkote lulis min dum la batala voĉhaoso kaj kies kulturkrea destino inspiris min revii por forgesi pri la damna sobro. Junulo ĉiam promesas ion grandiozan; la maljunulo donas ion bagatelan, sed tiu bagatela tamen estas pli, ĉar ĝi prezentas ion konkretan: briketon al konstruo de nia originala literaturo.

Julio Baghy

ANTAŪPAROLO

BELETRISTO povus elverŝi multan inkon pri tiu ĉi granda, arte matura kaj individue originala dramo. Li povus dediĉi paĝojn al la subtileco, la surprizoj, la melodieco kaj drama trafeco de la metriko; li povus fari ekzemplodonan kolekton da lertaj malkliŝaj rimoj; li povus longe pridiskuti la interpretadon de la filozofiaj kaj psikologiaj konceptoj.

Beletristo povus elverŝi multan inkon pri tiu ŝatata sporto de erudiciuloj: fontĉasado. Li povus multe skribi pri la kunfandiĝo de mitoj; la Malnova Testamento kun la grekaj kaj fe-landaj aludoj kaj la moderna pseŭdomitologio de spacvojaĝado kaj kosmoteknologio; beletristo sendube povus detaligi, eble eĉ tabele, la tre videblan influon de Shakespeare; konjekti pri la forto de la Madáč-a influo; mencii Goethe kaj eble Milton. Beletristo povus tre detale analizi la simbolojn, prikomenti la riĉan fantazion, la poeziajn imagojn, la vervajn ŝercojn kaj la delikate elvokivajn revojn, la multajn vigle individuecajn tropojn. Li povus ankaŭ detale studi tiun ĉi verkon de maljuna aktoro-reĝisoro laŭ la teknika vidpunkto de teatra arto, sursceneja efikemo. Li povus montri en sufoka detaligemo kiel trafaj estas la vidimagoj, la preskribitaj gestoj, lumaranĝoj kaj dramecaj kontrastoj, eĉ la grupiĝo de homoj sur la scenejo. Tiu homo, kiu kiel bebo iam dormis en teatra korbo, kiu kiel vivoplena maljunulo ĉiam aktoras siajn anekdotojn

kun komikaj gestoj kaj diversaj voĉoj, ja komprenas la postulojn de la scenejo.

Eble iam tiu ĉi lirika dramo estos klasikaĵo de la tutmonda, homa literaturo, kaj multaj beletristoj, eĉ eble diversskolaj biografoj, elverŝos litrojn da inko pri ĝi.

Sed tian inkon mi ne deziras nun elverŝi. Mi elverŝis brogajn homajn larmojn dum, plejparte surtrajne aŭ inter aliaj distrantaj bruoj, mi por la unua fojo legis la manuskripton kaj tuj decidis, ke mi devos iel eldonigi ĝin kiel eble plej rapide.

La verkoj de Julio Baghy parolas precipe al la koro, kaj mi tial volas prezenti tiun ĉi novan verkon laŭ senhonta subjektiveco. Kiel mi rilatas al tiu ĉi majstroverko? Kaj kial la manuskripto trafis miajn ne tre indajn manojn? Oni espereble indulgos mallongan personan historion.

Nu, mi eklernis esperanton en novembro 1949, pro lingvostudemo kaj sen granda entuziasmo. Dum pli ol jaro mi ne renkontis alian esperantiston. Kio retenis min por la Movado? — Instruisto pruntis al mi la plej belan poemaron de Kalocsay; *Streĉita kordo*, vibrante en mia animo, vekis eĥojn. Mi ekkomprenis, ke esperanto estas ja artkapabla lingvo taŭga por ebla mondkulturo. Mi jam oscedis super diversaj fuŝverkoj kaj almenaŭ banalaj libroj esperantaj; sed, leginte unu libron kiun oni rajtas dece kaj serioze kompari kun nacilingvaj literatur-verkoj, mi sciis, ke mi restos esperantisto.

Mi esperantiĝadis dum la epoketo plej malfacila por la orienteŭropaj samideanoj, kaj ĝis 1952, kiam meritplenaj britaj esperantistoj komencis blovi (ofte iom timige-tempeste) la malgrandan fajron de mia esperanta verkemo, mi restis hontinde seninforma pri nia vera, altnivela literaturo.

Dum la malfrua somero de 1952 mi ricevis prunte brakoplenon da elĉerpitaj libroj. Inter ili troviĝis *Viktimoj* kaj *Sur sangato*. Mi kutime trovas tempon por legi nur en la lito. Mi ankoraŭ memoras kiel, en piĝamo, mi kuris nokte en la ĉambron de mia patrino (nun esperantistino, tiam ne) por tuj paroltraduki al ŝi pecojn el tiuj libroj, kun larmoj sur la vangoj, kun tremanta voĉo. Nun mi scias, ke ankoraŭ la esperanta romano povas esti serioza literatura verko. Poste mi aĉetis ĉiujn tiam haveblajn verkojn de Julio Baghy. La tuta aro ne seniluziigis min. Mi ekaŭdis, aŭdadis fragmente, pri lia tragika kaj heroo vivo, lia lojaleco kaj persisto, lia sindediĉo, lia aminda personeco. Mi jam tre estimis lin kaj sentis por li fortan simpatian; sed tiam li ŝajnis tre fremda, fora, eĉ fere forbarita de ni; kaj, kvankam mi estas eble eĉ tro revema, mi neniam revis pri la eblo de persona renkontiĝo.

Tamen, kiam la hungara Movado ree ekprosperis, mi trovis hungaran korespondantinon, la simpatian junan verkistinon Palma Nagy, kiun mi rapide ekamis. Ŝi konis Baghy kaj Kalocsay; sed por mi ili restis la du veraj geniuloj, la neatingeblaj eminentuloj.

Kiam en 1955 mia eble promesomontra, sed, kiel mi mem tre konscias, artisme nematura unua esperanta libro *Kontralte* aperis, mi pro amikeco sendis ekzemplon al Palma kaj, timeme, heziteme, ruĝiĝante dum mi skribis, demandis, ĉu decus sendi ankaŭ al Baghy kaj Kalocsay, ĉar la librotrafiko estas malfacila... Palma jesis.

Mi ofte jam spertis la modestecon de vere grandaj homoj, same kiel la obsedan deziron de kelkaj negravaj homoj esti gravaj. Post mia hezitema omaĝgesto — Kalocsay verkis por mi belegan poemon; Baghy sendis al mi leteron nemeriteble amikan. Li ankaŭ sendis sian portreton, kaj mi vidis kun kortuŝo kiel la nuna suferinta

maljuna vizaĝo kontrastas al la vira belo iam renoma en la Movado. Sed tiuj mirindaj okuloj restis, post okulvitroj, fenestroj el kiuj lumas belega animo.

Kopenhago, 1956. Hungaroj venis denove al Universala Kongreso. La eta hungara delegitaro alvenis malfrue kaj oni tuj vokis Baghy al la estrado por saluti. La adorado de la Esperanto-Movado subite eksplodis en galeriskua aplaŭdego. Sed Baghy forgrimacis, forĝestis nian kolektivan adoron. Li volis havi nur nian amon.

Kiam, poste, gesamideanoj ĥaose svarmis en la Kongresejo, mi kelkfoje vidis tiun tre maldikan, vivoplenan, preskaŭ komike aktivan maljunulon en la homamaso. Antaŭ tiaj homoj mi estas ege timema. «Ĉu» mi pensis ĥeziteme «mi iel kuraĝos prezenti min al li... eble dum momento persone saluti lin... eble premi la manon, kiu surpaperigis *Sur sanga tero?*» «Nel!» mia konscienco respondis. «Vi ne rajtas ĝeni tian homon. Ĉuu finfine la privilegion aŭskulti kaj rigardi lin... sed ne decas, kun via unu ne tre bona libro, trudi vin... kaj tiaj homoj estas tre okupitaj...»

Samtempe (kiel li poste konfesis al mi kun rido) D-ro Ferenc Szilágyi, kiu ekkonis min persone pro sia administracia laboro pri la Belarta Konkurso, hazarde murmuris helpeme al Baghy: «Kaj tiu virino tie estas Marjorie Boulton... —»

Tiu impetema, impulsa, spirite malavara heroo subite turnis sin kaj surprizatakis. Mi preskaŭ ekperdis konscion, parte pro inunda emocio, parte pro spiromanĝo. Ĉu ie en lia prapatraro troviĝas boao, mi ne pretendas scii. Sed ke mi tiel trovis min, publike, en la brakoj de Julio Baghy, estos ĉiam por mi la plej kortuŝa pruvo de lia spirita malavareco, de tiu modesteco de vere grandaj homoj; kaj tiu memoro plivalorigas al mi,

per sakramento de simpatio, eĉ mian propran iom difektitan korpon. Jen li vidis, nek la ankoraŭ fuŝeman komencantinon, nek la senaplomban timemulinon kaj trosenteman egoiston, nek la ankoraŭ nematuran artiston; sed en mi li vidis, ŝajne, kaj amike ĉirkaŭbrakis, la homfratinon, kiu almenaŭ volas bone verki.

En tiu rava medio de Universala Kongreso, Julio Baghy estis tre gaja, sprita, terure ŝercema, karesema, ludema. Mi kredas ke, malgraŭ siaj konstantaj korpodoloroj kaj vastaj pasintaj suferoj, li tiam estis, iasence, feliĉa. Li nepre feliĉigis multajn aliajn. Tamen, dufoje mi ĝuis seriozajn konversaciojn kun li. Tiel malavare li donis al mi sian tempon, sian animon.

Mi trovis en li animon esence aŭtentikan kaj nedireble karan. Mildeco, karitato, amikiĝemo, pardonemo, modesteco kaj larĝa, kompatema homa simpatio radias el li. Li trovas la plej bonajn erojn en aliaj animoj, kaj kreskigas tiujn etajn grajnojn per la sunlumo de tiu personeco, tiel fortega por elteni kuraĝe kaj kuraĝigi, tiel dolĉa por ami kaj konsoli. En mian internan mondon venis nova sento: tute novspeca, urĝa deziro iĝi, se eble, pli sincera artisto, pli bona homo.

Ho, tiu mirinda spirita malavareco! Li estas renoma, geniulo, ankaŭ grava organizanto; kaj li plej varme kuraĝigas komencantojn. Li donas la propran koron simple, senĝene, kvazaŭ tia amo ne multe valorus, kaj ne postulas recipokon. Li tuj proponas intimecon tute sen postuli ĝin; li kondutas, kvazaŭ li ne gravus kaj la alia persono gravus tre. Dum nur du longaj konversacioj plus kelkaj rapidaj interparoletoj, li donis al mi amikecon, kiun mi neniam povos meriti.

Tiam li jam havis en la kapo la planon por *Songĉe sub pomarbo*. Dum ni promenis tra kelkaj ventfalĉitaj

flankstratoj de Kopenhago, li, kun multaj viglaj gestoj kaj ĉiam interese modulita voĉo, skizis al mi tiun dramon. Poste ni devis disiĝi. Adiaŭante, li menciis al mi tre gaje kaj nature la eblon de sia baldaŭa morto. Mi ekveis. Liaj belaj, kompatemaj okuloj kaptis la miajn en rigardo pretertere radia, kaj li diris al mi firme, konsole, trankvile: «Mia kara . . . tio tute ne gravas . . . mi estas tute preta . . . »

La maliceta vento komike malbonordigis lian hararon ĝis li ŝajnis nur longa nazo kaj histrikeca verto; sed mi ekkomprenis, ke ĉiuj tiranaj ventoj de lia sorto ne plu povas skui lian lumplenan animon. Ek de tiu momento, mia vivoscio estis iom pli larĝa, la vivo mem pli signifoplena.

Iom poste, kiam Julio Baghy estis en Varsovio, tagoj kaj semajnoj de la plej nigra angoro trafis lin; tagoj dum li sidis tremante apud radioaparato, nesciante pri la sorto eĉ de siaj plej karaj. Samtempe, mi sidis tremante kaj spasmoplorante apud radioaparato, konjektante kun korpremo pri la sorto de Baghy, de Kalocsay, de Palma kaj de aliaj . . .

Kion mi faris dum tiuj angoraj tagoj kaj semajnoj? Mia nesufiĉe hardita menso preskaŭ senkoheriĝis. Mi multe ploris kaj apenaŭ agis iel ajn. Dume, sub timo milfoje pli urĝe persona, ol la mia, Julio Baghy verkis la plej grandan parton de *Songê sub pomarbo*. El la infero mem, leviĝis anĝela kanto.

Kiam tiu ĉi libro estos antikva klasika verko nia, homoj pli erudiciaj ol mi elverŝu, se ili volas, multan inkon pri la literaturaj detaloj. Mi volas nun diri, ke tiu ĉi perfekta bildo de juna amo, idealisma, lumbanita, vivsanktiga, tiu ĉi serena, sentima bildigo de Tempo kaj Morto, tiu ĉi profunda konvinko pri la valoro de Vivo,

eĉ tiu ĉi saniga sprito kaj burleska gajo, kreiĝis el amanta animo torturita, kiu devis loĝi en konstante doloranta korpo, el krucumita homa koro. Dum horoj abismofunde nigraj, li bildigis por ni ĉiuj la plej orajn momentojn de la vivo; rigardante rekte en la rikanantan vizaĝon de la Morto, li prihimnis la Vivon; dronante en la teruraj larmoj de kuraĝa viro, li verkis por ridigi. Tiaj spiritaĵvenkoj aldonas ion plusan al nia difino de Homo.

Kaj mi, kiu tiam sentis torturan sopiron helpi kaj konsoli lin kaj povis nenion fari, ricevis, bildon post bildo, la manuskripton de tiu ĉi verko, verko, kiu estas ankaŭ venko. Mi volas prezenti ĝin al pli granda publiko, kredante ke ĝi valoros ankaŭ por niaj posteuloj.

Kion ni povos kompanse doni al la poeto, al kiu ni povus citi el lia propra dramo:

*El via kor' radias sorĉa mildo
al vund' de l' homa digno krucumita,
kun pov' mirakla de la am' karita ... ?*

Mi vere ne scias.

Kaj kiel mi titolu lin, se iam ajn mi renkontos lin surtere? «Akademiano Baghy...»? — Li ja mastras la lingvon mirakle, sed li ne estas nur vortremburita inkulo... «Altestimata sinjoro Baghy...»? — Maladekvate. «Plejestimata sinjoro Baghy...»? — Pli dece, sed li forgrimacas ĉiujn omaĝojn. Kiel komenci?

La tuta Movado admiras lin, deziras omaĝi lin.

Sed omaĝon li ne deziras. Mi do salutos lin per tiu karesnomo, kiun li jam akiris, kaj kiu tiel taŭgas por homo tiel home matura, tiel bene konsola kaj amema:

«Paĉjo...»

Marjorie Boulton

Julio 1957. Stoke-on-Trent

SONGE SUB POMARBO

*«Ho, lasu min trankvoile reŭi,
en lum', portata en mi, bani min,
rifuĝi for el mond', min levi
inspirflugile ĝis la kosma lim'!
Atendas transe senlimeco
kaj eblo por forgesi pri la ter'
por ĝui en la eterneco
collongan ŝajnon de fiktiva ver'»*

AL LA TUTMONDA JUNULARO
KORE
AL SIAJ NOBLAKORAJ GEAMIKOJ
DANKE
DEDIĈAS LA VERKON
LA AŬTORO

PROLOGO

(aperas antaŭ la kurteno)

*Publiko kara, estas mi Prologo,
al histori' bizara la — allogo.
Ĝin teksis la poet' el junaj revoj
de geamantoj por — Adamoj, Evoj.
Prologo havas taskon — multpromesi;
mi tamen devas honte tuj konfesi:
la verko estas fuĝo timotrema
for de l' aŭtun' kruela, frostoplena,
rampanta ŝtele por nuligi ĉion:
esperon, vivoĝojon, iluzion.*

*Jes, fuĝi por eskapi el realo
kaj kovi sobran vidon per vualo,
havanta sorĉopovon forgesigan
por ne plu senti finon jam tragikan.
Sed kiel, kien fuĝi por sin savi,
la zorgojn peli, sin narkote ravi?
Al senlimeco de l' patruj' fabela,
al viv' sentempa, al eterno bela
por rejuniĝi kaj forgesi jarojn,
rehavi junajn trajtojn, brunajn harojn.*

*Unua el motivoj inspirantaj
malvirto estis jen el ecoj vantaj,
iganta la poeton lasi rampon
sur kota voj' kaj flugi super kampon.
Pardonu lin, ĉar la motivo dua
jam fuĝo estis el angor' detrua.
Dum lian koron nostalgio tordis,
la patra tero fratan sangon sorbis,
la Hom' bestiĝis, murdis sen indulgo,
pervente krozis veo, sanga fulgo.*

*Nur fuĝi! Fuĝi! Estas kompreneble,
ke tiu penso lin obsedis febre.
Kvankam dorlotis lin fratamo pola,
li tamen sentis sin premita, sola
ĝis la poeton la inspiro vekis,
per vundovinda sorĉo lin ekregis
ebligi fuĝon for de l' nuno morna
al poezio dolĉa kaj sendorna.
Tiel kreiĝis verk', Publika kara,
en kor' aŭtuna, larma kaj amara.*

*Ĉu dramo estas ĝi? Nur komedio,
zigzaga kuro de la fantazio,
pasanta eĉ jarmilojn salte dance
por kune montri, kio estas transe.
Lirika scenon sekvo bildo fabla,
burlesko poste kun ruzaĵ' diabla,
ne mankos bildoj por satiri, miri
post bona fino gaje hejmeniri . . .
Poeto kiel, kien provis fuĝi,
Publika kara, volu mem prijuĝi!*

(La PROLOGO malaperas malantaŭ la kurteno)

ROLANTOJ

ADAMO, studento, 17-jara

EVA, nepino de arbaristo, 17-jara

AVO

AVINO

KAZIMIRO

NIMFO

FAŬNO

STRIGO

VESPERTO

SPIRITO

ABO, teknokrato

AZO, teknokrato

NOZA, teknokratino

QU, homonkulo

PI, homonkulo

MORTO

Krome ĤOROJ de GNOMOJ, ELFOJ, ELFINOJ, LAMPIROJ

Okazas dum aŭtuna nokto

UNUA AKTO

UNUA BILDO

La scenejo prezentas pitoreskan narbara pejzaĝon, kies mezo, la scenejo mem, montras senbarilan korton de arbarista domo. La fono montras Z-forman serpentumantan vojon, kiu kondukas el la arbaro al la korto. Ĉe la unua vojkurbo staras roko, sub kiu troviĝas fonto. La dua vojkurbo direktiĝas al la domo, ĝis fine la vojeto reaperas por servi kiel enirejo sur la korton. Tre malproksime, inter arboj, ruino de iama fortikaĵo estas videbla. En la mezo de la korto staras dika pomarbo kun maturiĝintaj fruktoj. Subarbe benko por du personoj. Dekstre de la arbo arbetoj borderas la korton. Maldekstre de la arbo troviĝas la arbarista domo, konstruita tiel, kiel oni konstruas domojn sur dekliva grundo. Ĝia fundamento konsistas el ŝtonegoj, kies alto, vid-al-vide al la publiko, atingas la alton de plenkreskinta homo. Sur tiu altaĵo staras la domo kun verando, al kiu kondukas supren ŝtuparo. La domo havas du fenestrojn al la verando, inter ili pordon. Ĝi havas la trian fenestron al la publiko. Antaŭ tiu ĉi fenestro estas arbeto. Ĉiu fenestro havas ĵaluziojn, potojn kun floroj aŭtunaj. Mem la domo rememorigas tipe arbaran lignodomon. Tempo: malfrua aŭtuna posttagmezo, sed kun sunbrilo. Post kurtenleviĝo momente neniu estas videbla sur la scenejo. Paŭzeto

ADAMO (*ekstere*)

Hej, haltu do, arbara feinetol

EVA (*kure aperas ĉe la supra parto de la vojo*)

Ne pelu min!

ADAMO (*kurante post ŝi*)

Ĉu povas peli peto
de kor' humila, vin sekvanta sklave?

EVA (*momente haltas ĉe la fonto*)

Vi persekutas. Jes!

ADAMO

Knabin', neprave.

Vi mem posttrenas min.

EVA (*rifuĝas plu*)

Nel! Vi mensogas.

ADAMO (*ŝin sekvante*)

Ne min akuzul! Via ĉarmo logas.

Pro ĝi sopiro pulsas ĉiujne.

Kompatu min, knabin'!

EVA (*haltas ĉe la vojfino*)

Mi estas hejme.

(*Ili ambaŭ haltas, rigardas unu la alian. Ili ŝajnas esti embarasataj. Post paŭzeto, efemera rideto aperas ĉe iliaj lipoj*)

ADAMO

Ĉu for de l' urbo, tiel malproksime?

EVA

Jes, loĝas mi ĉi tie, arbarlime,
kun avo mia ... Jen en tiu domo ...
Li estas arbaristo, grava homo ...

ADAMO

Jes ...

EVA

Kie vi?

ADAMO

Enurbe, ĉe la strando.
Student' mi estas.

EVA

Sekve, pridemando.
okazos morgaŭ.

ADAMO

Eble. Mi ja venis
por lerni en l' arbaro.

EVA

Vin mi ĝenis.

ADAMO

Ho, nel

EVA

Sed jes! Scivol' min igis paŝi
de vojo en la denson, min forkaŝi
de via vido por vin prispioni,

kion vi faras? ... Ŝajnis fremde soni
la deklamata tekst'.

ADAMO

En lingvo greka.

EVA

Pardonu! Pri la ĝen' mi estas peka.
Sed ankaŭ la hazardo same pekis;
falinta branĉo vin el studo vekis.
Nur poste mi rimarkis, sed malfrue,
ke intervenis la hazard' — tro brue.
Do kion fari? Mi forkuri penis,
Sed vi ... ho, ne tre dece, post mi venis
kaj sekvis min persiste... Ĉu ne honte?

ADAMO

Neniun sekvis mi tiel volonte
dum mia tuta vivo, kiel vin, knabino.

EVA

Pro altrudita gard' mi dankas. Fino.
Adiaŭ! Lernu plu! (*Volas ekiri*)

ADAMO

Ne! Ne foriru!

EVA

Sed tamen ...

ADAMO

Restu! Mi ja petas. Diru,
ĉu eblas lerni, kiam menso dormas,

kiam en koro sentoj vipe ŝtormas,
kiam la pensoj faras farsan dancon,
ĉu por sciencoj kapo havas ŝancon?
Kiam sopir' obsedas nin penetre,
ĉu eblas parkerigi? Diru!

EVA

Ne tre.

(*Paŭzeto*)

ADAMO

Ĉu ni eksidu?

EVA (*embarasite*)

Se vi volas sidi?

ADAMO

Eksidu ankaŭ vi!

EVA

Ne decus spiti

kiam vi petas min tiel ĝentile.

Ĉu ne?... Sed kie?

ADAMO

Kie trankvile

Sen ĝen' ni povos sidi. Tie roko
proponas sin ĉe l' fonto. Bela loko.

Aŭ fore nin invitas herba pluŝ'
sub karesad' de l' suno, ventotus'.

EVA

Tro fore ... Restu ni al dom' proksime,
ĉar baldaŭ vesperiĝos.

ADAMO

Tiel time
vi diris, kvazaŭ estus mi krimulo.
Ĉu tia mi aspektas?

EVA

Ne, sed kuloj
ĉe fonto mile svarmas, sangavidas;
de herba pluŝ', la domon ni ne vidas
kaj se avino min alvoki provos,
la kri' atingi tie nin ne povos.

ADAMO

Ĝis vesperiĝo estas nur horeto.

EVA

Nu, sub pomarbo, tie, en kvieto
sur benk' sidante eblos ja paroli.
Pli taŭgan lokon ni ne povus voli.

ADAMO

Ni iru tien.

EVA

Vin mi gvidos.

ADAMO

Bone.
Ombrumos nin la arbo eĉ patrone.
(*Atinginte la arbon ili hezite haltas*)

EVA (*subite eksidante lasante lokon por li*)

Mi sidas jam ... Nu?

ADAMO (*eksidinte*)

Ankaŭ mi apude.

(*Post paŭzeto*)

Pri kio ni parolu do prelude?

EVA

Kie ŝiriĝis do faden' de l' temo?

Forgesis mi.

ADAMO

Cetere ne problemo.

Por babildad' ne gravas multe pensi,

nur simple la babilon — rekomenci.

EVA

Vi pravas . . . Vi, unuavice.

ADAMO

Ho, nel

Pli ĉarme, se vi mem komencas.

EVA

Bone!

Mi loĝas en arbaro, for de l' urbo,

for de l' trafiko, bruo kaj perturbo.

Kiel varias viv'? Mi nur konjektas.

Ĉi tie fam' ne ofte sin direktas.

Kiam vizitas nin vendist' vilaĝa,

la pakpapero, la gazet' jaraĝa,

plenplenas kun novaĵoj freŝaj por ni.

El ili penas mi mondbildon formi.

Eĉ sezonŝanĝoj ne influas min tro;

senŝance pasas la somer', la vintro.

Sen ŝancoj volo restas ja senpova . . .
En temp' moderna nur eksmode nova
forvelkas junco kiel la jasmeno.
Mi vivas en la dom' sen multa peno;
avinon helpas mi, kuiras, trikas,
survestajn truojn zorge ŝtopas, flikas.
Somere, kiam pasas luno pala,
min distras birdotrilo najtingala;
malofte, se alvenas amikin',
por modaj kantoj mi turmentas ŝin.
Dumvintre ĉiam legas mi romanon,
travivas kun hero' la tutan dramon.
Ho, aman romantikon mi preferas;
ĝi aventuro traktas, sentojn peras
kaj dum soleco tiklas fantazion
por reve krei el nenio — ion.
Ĉi reva lud', ĉar diktas mia plaĉo,
valoras pli ol amikina klaĉo:
pekulon pun', virtulon bono trafu,
en ĉiu histori' la justo gravu!
En tiaj belaj horoj mi imagas,
ke al mi tra l' arbaro princo vagas,
vestita simple kiel bard', studento
por nokt' petante lokon sub tegmento
kaj preni min edzino . . . (*Ekridante*)

Ah, hazardo!

Vi estas ja student', aspekte bardo,
ĉar fremdalingve versojn vi recitis,
kiam subkaŝe supre vin mi vidis.
Do diru: bardo, princo aŭ barono?

ADAMO

Studento nur, tre simpla, sen blazono,

al kiu pezan vivon sorto trudas,
kiu por pano luktas, dum li studas.
Neniun havas mi por min protekti;
pri mia viv' mi devas mem projekti.
Patrinan amon sortkruel' forportis,
mi estas orfo, ĉar eĉ patro mortis.
Trezoron li ne havis, nur la koron,
ĉi oran koron metis ĉen laboron
kaj princo min edukis — lia amo
eĉ sen ekstera pompo kaj ornamo.
Herede restis por mi — nom' honesta;
student' mi estas kaj ne princ' pseŭdvesta.

(Riverencante antaŭ ŝi)

Se plaĉus al reĝina suveren'
sengroŝa princ', en luno kun bien',
sub via reg' mi estos je deziro
migranta bard', vaganta kavaliro,
proleto, burĝo, grafo, diplomato,
laŭ la destin' de revteksita fato...
Por diri veron, fliko ĉe l' kubuto
ne estas falsa, sed real' en tuto.

EVA (*emociite*)

Min tuŝas dolore via mok' pri vi.
Ĝi tranĉas koron. Ah, vundite drivi
sur vivomar' signifas subakviĝon.
Ne moku vin, sed gardu tiun riĉon,
kiun la patro havis: la amemon.
Kun lumbien' reĝinan suverenon
ne volu servi kiel princo fabla.
Studento restu, gaja kaj afabla.
Kun kor' amika min knabino vidu,
naivajn revojn miajn ne priridu;

se vi regalos per konfido min,
kun tuta kor' mi restos — amikin'.
*(Pro la nepripensita konfeso ŝi ekhontas kaj volas
forkuri)*

ADAMO
Ne kuru for! Atendu por momentol

EVA
Ĉu moki plu?

ADAMO
Indulgu por ofendol
Jes, vere mi kondutis stulte spita:
ĵaluzi pri la princo imagita,
vivanta sole en knabina revo.
Pardonon peti estas mia devo.

EVA
Vi ne ofendis kaj mi ne koleras.
Vi nur forgesis, kio iom veras,
ke se amaras suk' de l' vivofonto,
freŝigas nin eĉ gut' el revomondo.

ADAMO
Do vi pardonis.

EVA
Sed nescie, kion?

ADAMO
Ĉu scii estas grave?

EVA
Nu, jes, iom . . .

ADAMO

Momente havis mi subitan timon,
ke vin mi perdos kaj kun vi animon.
Mi ne troigas. Tie ĉe l' deklivo
aperas nova senc' de mia vivo;
nun ĝi inŝpiras celon por estonto;
konfesi tion ja ne estas honto.
Ĝis nun por mi la viv' dezerto ŝajnis,
konsolon kaj esperon ĵus mi gajnis.
Radias ili al la kor' emane,
sugestas penson «mi ne vivos vane».
Hazarddonita amikin', mistike
en mi ekĝermis sent'. Konfesus mi, ke ...

EVA (*reveme atendanta amkonfeson*)

Nu, diru do!

ADAMO

La vorton mi retenas.

Ĝi ŝajnus frua.

EVA

Tamen mi komprenas.

Pli elokventas muta vort' sekrete
ol vort' dirata krude kaj impete.
Tre dolĉe kredi, ke la vort' silenta
kun mia muto montras sin identa.
La nenaskiton mia kor' jam baptis;
per vorto retenita min vi kaptis.
(*Ŝi metas sian manon en la lian*)

ADAMO

Jen tia song', kian la fantazi'
dum febra nokto skizas antaŭ mi,

kiam en historio sorĉovinda
fariĝas mi heroo enviinda.
Ĵus premis min inkuba superstiĉo,
ke vin, korsorĉa songo, la vekigo
forpelos tuj, se venos la mateno;
fantomo iĝos vi, sed sen reveno.

EVA

Kutime do vi ofte songas. Ĉu?

ADAMO

Jes... Iam songi estas arta ĝu'.

EVA

Ĉinokte ĉu vi tian songon havis?

ADAMO

Pli stranga songo min neniam ravis.

EVA

Ho, mi insiste petas vin, rakontu!

ADAMO

Ne volas mi, ke pro l' rakont' vi hontu!

EVA

Ĉu tiel ŝoka?

ADAMO

A ma kaj bizara.

EVA

Mi estos baldaŭ pli ol deksepjara.

ADAMO

Mi cedas! . . . Ek al lando de fabeloj!
Aŭskultu!

EVA

Mi konsistas el oreloj.

ADAMO

En la sonĝo mi promenis
sur la bord' de vasta maro.
La sunbrilo morte svenis
ĵus dronanta en ondaro.
En purpura flagra flam'
ĉio ŝajnis ardi jam
sur pagana brulaltaro.

Jen subite en aero
sepkolora birdo alte
logis min for de la Tero
fluĝetante dance salte.
Dum ĝi flugis longe plu,
regis min magneta flu'
min tirante, min ekzalte.

Kion fari? Piedpinte
mi ekstaris, braketendis,
post momento flugilsvinge
ankaŭ mem mi ŝvebe pendis.
Kun facilo kaj sen trem'
sekvis mi la birdon jen
kaj eteron pluge fendis.

Dum la sorĉo min obsedis,
ĉio ŝajnis ekster ordo;

Tero mem al forto cedis
min lasante flugi for do.
Fulme, pensrapide eĉ
pasis mi sen fortostreĉ'
super mar' al transa bordo.

Tie, kiel la miraĝo,
jen oazo palmoranda
etendiĝis en pejzaĝo
el la mondo feolanda.
Eĉ Edeno laŭ Bibli'
montras sin ne bela pli
ol ĉi bosko florgirlanda.

*(Iom post iom vesperiĝas kaj la scenejo estas lumi-
gata de ruĝo de sunsubiro)*

Feoj, gnomoj, elfoj are
je muzik' de karmanjolo
kun feinoj dancopare
turnojn ludis kun petolo;
krome siblis svinge nur
vualvesta silksusur'.
Turnojn nombris cent kukoloj.

Jen ĉesiĝis bruo bela.
Spirretene ĉio mutis,
arĝentlumon luno pala
tre abunde disen ŝutis
kaj aperis poste tuj
nuda Nimfo sub rozuj'
kiel belo senrivala.

Nudan ĉarmon alabastran
oraj haroj tende kaŝis,
ŝveban revon aliastran
ŝi reflektis, kiam paŝis.
Sin ŝi klinis al kaj for;
svenis sobro kaj pudor',
ĉar por kor' ŝi reton maŝis.

Sorĉa reto kaptis min do;
perdis mi la menson savan.
Ŝin sekvante pro la blindo
falas mi en sorton sklavan.
Al dezir' pri ama jes
flustris flate la promes'
kaj mi havis trompon ravan.

Sian buŝon ŝi proponis
per alŝvebo kisprovoka.
Miajn lipojn sento spronis,
arda tuŝo spirsufoka;
poste vanis peto «bis!»,
ne plu sekvis plia kis';
sole trilis rido moka.

Forŝvebante floksimile
flirtis ŝi al for', min perdis.
Post ŝi kuris mi humile,
sed atingi mi ne lertis.
Kvazaŭ puno kruda nun
min haltigis jen Faŭn'
kaj ĵaluze li avertis:

«Haltu hom' el bordo transa,
pelo vanas en ĉi sfero;

am' de Nimfo ja sensanca
restas por la fil' de l' Tero».
Je demanda mia kri'
mokridante diris li:
«Jen edeno en infero».

Ridis elfo, gnomo, feo,
mok' feina skue ehis . . .
Post turmenta ama veo
sunleviĝo min — ekvekis.
Penso tiu min tien:
«Bone estus vivi jen
en infera elizeo».

.

Jen mia song', dumdorma aventur'.

EVA (*post paŭzo*)

Feliĉe, ke ĝi estis songo nur,
ĉar kiel vidas mi, la filo tera
volonte restus en la fund' infera
por peli plu senhontan nudulinon,
por kiso ŝia perdi eĉ animon . . .
Sed, diru, ĉu ŝi, tiu bel' demono,
por vi efikis tia — sangosprona?

ADAMO

Jes! Ŝia bel' superis fantazion.

EVA

Kaj ŝia kis' ?

ADAMO

Ĝi vipis la pasion,

ĉar ŝiaj lipoj min kisantaj dolĉe,
la koron fandis al ŝi fajre forĝe.

EVA

Se tion dire vi konfesas veron,
prefere do reiru en — inferon.

ADAMO

Pro kio vi subite koleriĝis?

EVA (*preskaŭ plore*)

El *via* songo fakte *mi* vekiĝis.

ADAMO

Mi ne komprenas.

EVA

Ĉu ne? Interese.

Laŭ vi ĉu ĝoji estus nun necese
kaj eble decus himni eĉ ekstaze
kaj droni en bombastoj parafraze,
ĉar por knabino tera estas ŝanca
la rivalin' demona, vualdanca?

ADAMO

Nur songo estis.

EVA

Jes, songo, sed *kia*?

Ĉe ĝi realo ŝajnas anemia.

Nu, se ŝi ravis tiel korrabante,
se vin ŝi kisis tiel fajre fande,
al ŝi reiru, al fein' transtera,
al anĝelin' perfekta, sed — megera.

Jes, jes, ŝi montros sin megero poste,
vi certe spertos tion nervokoste,
kiam ŝi vin furie tede traktos,
en ŝia ret' senpove vi baraktos.

ADAMO

Songbildo nur, ne pli, de juna koro.

EVA

Sopiras tamen vi al tiu foro,
ĉar vian koron povis ŝi — kuiri,
jes, jes, sed tage lasos vin sopiri
je bona manĝo kaj vi plende trovos,
ke baki, rosti, ŝi neniam povos;
en potoj faboj ja tamburos hajle,
la kuko gustos bulbe, kafe ajle,
por flikojn havi vanos petoj, bruoj,
sur via vest' oscedos plu la — truo.
Reiru, se valoras ne pli *mi*.

ADAMO

Nur estis song'!

EVA

Sed songo ne pri mi!
Ho, mia kor' naiva preskaŭ cedis,
kiam por rev' vi elokvente pledis,
kaj jen real' sin montris tro amara:
ne min koncernis vorto amdeklara . . .
Foriru do! (*Turnas sin for de li*)

ADAMO

Nu, bone! Mi obeos.
(*Leviĝas por foriri*)

EVA
Studento, pro l' foriro mi ne veos.

ADAMO
Ĉu vere vi koleras?

EVA (*nur kape jesas*)

ADAMO
Senpardone?

EVA (*mute kapjesas*)

ADAMO
Adiaŭ, feinet' arbara!
(*Riverencante ekiras*)

EVA
Ho, nel

ADAMO
Kion?

EVA
Nenion.

ADAMO
Ŝajnas, min vi vokis.

EVA
Ne, vi eraras.

ADAMO
Do, vi monologis.
(*Post momenta pauzo*)

Mi iros for, sed sciu, ke ridinde,
se iu ekĵaluzas tiel blinde
pro kreitaĵo pure fantazia.

EVA

La fantazi' kreanta estis — *via*.

ADAMO

Ni povas krei, kio vivas en ni.

EVA

Do pravas mi; la Nimfo vivas en vi.
Kun ŝi dividi vin mi ne deziras.

ADAMO

Logikon straban de knabin' mi miras.
(*Moke riverencas*)

EVA

Student', por komplimento altan dankon.
(*Moke riverencas al li*)

ADAMO

Ĵaluzo via havas bazomankon.
(*Residiĝas*)

EVA (*kvazaŭ senvole cedas sidlokon al li; sur sia mieno videbliĝas la pardondono, ĉar ŝi ja opinias, ke en vortbatalo ŝi venkis*)

ADAMO

Pripensu, kiel stulta mi aspektus,
se pri perfido tie mi suspektus,
kie ekzistas eĉ ne i m a g i t o .

Vin certe tedus la akuza spito,
per kiu vin riproĉus mi obstine.

EVA
Ĉu mi obstinas? Vi akuzas.

ADAMO
Mi ne.
(*Subite ekstaras, ofendite ekiras*)
Adiaŭ dol

EVA
Ĝis maro sekaplande.

ADAMO
Mi iros...

EVA
IRU!

ADAMO (*returnante sin*)
Tamen sendemande
mi diros al vi, ke mi jam konjektas,
pro kio studenton vi neglektas.

EVA (*iom moke*)
Ĉu vere? Mi scivolas.

ADAMO
La ĵaluzo
ja estas falsa nur knabina ruzo
tro travidebla por ne vidi fakton:
anstataŭ barko vi preferas — jaĥton.

EVA

Aĥ kiel spritel . . . Sed . . . mi ne komprenas.

ADAMO

Kompreni la aludon vin tre ĝenas.
La ansergagon sekvas — anserinoj.
Jes, eĉ vi ne esceptas el knabinoj,
al kiu ne imponas kor', nur poŝo,
en kiu ormonero ŝajnas — groŝo.
Vi certe amas riĉan dandan viron.

EVA (*ofendite*)

Mi? Kiun?

ADAMO

Tre verŝajne . . . Kazimiron.

EVA

Kiun? Lin mi ne konas.

ADAMO

Sed ĉu grave,
se li jam vian menson regas rave?
Ho, Kazimiro, al vi loge gagas;
ĉi anseraĉo aglo sin imagas.

EVA

K i u ?

ADAMO

Li filo de l' spicisto urba,
kun naz' kukuma kaj kun kap' kukurba,
barele grasa, orgraveda homo,
kiu ĝiskole naĝas en la luksa bono.

Al la knabinoj li impone plaĉas;
li estas tem', pri kiu ili klaĉas.
Sin dande vesti, mode elegante,
promeni kiel pavo tiel vante,
eĉ labortage grandsinjore festi,
abunde manĝi, trinki kaj digesti
nur povas li, ĉi admirinda viro:
la filo de l' spicisto, Kazimiro.

EVA (*ĉagrenite*)

Komprenu fine, lin mi eĉ ne konas!

ADAMO (*moke*)

Li tamen vian menson forte spronas.
Pri li vi revas nur, eĉ subkonscie,
pli riĉan edzon trovus vi nenie.
Al vi jen tiu viro povus indi,
per silko kaj veluro vin envindi,
trezoron sian ŝuti al vi rave,
kaj servi vin pli ol humile: SKLAVE.
Student' mizera kun li ne konkuru,
sed nur rezignu, sin kaŝante kuru!
Al vi eĉ eble plaĉas ĉi barakto;
ne gravas bark', se estas luksa jaĥto.

EVA (*subite eksplode ridas*)

ADAMO

Ĉu vi mokridas pri la kora tristo?

EVA (*gaje, triumfe ridante*)

Ĉar filon ja ne havas la — spicisto.

ADAMO

Ĉu grave? Nel La nimfo ĝuste same
fabele vivis nur . . . mi diris vane.

EVA

Pro tio? Ĉu ne honte? Min vi mokas.

ADAMO

Ĵaluz' senbaza mokon ja provokas.

EVA

Al Nimfo irul

ADAMO (*proksimiĝante*)

Vi al — Kazimiro!

EVA (*paŝon proksimiĝas al li*)

Ŝi kisos vin.

ADAMO

Atendos vin safiro
kun grasa koro.

EVA

Vin infer' edena
kun nudo logas. Estu do bonvenal

ADAMO

Meger' terura, cil

EVA

Gehena princol

ADAMO

Cin trafos brulŝtipar'!

EVA

Cin dentogrincol

*(Ili jam estas tute proksime unu al alia kaj ilia
kverelemo okazas en ardo)*

ADAMO

Ci brulos torĉel!

EVA

Ci en sulfurflamol!

*(Momente senvorte rigardas unu la alian, poste el
ili ambaŭ erupcias rido. Paŭzo)*

Ĉu tiel komenciĝas ĉiu amo?

ADAMO

Jes, ĝuste tiel. Vorto vorton pelas ...

EVA

Sed geamantoj kveras ...

ADAMO

kaj kverelas.

Traktado sekvos; pac' kun kompromiso.

Sigelas ligon dolĉe arda kiso.

(Subite ĉirkaŭprenas ŝin)

EVA *(cedas siajn lipojn al longa kiso)*

VOĈO DE LA AVINO *(ekstere)*

Hejl! Eva!

EVA *(liberigante sin)*

Lasu. Avinet' min vokas.

ADAMO (*mire*)
Florpolva nomo el Eden'.

EVA
Vi mokas.

ADAMO
Adamo estas mia nom'.

EVA (*mire*)
Adamo.
En ĝi kaŝiĝas vivosenco; a m o .

ADAMO
Ho, Eva, mi sklaviĝis por ĉiam.

EVA *parolo*
Ĉu ~~parolo~~ pli feliĉa vivis jam,
Adamo mia?

VOĈO DE LA AVINO (*ekstere*)
Eva! Venu tuj!

EVA (*jen al la domo, jen al li*)
Jes, jes! ... Mi devas iri ... Jam ĉe l' pomuj',
avinjo! ... Kiam vin mi ree vidos?

ADAMO
De vi dependas.

EVA (*senpacience*) *vin mi*
Kiam ~~mi~~-vin vidos?

ADAMO
Ne scias mi.

EVA

Morgaŭ. Ĉu?

ADAMO

Eble.

EVA

Certel

Do diru: morgaŭ. Ĉu? Ne tempoperdel

ADAMO (*flustre*)

Hodiaŭ.

EVA

Jam neeble.

ADAMO

Mi atendos

ĉi tie ĝis maten'.

EVA

Vi vane tentos.

ADAMO (*petege*)

Hodiaŭ.

VOĈO DE LA AVO

Eva, kie vi malfruas?

EVA

Ĉu aŭdas vi? Eĉ jam la avo bruas.

Avet', ĝis sojlo nur paŝet'! Adiaŭ!

Pri vi mi sonĝos . . .

(Kuras sur la verandon, de tie per gesto ĵetas kison al Adamo)

Vi pri mi?

ADAMO (*postule*)

Hodiaŭ.

EVA (*kapneas kaj iras en la domon*)

ADAMO (*longe rigardas post ŝi, ekstaze*)

Korlula sonĝo, forŝvebanta revo,
kiel super la mar' fluganta mevo.
Ĉu tera anĝelin', fein' ĉiela,
ĉu sorĉe korpiginta penso bela?
Kio vi estas, Eva? Ĉu pro graco
al orfo didonita vivdonaco?
Ah, Eva, en la mond' plej kara por mi,
ni estas destinitaj paron formi;
nin fakte jam mil jaroj geedzigis,
depost perdita Paradizo ligis;
por ree fari tere la edenon
la providenco donis — amkatenon.
Ĉu kulpas ni pri tiu ampostul', se
majesta volo en ni diktas pulse?
(Dum tiu monologo la vesperruĝon sekvis ĉiam pli-
fortiĝanta lunlumo)

EVA (*malfermas la fenestron, kiu situas al la publiko; sekve ŝi ne povas vidi Adamon, nek li ŝin*)
Neniu . . . Jam li iris for . . . Domaĝe.

ADAMO

Por vin meriti, kredu, mi kuraĝe

eĉ sorton igos al indulga mildo.
Fetiĉo mia, Eva, altarbildo,
min kontraŭ vundoj en batal' ŝirmanta.

EVA

En mi baraktas stranga dub' demanda:
ĉu nia renkontiĝo estas vero
aŭ sonĝo nur?

ADAMO

Jen trafis min vespero.
Jam decus hejmeniri.

EVA

Nokto nigras.
Ni faru lumon!
(Malaperas de la fenestro)

ADAMO

La student' remigras . . .
(Iras ĝis la fonto; tie haltas)
Ĉu resti aŭ ne resti? Jen la demando,
kiun Hamlet-e faras la amanto.
La sento jesas, la prudento neas,
sed ĉi avida koro ne obeas.
Do kion fari? Certe artifikaj,
min stulte superstiĉe mistifikaj . . .
Mi provos pridemandi la estonton,
eĉ se butonoj donas la respondon.
(Kalkulante la butonojn sur la jakoj)
Ŝi venos aŭ ne? Diru: Jes! Ne! Jes!
Ho, benata vorto, dolĉa ampromes'!
(Revenas al la arbo)

EVA (*intertempe lumigis la ĉambron kaj revenis al la fenestro*)

Ozonon spiras la arbar', silentas . . .

Sopir' turmentas min, pro sol' mi plendas.

Kie li estas? Certe jam survoje . . .

Ĉu pensas li pri mi? Nu, eble foje.

Al li, nun marŝanta al la urbo,

ci, Lun' afabla, lumu ĉe vojkurboj,

ke li ne mise paŝu kaj ne stumblu,

ne vundu sin . . . Ah, hele brilu Lun' plu.

(*Deŝiras unu el la floretoj, ornamantaj la fenestron*)

ADAMO (*rimarkas la lumigitan fenestron sur la verando, sed tiu fenestro havas kurtenon*)

Jen lampolum' filtriĝas tra l' kurteno.

EVA

Ankoraŭ tuta nokto ĝis mateno.

Li ĵus foriris . . . tempo lante pasas . . .

mi tamen volus scii, kion kaŝas

la tago morgaŭ?

ADAMO (*piedpinte iras sur la verandon kaj provas spionadi al la cambro*)

Mi nenion vidas.

Ĉi densa tol' eĉ ombron ne perfidas.

EVA

Ĉu min li amas?

(*Ŝiras la florpetaĵojn*)

Jes! Nel! Jes! Nel! Jes!!!

Magia vort', konsola korkares'!

(*Rigardante eksteren*)

Li iris for ... Sed dolĉe nun sopiri
je lia ven'.

ADAMO

Neeble nun foriri.
Surlipe kissoifo min alĉenas,
ŝin vokas: venu!

EVA

Amo min katenas.
(Ĝeme)
A d a m o !

ADAMO (*samtempe, ĝeme*)
Aĥ, E v a !

EVA

Liavoĉe vento spiras.

ADAMO

Jen ŝiavoĉe la zefir' suspiras.
(*Rimarkinte ŝin*)
Sed ne. Mem ŝi.

EVA

Ĉu bone vagi sen mi
tra l' lunarĝenta kampo?

ADAMO (*saltante de la verando al la arbetoĵo, kiu staras
sub la malfermita fenestro*)

Kara, jen mil

EVA (*ekkrie*)

Aĥ, mia Di' !

ADAMO (*iom pente*)

Ĉu vin mi trotimigis?

EVA

I o m . . . Ne tro . . . La koro iom strikis,
Sed nun ĝi bruas forte sub ĉemizo.
Eĉ kiell . . . Ne pro timo, sed pro surprizo.

ADAMO

Pardonu! Mi timigis vin, ofendis.

EVA

Kial vin timi? Vin mi ja atendis.

ADAMO

Ĉu vi atendis?

EVA

Kaj atendos ĉiam.
Atendi estas sort' virina. Mi jam
per via kiso viriniĝis. Ĉu ne?

ADAMO (*ekridas*)

Ridinda naivec'.

(*Serioziĝas*)

Sed ne! Ni kune

La saman vojon iras, samon celas
kaj nian ligon sama sent' sigelas.
Vi pravas, Eva, virineto mia;
mi komplimentas kun admiro pia:
virin' kun ĉasta monaĥina virto,
edzin' kun netuŝita kron' de l' mirto.

EVA

Kiel poeto vi poemas al mi.

ADAMO

Al sanktulin' facile eblas psalmi.
Al pilgrimant' plenumu unu peton!

EVA

Kaj kio?

ADAMO

Al la pilgrimant' — kiseton!

EVA

De sanktulino kison ne deziru!
De alta piedestal' ŝi kiel iru
plenumi pekan revon de adoro?
La kiso estus frosta pro — marmoro.

ADAMO

Ne gravas la marmora frosta ravo;
fandiĝos poste ĝi pro arda lafo,
bolanta fajro en la kor' amanta.
Ho, paŝu de l' altar' al mi, ci sankta.
Soifa buŝ' — kiseumajn lipojn svatas.

EVA (*petole*)

Pekulo kara, vin mi tre kompatas.

ADAMO

Kruela ŝerc' — al sanktulin' ne indas,
kiam ŝin pia kor' per nimbo vindas
petante gracon kun humilo ame . . .
Ah, venu, kara, kisu min!

EVA

Ve, vane!

La masonist' min metis, vidu, alte;
mi riskus rompon de flugiloj salte.
Senbrake la virin' duonon donas,
pri plus' aldona la brakum' disponas.

ADAMO

Eĉ sen brakum' la kiso estas spico.

EVA (*ridante eksteren klinas kaj tiel proponas siajn lipojn.*)

Nu, venu! Jen!

ADAMO (*piedpinte klopodas, sed sensukcese kapti la fenestrok^{adon}*)

Tro altas la kornico.

Atingi mi ne povas viajn lipojn.
Damnita altol!

EVA

Aĥ, ne rompu ripojn!

ADAMO (*post paŭzeto*)

Ĉu sola estas vi en tiu ĉambro?

EVA

Jes.

ADAMO

La geavoj? ...

EVA

Ili dormas jam tro

En posta ĉambro ... Kial?

ADAMO

Venu, kara!

EVA (*konsternite*)

Kiel vi pensas?

ADAMO

Jen okazo rara.

EVA

Neeble nun . . . nur morgaŭ . . .

ADAMO

Ne turmentul

EVA

Per dolĉe loga vorto min ne tentul
Mi timas.

ADAMO

Ĉu pro mi?

EVA

Ne! Pro la mondo.
Pro akra lango de l' najbara rondo.
Se oni vidus nin en duop' intima,
pri ni ekestus kalumni' senlima.
El pul' ĝi elefanton farus klaĉe,
honestan puron ĝi makulus aĉe,
ne ĉesus flustri, kriĉi kaj skandali
ĝis povus vidi nin en koton fali.
Ah, pekon nei, veron diri — vane;
eĉ baptoakvon viŝas ĝi pagane.

ADAMO

Nun la malico blindas en embusko;
ĝin trafas katarakto pro l' krepusko;
klačemo mutas, dormo ĝin buŝumas;
oreloj surdas, arboj superzumas;
dum tiel kripligita mond' silentos,
la nokto nin ombrumos, kaŝe tendos.

EVA

Mi tamen timas . . . La diablo viglas,
la pordojn antaŭ ĝi neniuj riglas.

ADAMO

Ridinde kredi tion. En infero
deĵoras nokte — dorme Lucifero.

EVA

Ŝercema bub', vi estas mem diablo,
tentanta ruze flate kun afablo,
kaj tamen, mi konfesas, eĉ se honte,
la koron donis al vi (mi) surmonte
kiam vi min ankoraŭ eĉ ne vidis
dum spionad' . . .

ADAMO

Vi tamen kiel spitis.

EVA

Ĉar spiti decas al knabino. Ĉu ne?

ADAMO

Plej ĉarma, cil! Ĉu ni hezitu? Plu nel!
En ni la Vivo mem nun vervas, bolas,
la lipoj ardas; ili kison volas.

EVA (*kvazaŭ malespere*)

Adamo kara, kison mi proponis.

ADAMO

Sed pro kornico alta vi ne donis.
Jen ankaŭ nun kruela² vi koketas,
dum mi almoze kison, kison petas.

EVA

Aĥ, kion fari?

ADAMO

Venu dol

EVA

Mi timas.

ADAMO

Ĉu min, diablon, dion ?? Vi obstinas
kaj ĝuas, ke vi povas min turmenti.

EVA (*malespere*)

Ne diru tion, kara! Vin turmenti ??

ADAMO

Reĝine en la alto vi fieras
kaj blindas vidi, ke regat' suferas.

EVA

Adam' amata, vi kruela, kara,
riproĉo via estas tro amara
por juste juĝi pri konduto mia,
pri lukt' de sopra pens' kaj sent' pasia.
Vi scias bone, vi ja devas scii,

kiel min ĉio povas emocii,
kion vi faras kaj kion vi diras,
ke min al vi magneta forto tiras ...
sed ... sed en ardo de l' knabina koro
du suverenias: la eduk', pudoro.

ADAMO (*tre sincere*)

Dolore, ke ne povas vi min fidi
kaj kredi, pura amo povas bridi
pasion blindan, aĉan malprudenton,
eviti marĉon, venki fian tenton.

EVA

Min mem mi timas. Do komprenu finel

ADAMO

Mi amas vin ne korpe, nur anime
kaj ĵuras, ke ...

EVA

nur ĵuru ĉe l' altaro,
kie nun dia leĝo faros paro.
Vi svatis min. Ni estas gefianĉoj.

ADAMO

Aĥ, longa tempo pasos ĝis aranĝoj.

EVA

Sed antaŭ Dio, ankaŭ en la koro
mi volas resti inda al honoro.

ADAMO

Reĝino mia estas vi kaj restos,
ĉe via tron' paĝie mi honestos.

EVA

Se estas mi reĝin', vi — reĝo mia;
konservu reĝan dignon harmonia
kaj lasu al mi gardi mirtokronon,
en via koro la reĝinan tronon.

ADAMO

Ĉu kisojn ĉiam vi detenos, kara?

EVA

En kisonad' ne estos mi avara,
sed nun kortega mor' nuligas ŝancojn,
ĉe pord' ĝi staras, kruce tenas lancojn.

ADAMO

Sed en romanoj rolas flanka pordo
ĉe kiu mankas riglo kaj eskorto.
Atendas vin ĉe tiu pord' kaŝita
mem reĝo, la fianĉo ame spita.
Nur por «momento» ... Jen la kompromiso.

EVA

Nu, bone! Por «moment'», por «unu kiso».

ADAMO

Estingi lampolumon ne forgesu!

EVA

Kaj vi konduti noble tuj promesu!
(Iras for de la fenestro. Post momento la lumo es-
tingiĝas en sia ĉambro)

ADAMO *(rapide iras sur la verandon, haltas antaŭ la*
pordo en atenda pozo)

EVA (*aperas plenvestita kiel antaŭe, sed ŝi havas nigran, grandan tukon sur la ŝultroj por protekti sin kontraŭ la nokta malvarmo; iom ridetante, atendeme rigardas al li*)

ADAMO (*kortuŝite kaj ravita de ŝia purkora ĉarmo tre delikate prenas ŝiajn manojn por tiri ŝin al sia brusto*)

EVA (*obeeme, kvazaŭ humile proponas siajn lipojn; longdaŭra kiso*) (*Tre dolĉe*)
Ĉu gustis al vi pli la «nimfo-kiso»?

ADAMO (*ridante*)
Ĉe vi la Nimfo ŝajnas nur — novico.

EVA (*liberigante sin el la ĉirkaŭpreno*)
Nun lasu min! Moment' jam pasis for, aŭ nin eble vidus iu ...

ADAMO (*sin retene*)
Ne ankoraŭ!
Ah, restu, koraltara sanktulino,
min lasu psalmi en ĥorej' de l' sino
kaj antaŭ vin genui, vin adori,
per pompo de pieco vin dekori,
al vi oferi vivon, koran varmon!
En kandellum' sankteja vian ĉarmon
mi vidas ne plu tera, sed ĉiela.
(*Genuas antaŭ ŝi tiel, ke ŝi restos staranta sur la verando, dum li troviĝas sur la du suprajn ŝtupoj*)

EVA (*proteste, malhelpe*)
Adamo ... ne ...

ADAMO

Vi, brila gem' juvela,
vi, anĝelin' fluginta sur la teron.
Kiel mi nomu vin por trafi veron?
En mi cent nomojn rulas sent' inunde,
cent bildojn pentras la admir' korfunde.
Por nomi vin el ili trafas kio?
Fratin', edzino, panjo, mia Ĉio?!

EVA

Ne tiel laŭte.

ADAMO (*iom komike flustras*)

Panjo, mia Ĉio!

EVA (*ridante*)

Infan' ci estas, bube senpripensa ...
Se iu vidus ...

ADAMO

La arbaro densa
kunkulpas; nin protekte kaŝas nun.
Ne tremu!

EVA

Sed rigardu; jen la lun'.

ADAMO

Ĝin baldaŭ tiu nigra nub' vualos.

EVA

Avinjo se vekig^{tiu}os, ~~ŝi~~ skandalos.

ADAMO

Al lito ŝin katenas taga peno;
profunde ŝi dormetos ĝis mateno.

EVA

Sed Avo . . . en koler' ne havas bridon
kaj se li venus . . .

ADAMO

Havas li artriton.

*(Prenas ŝiun manon kaj ekiras kun ŝi malsupren al
la pomarbo)*

Al mia brusto la kapeton klinu,
honeston mian fidu, ho, ne timul
Unua amo mia, ĉaste pia,
nun vartas vin.

EVA *(obeeme, la kapon klinante sur lian bruston, paŝe-
tadas al la benko.*

Adamo, reĝo mia,
se viaj brakoj min por ĉiam ĉenus . . .
protesto mia kvazaŭ nun eksvenus.
(Atinginte la benkon ili ambaŭ eksidas)
Pri am'; ĝistomba estos la simbol' — ni.

ADAMO

Neniu paro plifeliĉos ol ni.
*(Prenas ŝian maldekstran manon, longe rigardas,
tre emociite spiras kison sur ĝin)*

EVA

Eĉ se juneco flugos de ni for,
la amo ĉiam viglos en la kor' . . .

ADAMO

Lilie blanka man', velure mola,
super trezoroj teraj plej valora;
fingretoj kvin, artisme filigranaj,
kiel ĉe ĉinaj pupoj porcelanaj . . .
Ĝi kvinpetalan florkalikon rolas,
per gesto nun sindonon mem simbolas . . .
Ah, flate mola man' en man' kuŝanta!
Kavet' manplata; pelvo mite sankta,
el kiu sur Olimpo dum amuzoj
nektaron povus sorbi dioj, Muzoj . . .
Ĝi ŝajnas nun pladeto alabastra
en la opala lumo fremdoastra;
sur ĉi pladeton mi volonte metus
prezente mian koron kaj mi petus:
rigardu ĝin, esploru pri l' sincero.
Ĝi amas sole vin sur tuta tero.
Pro ruzo hipokrita ĝin rifuzi,
aŭ pro flirtema amo ekjaluzi
la kaŭzoj mankas . . . Vidu senskrupule,
ke vian bildon montras ĝi spegule.
Pri tiu kor' amanta vi disponu,
maneton vian al mi ŝanĝe donu.
Akceptu tiun koron! Amu min,
en mia viv' vi estu — tiranin' ! . . .

EVA (*tre emociite*)

Tirano mia estu vi . . . kun mano
akceptu koron — kun sklavina amo!

ADAMO (*kisante ŝian manon*)

Ci, mia Ĉio.

EVA

Mi la koron gardos,
en la lulil' de «panja» amo vartos
ĝis venos temp' ...

ADAMO

... por nomi vin «edzino».

EVA

Edzeto ... suveren' de mia sino.

ADAMO

En mondo pli feliĉa par' ne estos;
eĉ labortage ni solene festos.

EVA (*ĉiam plivigliĝante*)

Mastrinan robon post la hejmaranĝo
la «sinjorina» sekvos dum dimanĉo
kaj brakon al la brako ni kunplektos,
ĉies rigardo al ni sin direktos,
kiam sur korso ni promenos kune.
Admiros nin la tuta urbo. Ĉu ne?

ADAMO

Al vi per florbuked' mi komplimentos.

EVA

En la kafej' mi punĉotorton mendos,
ĉar hejme nin atendos, ho, edzeto,
praktike tre utila — ŝpardieto.

ADAMO (*kun ŝerca protesto*)

Kun iom da viando tamen... tamen...

EVA

Ne nomu min ŝtonkora! Estu: Amen.
Do mi kuiros . . .

ADAMO

Verkos mi poemojn,
al kiuj donos vi inspiron, temojn.

EVA (*ŝerce*)

Sed eĉ ne risku kanti pri alia.

ADAMO

Pri kiu?

EVA

Pri demonjo kispasia.

ADAMO

Kaj se jes, la demonjo estos vi.

EVA (*kun ŝerctona indigno*)

Demonjo, mi? Ĉu? Kia penso?! Fil
Ĉu en poemo rolu mi «megeron»?

ADAMO

Poeto en poem' evitas veron.

EVA

Respond' dusenca. Ĉu vi pikis, flatis?

ADAMO

Atakon ŝercan ŝerce mi rebatis.
Mensogus aĉe mia fantazio,
montranta feineton eĉ furio.

Por mi vi restos «feinet' arbara»,
ravanta sorĉe min per bel' senpara.
(*Paŭzeto. Subite EVA ekstaras por reveni en la domon*)

EVA
Proksimas noktomez'. Mi iri devas.
Avinjo sin kutime frue levas.

ADAMO (*ekstaras*)
La nokton mi pasigos sur ĉi benko.

EVA
Vi malvarmumos.

ADAMO
Nel Dum nokta vento
nur tiel spiras, gripo min evitas.

EVA (*deprezinte de si la grandan tukon metas ĝin sur liajn ŝultrojn*)
Jen tuko.

ADAMO
Nel

EVA
Pardonu, sed mi spitas.
Utilos certe la protekt' grandtuka
por esti nek ternanta ...

ADAMO
... nek nazmuka.
Dum amindum' ridinde estus terni.

EVA (*butonumante lian jakon*)
Necesas eĉ la jakon strikte fermi.
Do ... ĝis ... revidol

ADAMO

Ĉu vi min forlasas?

EVA

Mi devas iri. Temp' rapide pasas,
sed morgaŭ venos vi, mia — A d o n i s o .

ADAMO (*prenas ŝian manon*)

Momenton, kara.

EVA

Ĉu?

ADAMO

Por lasta kiso.

(*Ĉirkaŭpreninte ŝin per siaj lipoj apenaŭ tuŝas ŝian frunton, poste residiĝas sur la benkon kaj milde igas ankaŭ ŝin eksidi apude*)

EVA (*obeeme cedas, sindoneme premas sin al li, poste ankaŭ sian kapon ŝi klinas sur lian bruston*)

ADAMO (*per la granda tuko kovras ankaŭ ŝin tiel, ke ĝi bone vindas ilin ambaŭ*) (*La tuta senteksta ludo impresas senerotika. Ĝi montras la puran internon de sentemaj gejunuloj, kiujn la unua amo levas el la tagaj trivialaĵoj*) (*Dum la ludo ie, inter arbitaĵoj, ektrilas najtingalo*)

ADAMO

Ĉu aŭdas vi? Ekkantis najtingalo.
Pro ĝia trilo eĥas tuta valo;
eĉ la arbara denso ne plu mornas,
reviglas ĉio, kio tage dormas.
Mil griloj ame ĉirpas sur la kampoj,
parserĉe brilas mil lampiraj lampoj,
zefiro flustras al folio trema
kaj ĉio splena iĝas vervoplena.
Nun spiras, ĝemas, nupte jodlas ĉio.
Eĉ se ni surdas por la simfonio,
ni tamen devas senti sorĉon kore,
ĉar kosma forto regas diktatore.
Ne nur de l' Ter' radias elemente
la vivosenc' tiranta nin torente;
transtere, tra l' eter', en Universo
ĉien emanis Vivo per disperso;
komenco, fino ĉiam nur alternas,
ne estas Morto, sole Viv' eternas.

EVA

Dolore tamen scii, ke aŭtune
kun foliara fal' ni falas kune
kaj nia ard' somera trovas finon,
se vintra frost' penetras en animon.

ADAMO

Fordormas ni, jes . . . sed ĉu krizalidoj
konscias, ke eĉ super piramidoj
en nova ŝanĝ' de l' Vivo papilie
libere flugos ili ampasie?

EVA

Ve, amo, scio, celoj senevite

nuliĝas kun la tera fin' subite.
La homa vivo ŝajnas — sapveziko;
al ĝi sufiĉas eta tuŝa piko
por tuj kreiviĝi stulte kaj kruele,
kiam ĝi iĝis sepkolora bele.

ADAMO

Postrestas tamen Grando, Penso, Brilo;
efikas ili vivaj dum jarmiloj.
La Vivon vidas nur hazarda, vana
hometo, korpe kaj anime nana,
ĉar senti, ami, ĝoji, lukti timas,
por formo vivas ^{de la homo finas} nur kaj form-lin-finas,
sensencon serĉas, trovas ĝin kun certo,
kaj grumblas: «Vivo estas ja dezerto».
Sed ni, amata Eva, en grenero
primiras jam miraklon de l' Mistero.
Tial ni povos lukti kaj jubili,
la vundojn ⁿⁱ vidi, lacon forekzili,
ĉar ni admiras stelojn, herbojn, humon,
ĝis kor' penetri lasas ni la Sunon,
kaj nutras volon per esper', per ĝojo
por doni sencon al surtera vojo.

EVA

Adamo, Eva kial en edeno
al tent' cedante fuŝis per mispreno?
Du arboj antaŭ ili sin proponis,
samloge tiujn arbojn fruktoj kronis
kaj Eva havis tempon por elekti.
Kial ŝi povis fuŝi, eĉ neglekti
Eternan Vivon kun junec' ĉiama?

Ĉu vivi tiam estus same drama?
Kial de l' Scio pomon ŝi alprenis?

ADAMO

Egale, arbojn du la Di' malbenis.

EVA

Ho, vivi, ami, resti ĉiam junal
Kio en tio povas esti puna?
Labori, lukti, havi plenan forton
kaj koni nek kadukon, nek la morton,
ekziston ĝui kaj posedi ĉion . . .

ADAMO

Pri Viv' ne havi eble la konscion.
Terura puno. Esti nur sencele,
vegeti sen interna lum'? Kruele!
Al Vivo la valoron Scio donas,
reĝecon de la Hom' konscio kronas.

EVA

Konscio, scio!! Prozo seke teda,
de materia penso figraveda,
igante naski monstron de l' Sensento.
Nur de altar' puŝita sakramento
fariĝos amo — nur fizika aĉe —
ne homa plu, nur besta. Tre domaĝe!
Scienco ne toleras iluzion;
en Homo ĝi mortigos — poezion
kaj servos por sondado materia
eĉ amo de *Romeo* kaj *Julia*.
La amo juna kaj sentempa estis,
kiun pra-Eva tiam pretergestis.

Eterna Viv' kun Scio devus esti
mem Paradiz', kie ni volus resti.
Ĝi havus nur feliĉajn, junajn homojn.
En lok' de Eva prenis mi *du* pomojn.

ADAMO (*ridante*)

Sed la anĝel' por puni staris preta.

EVA

Ŝi estis tro mallerta, dorme treta.

ADAMO

Virina peko fakte kaj sen dubo
ke el edeno por ni restis — rubo.

*(Ili ambaŭ ekridas. En tiu momento kun bruoj pomo
falas de la arbo antaŭ ili)*

EVA (*timigite*)

Kio? ... Ĉu iu? ... Io bruon faris.

ADAMO

Matura pomo de la arbo falis.

EVA

Ektimis mi ... Ĉu certas vi, ne homo?

ADAMO

Mi diris ja, senkulpa eta pomo.

(Paŭzeto)

EVA

Tre interese ... Vi kaj mi ... ni kune
renkonti nin ja estis tre fortunate.

Eĉ pli! Renkont' por menson tikle sproni
kaj fantaziajn pensojn al ni doni.
Ni, pragenepoj de Adam' kaj Eva,
nun sub pomarbo sidas amoreva
kaj ĉio ŝajnas kiel en — praforo.

ADAMO

Ne, ĉar la arbon benis la Sinjoro,
eĉ pomon faliginte Li donacas.
Ĉu prenu mi?

EVA (*ridante*)

Nel! Dentojn ĝi agacas,
acidas tro por roli «pom' de l' Vivo».
Pro ĝia gusto mortus vivsoifo.
(*Paŭzeto, dum kiu ŝi plipremiĝas al li kaj ankaŭ la
tukon ŝi tiras pli forte ĉirkaŭ sin*)

ADAMO

Ĉu vi malvarmas?

EVA

Ne, sed tiel bone.

ADAMO

Pro vi, mi timas. Vi ja tremas.

EVA

Ho, nel!

(*Paŭzeto*)

Jen via koro tiel lule batas,
kiel la barkarol', kiam ĝi flatas
kaj dolĉe dum silent' per ondbalanco

deziras ravi nin ĝis sorĉa tranco . . .

.
Jen: ti-tak tik-tak E-va mi-a ka-ra.
Ĝi ĉiam skandas saman verson klara.
Ĉu en la kapo sama penso pulsas,
kiun la lula korobat' impulsas?
Ci, kara «tik-tak», vivoritma vorto,
samtakte batu kun mia ĝis morto . . .

ADAMO

Samtaktas koroj, mano en la mano,
Dum ni ripozos, ŝirmos nin la amo.

.
Vi, mia Ĉio, didonita celo,
favore nin protektas la ĉielo,
ĉar vualdensa nuboj tuj alpasos
por peli for la lumon — lunon kaŝos.

.
Jen inter nuboj lun' kaŝludas klaŭne . . .
Ĉu ne? . . . Respondu . . . Ĉu mi pravas aŭ ne?
(*Paŭzeto. Ĉiam pli mallumiĝas*)
Ŝi dormas . . . Dio, kiu supre tronas,
ne prenu for de mi, kiun vi donas.
Mi estas orfa, ankaŭ ŝi orfino . . .
Ci forĝu la animon al animo . . .

.
Mallumas jam. Ni kun dormanta ardo
pasigos nokton sonĝe sub pomarbo.
(*La lasta verso jam aŭdiĝis en plena mallumo*)

(*Tiel finiĝas la UNUA AKTO, UNUA BILDO*)

DUA BILDO

*cicada, tree cricket
cricket*

Sen kurtenfalo kaj -leviĝo transiras la ludo al la Dua Bildo. En la mallumo komence ekbrilas verdlumaj lampetoj de la LAMPIROJ, poste aperas la ĤORO DE ĈIKADOJ, GRILOJ kun fosforeskaj violonetoj kaj arĉoj, faritaj el du simplaj kanostangetoj. Nur ĉe la apero de GNOMOJ, ELFOJ komenciĝas la lunlumo, ĉiam plifortiĝante. ADAMO kaj EVA sidas senmovaj en la vindo de la granda tuko kaj dormas

LAMPIROJ (aperas diversloke inter la arbetoj, poste formas longan vicon marŝantan ĉirkaŭ la pomarbo, fine ili disen lokiĝas kaj ek-ek-briligas siajn lampetojn)

Post suniro, en krepusko
el sub herbo, arbo, musko
lumas lampirlampa bril',
amprovokaj steloj mil.
Saluton, nokto stelal

GRILOJ, ĈIKADOJ (kuras en diversaj direktoj, formas vicon, kantante ĉirkaŭiras la pomarbon, poste dislokiĝas)

Himnon ludas violone
per kanetoj ĉirposone

la cikado kaj la gril';
ame eĥas gaja tril'.
Saluton, nokto bela!

GNOMOJ, ELFOJ (*de du flankoj aperas, ĉirkaŭiras la pomarbron, poste dislokiĝas*)

Elfoj, gnomoj paŝ' post paŝo
svarme venas el la kaŝo;
estingiĝis jam la sun',
loge ridas pala lun'.
Saluton, nokto hela!

ĈIUJ ĤOROJ

La zefiroj flustras flute;
kiel kordoj surliute
vibras sone tigo, branĉ',
tintas kloŝe fruktofrang'. *kloŝo = kelt-plow, cloche.*

FEINOJ (*aperas ŝalvestitaj, turnodancas la pomarbron kantante*)

Dum feina nokta bal'
flirtas silksusura ŝal',
man-en-mane ondas sving'
en la turnodanca ring'
kaj sen brido
gaja rido
tiklospira,
amsopira
eĥas dise
parulkise
onde ronde sen ating'...

ĈIUJ ĤOROJ

... en la turnodanca ring'.

(Komenciĝas turnodanco: feinoj, elfoj formas parojn; cikadoj, griloj ekludas per la kanoviolonoj, lampiroj takte ŝvingas siajn lampetojn, la gnomoj kap-al-tere rulas sin)

ELFOJ, FEINOJ

Saltu kapre, ni ludu;
turnu unu, turnu du!
Ni, feinoj, elfoj are
turnu ope, turnu pare!
Gajaj gnomoj distru nin;
kap-al-tere rulu sin!
Turnu vigle sinbalance
turnu tikle kaptoŝance,
turnu lerte, turnu glite,
turnu spite kisevite,
turnu por ŝtelota kis',
poste krii: «Kison! Bis!»

(La paroj gaje ridetante interkisas, petole tien reen pelas unu la alian)

FAŬNO *(elpaŝante el inter la branĉoj de la arbeto, situanta sub la fenestro de EVA; li tenas ŝalmon en la mano)*

Silentu, pleb' arbara,
eĉ dioj mutas nun,
al pomp' arĝentvuala
radiojn ŝutos lun'.
Tra l' brilo diafana
perfekto de diin'
per belo de DIANA
kaj VENUS ravis nin.

salmo = deŝprando de feino

Sendante sagojn pafe
petole al la kor'
je propra ve' mistrafe
sin vundos mem AMOR'.
Dum Nimfo suverenos,
honoru ŝin salut'!
Plejdece nun konvenos:
jubila mira mut'.

NIMFO (*vualvestita aperas en la dekstra arbetaĵo; ŝiaj movoj, gestoj erotike impresas; ŝi iras la mezon de la libera placeto antaŭ la pomarbo, etendas siajn brakojn al la luno*)

FAŬNO (*ekludas per sia kvinbranĉa ŝalmo kaj ankaŭ dancepaŝe sekvas la movojn de NIMFO dum la danco; liaj movoj esprimas elokvantan amsopiron*)

(*La GRILOJ kaj CIKADOJ ekludas per la kanviolonetoj, paroj de la ELFOJ kaj FEINOJ ne malhelpante ŝian dancadon, kun sinbalanco, gestoj kaj movoj partoprenas en ŝia danco. La LAMPIROJ manovras per siaj lampetoj, sole la GNOMOJ restas kaŭrantaj kaj mute admiras la dancoscenon*)

NIMFO

Nokto de nupto, luno opala,
vin nun honoru danco vuala!
(*Ekdancas*)

Flirte ŝalfaloj ŝvebu alloge,
sube la nudo ardu provoke,
danco inspiru kanti kaj trili,
kore aklami, ame jubili!

Sep vualoj al kaj for
sepnuance en la kor'
sepalterne blovu jam
fajroardon de la am'!

Disen ŝvebas post la fal'
ventflugile la vual':
post unua — muta mir',
duan sekvas — amsopir',
tria — fido, dubo, ĝem',
kvara — sklava amkatan',
kvina — risko, sesa — far',
sepa ligas nin jam par'.

Ĝuo stertoras ĝeme tragorĝe,
vipe al lipoj sorĉe kaj forĝe
pelas la lipojn fandi, ne disi,
sobron ebrie perdi kaj kisi . . .

(Ŝi ĉesas dancadi)

Himnas en vejnoj al vi volupto,
luno opala, nokto de nupto!

*(NIMFO kaj FAŬNO haltas ĉe la pomarbo antaŭ la
benko, sur kiu ADAMO kaj EVA ridetante dormas)*

FAŬNO *(riverencante al NIMFO)*

Ĝis polvo kapon klinas sklavo cia
favoron havi el manet' gracia.

NIMFO *(petole kaj etendante la manon)*

Jen prenu!

FAŬNO

Nur maneton ci proponas?

NIMFO

Nur manon petis ci; jen ĝin mi donas.

FAŬNO (*iom komike*)

Atendis mi pli: kison, ĉirkaŭprenon.

NIMFO (*ridetante*)

Ci, kampa bub', similas nun azenon,
kiun la mastro post labor' finita
per pajlo traktis, ne per fojn' revita.

FAŬNO *fr*

Per serĉofendo punon ci meritas.
(*Li volas kapti ŝin*)

NIMFO (*rifuĝe kuras ĉirkaŭ la pomarbo*)

FAŬNO

Ci vane fuĝas, kison ne evitas.

NIMFO (*rimarkante la dormantan paron*)

For! Homoj estas en proksim'.

For! Ĉiu bone kaŝu sin!

(*La songfiguroj kaŝas sin post arboj, rokoj, arbetoj.* Post longmomenta paŭzo FAŬNO sciivole ŝovas la kapon el la foliaro de arbeto, situanta sub la fenestro de EVA. NIMFO same agas el la dekstraflanka arbeto)

FAŬNO

Nepin' de l' arbaristo

NIMFO

kaj studento.

FAŬNO

Jen, ŝi jam cedis al unua tento.

NIMFO

Kial heziti, kiam amo venas?

FAŬNO

Kaj damna sobro komplezeme svenas.

NIMFO

En homa amo kaŝas sin ja pluso,
per kiu nin ne dotis VENUS, ZEŬSO.
Mi havas tial eĉ envian senton.

FAŬNO (*jaluze*)

De Eva ci envias la — studenton.
Ĉu ne? ... Konfesul!

NIMFO (*kun ŝerca incito*)

Kaj se jes?

FAŬNO (*amare*)

Aĥ, stultel!

Ĉu kun homid' ci trompus min adulte?

NIMFO (*rigardante al la paro*)

Li tenas ŝin, aĥ, kiel dolĉe, vire!

FAŬNO

Ĉu eble eĉ por kiso — laŭdezire?

NIMFO (*laŭte petole ekridas*)

FAŬNO

Nur ridu pri mi, ci perfida, falsa!
Do cia ĵuro estas vorto farsa.

*absolutian solnig -
temporalas*

Se cia koro por la knabo flamos,
mi la knabinon same arde amos.

(*Provoke*)

Mi volas fojnon, jam sufiĉas — pajlo!

NIMFO (*ĵaluze*)

Kiel?

FAŬNO

Ci nomis min azen'.

NIMFO

Kanajlo!

FAŬNO

Kanajlo?! Bone! Mi kanajle ŝtelos;
ĵurrompon cian mi per kis' sigelos.

NIMFO (*batalemo*)

Al ci ne plaĉos la regal' kromfesta,
ĉar eĉ mi, Nimfo, estas rapidgesta.
Se riskos ci, mi devas cin averti,
pro vangofrap' ci povos kapon perdi.

FAŬNO

Negravel!

NIMFO

Ĉu?

FAŬNO

Min ci perfidis fie.

NIMFO

Do bone! (*Montrante al EVA*)

Tie — ci, kaj mi
(*montrante al ADAMO*)

ĉi tie.

(*Ili elpaŝas tute, ankaŭ la ceteraj sonĝfiguroj iom post iom reokupas siajn antaŭajn lokojn*)

NIMFO kaj FAŬNO (*proksimiĝas al la dormanta paro, tie haltas, piedpinte starante rigardas ilin*)

NIMFO

Jen idilia dormo.

FAŬNO

Kiel bela, raval

NIMFO

Ĉu mi?

FAŬNO (*kun troa aplombo*)

Ne... Ŝi!

NIMFO

Montriĝas noble brava.

FAŬNO

Ĉu mi?

NIMFO (*kun troa aplombo*)

Ne... Li!

FAŬNO

Neeble plu toleri!

NIMFO

Ĉu ci hezitas tiun kison ŝteli?

FAŬNO

Nu, ne, sed . . . sed atendi estas saĝe.

NIMFO

Ne saĝe ci kondutas — malkuraĝe.

(*Defie*)

Mi cin ne timas.

FAŬNO (*same*)

Ankaŭ mi ne cin.

NIMFO

Por mi la studento.

FAŬNO

Por mi la knabin'.

(Ili ambaŭ kisdistance proksimigas la kapon, al lipoj de la dormanta paro, sed en la lasta momento FAŬNO kaptas NIMFON kaj longe kisas ŝin. Ŝi ekridas. Je la kiso kaj rido ADAMO kaj EVA vekiĝas. Ili dejetas la tukon. NIMFO kaj FAŬNO rekuras al siaj arbitaĵoj. ADAMO kaj EVA, ĉiu siaflanke, rimarkas la malaperantan figuron kaj sekvas lin kaj ŝin ĝis la arbitaĵo)

ADAMO

Hej, Eva, kial kuri for de mi?!

EVA

Adamo vi kaŝludas kaj ne mi.

ADAMO

Ĉu mi? Ĉe vin kaŝanta arb' mi staras.

EVA

Nel! Antaŭ arbeto nur mi staras.

FAŬNO

Bonega ŝanco...

NIMFO

... por petole ŝerci.

ADAMO

Vi kaŝis vin por igi min nun serĉi.

EVA

Adam', min serĉi vi ja ne bezonas;
se vi etende al mi manon donas.

ADAMO (*etendante sian manon al la arbeto*)

Jen prenu ĝin!

EVA (*agis same*)

Jen mia! Trafu lerte!

FAŬNO kaj NIMFO (*samtempe elŝovas la dekstran manon al la foliaro*)

ADAMO kaj EVA (*kaptante la etenditajn manojn per energia gesto tiras la du sonĝfigurojn, poste ili terurite forpuŝas ilin kaj rifuĝe kuras unu al alia*)

EVA

Aĥ!

ADAMO
La demonjo!

EVA
Kaj infera klaŭno.
(*Post paŭzeto*)
Vi, kiuj estas?

NIMFO
Nimfo mi.

FAŬNO
Mi Faŭno,
pri kiuj vi fabelis posttagmeze.

EVA
Terure, aĥ!

ADAMO
Eĉ plil Ĉu ne freneze,
ke la figuroj de l' mitologio
subite konkretiĝis el — nenio
kaj ili, honorataj iam kulte,
nun vivas kaj ĉirkaŭas nin tumulte?

EVA
Se ĉi inferon povis vi projekti,
vi estas hejme; volu min protekt!
Sed... pri la Nimfo vi mensogis aĉe.

ADAMO
Ĉu mi?

EVA
Jes! Ŝi ekzistas. Tre domaĝe!

NIMFO (*laŭte ekridas kaj kvazaŭ eĥe ĉiuj songfiguroj
ridas kun ŝi*)

EVA (*timigite ĉirkaŭrigardas*)
Ĉi senkorula mond' ĉu ridas pri mi?
Kial? En am' mensogi estas krimi.

ADAMO
Ĉar mian amon al vi ili vidas,
ĵaluzon senmotivan nun priridas.
Necesas citi, vi forgesis certe,
ke Faŭn' pri Nimfo diris jam averte:

«Haltu hom' el bordo transa,
pelo vanas en ĉi sfero;
am' de Nimfo ja senŝanca
restas por la fil' de l' Tero».

FAŬNO
Je dioj de Olimpo! — mia dirol
(*Flustre al Adamo*)
Eĉ en infer' pravigu viron viro,
kiam virino volas nin superi.

ADAMO (*danke manpremas kun FAŬNO*)
Mi dankas.

FAŬNO (*modeste*)
Estis mia devo: peri.

EVA
Ĉar tiel elokvente vi pripledas,
por havi hejman pacon — nun mi cedas.

NIMFO (al EVA)

Pro mi ne indas timi kaj jaluzi;
morteman viron mi ne povas uzi.
Por mortemulo pasas tempo suna,
li jam kaduka^s dum mi restos juna.

EVA

Vin pro junec' ĉiama mi envias.
Feliĉaj vi la Tempon mem defias.
Aĥ, se junecon povus ni konservi,
sentempe povus vivi, june vervi
kaj gardi freŝan ĉarmon en la trajto ...

ADAMO

Sed ve, por Hom' perdiĝis tiu rajto.

NIMFO

Se ĝi perdiĝis, volu ĝin retrovil

Pri tio pensi — vane; vanus provi.

ADAMO

De ŝanco nin senigis — dia volo.

EVA

Por vi sentemp', por ni el temp' nur colo.
Ni rajtas revu nur pri la maleblo,
kiam nin regas amekstaza febro.

ADAMO

La suverena vol', kruise justa,
nin diserigas per patino rusta.

verdiĝis

FAŬNO (al EVA)

Rehavi ŝancon por eterne vivi
vi elokvente povus ja motivi.
Per rava flat' akiru difavoron;
virina ĉarm' moligas eĉ ŝtonkoron.

EVA

Aĥ, ne olimpa dio estas Ĉi nia;
ĉe tiu regas ofte pens' ebria
kaj pro ridet' de terulina vango
forigas li pri sia dia rango.

ADAMO

Severas nia Di' per fera leĝo,
sieĝus vane lin humila preĝo
por eĉ ereton el leĝaro cedi.

EVA

Li igas nur obei, blinde kredi.

NIMFO

Tre strange.

FAŬNO

Strange.

NIMFO

Sed mi ne komprenas:
se Li despote tiel suverenas,
envias vivon mem, de Li donitan,
postulas blindon sklavan, himnon ritan,
vi kial lasas Lin sur tron' ĉiela?

FAŬNO

Sen tia dio Vivo estus bela.

ADAMO (*ŝokite de la penso*)

Aĥ, sakre! Tion pensi jam punendĉ.

EVA

Aŭdante tion, tremas ni jam pente.

FAŬNO

Se tiel estas, mankas eĉ espero.

EVA

Ne tute . . . Kion kreis Li sur Tero,
troviĝas ĉiam, eble nur kaŝite.

ADAMO

Tial la Homo vivas pene ŝvite,
ĉar li baraktas sub severa puno.

Li tial spitas sub la plagoj krudaj,
batalas kontraŭ elementoj trudaj,
esploras ĉion funde en sufero,
ke kreu propran mondon sur la Tero.

ADAMO

Kaj mil fiaskojn ^{*tial*} li neglektas,
mil novajn planojn tial li projektas,
per scipotenc' obstinas li inventi,
ke povu Faton, Morton fine venki.

EVA

Aĥ, Morton venki kaj eterne vivi,

Ne nur sur vanomaro veli, drivil
Jen la sopiro, kiu en ni brulas
kaj revojn, pensojn mil de ni postulas.

NIMFO (*al FAŬNO*)
Kia vivo, kia sortol!
Vere mankas trafa vorto
por esprimi la angoron
kiu regas mian koron.

FAŬNO (*al NIMFO*)
Same min kompatato regas,
helpovolon en mi veĝas.
Mi cerbumas nun pro tio,
kiel helpi kaj per kio?

NIMFO
Kiel helpi, kion fari,
leĝorompon nun ripari?
Ĉu ni povus trovi modon
por distranĉi tiun nodon?
Ah, pripensu, Faŭno kara,
helpon donu pleb' arbara,
volu ĉiuj ni aranĝi
homan vivon kiel ŝanĝi?!

EVA (*al ADAMO*)
La Nimfo ŝajnas esti simpatia.

ADAMO
Mi ĉiam diris, ke ŝi estas tia.

EVA
Vi diris, jes; motivoj diferencas.

ADAMO

Ĉu pro ĵaluz' vi stulte rekomencas?

FAŬNO (*al EVA*)

Ah, ne mankas helpopreto,
sed ĉu estas nun rimedo
for de l' Morto vin ekpreni,
en juneco ĉiam teni?
Ĉar, se jes, mi ĵure diras,
trovi ĝin mi tuj ekiras.

EVA (*klarige al ili*)

Skribite estas, kion Dio kreas,
en nia mondo tio ne pereas.
Du arboj en edeno iam staris;
la leĝorompon Hom' ĉe unu faris.
Nun dank' al spit' obstina li rezulte
per Scio povas venki, krei multe.
La dua arbo restis . . . Jen demando,
surtere kie kreskas nun la planto,
ĉar Viv' eternas, tion ni konstatas,
sed, ve, ni homoj eksterbare vagas.
Necesus do la vivoarbon trovi
por *ĉiam vivi* kaj ne *nur scipovi*.

NIMFO (*al FAŬNO*)

Faŭno kara, ah, amato,
jen la ŝanco por helpado.
Pli facile tion solvi
ja neniuj povas ol vi.
Vi vagadas multmiljare
kampe, boske, enarbare
kaj vi estas la konanto

en la mond' de ĉiu planto.
Urĝe helpi ne hezitu,
en serĉado firme spitu!

EVA (*subite kisas la NIMFON*)
Jen pruv'! Virinon nur virin' komprenas.
Mi vin fratine kisas, ĉirkaŭprenas.

FAŬNO (*flustre al ADAMO*)
Pli frue ŝin ŝi malamis,
pro ĵaluzo arde flamis.

ADAMO (*flustre al FAŬNO*)
Ne miru! Kiam sentoj pleje misas,
virinoj, diplomatoj — interkisas.

NIMFO
Solidare la virino
ĉiam spitas al destino,
ĉar ni havas saman celon:
varti, gardi junan belon.
Ĉiam estas vira devo
servi al virina revo
kaj la mankojn tuj kompensi.
Nia devo — nur elpensi.
Faŭno kara, ek al ago!
Jam ĉinokte, antaŭ tago
revo plenumita estu
kaj ŝi kun li junaj restu!

EVA
Ho, Faŭno kara, ĉiam pli mi sentas,
ke viv' estonta nur de vi dependas.
Konsiloj viaj, certe seneraraj,
disponas jam pri spertoj multmiljaraj

kaj krome vi, amik' de l' geamantoj,
tre bone konas sukajn de la plantoj,
ĉar vi travagis kampojn, boskojn, valojn
kaj vidis eĉ iamajn praĝangalojn.
Do gvidul! Paŝos ni kien vi paŝas,
al loko, kie Vivoarb' sin kaŝas.
Komprenu: vivi volas ni, nur vivi;
sur mortovoj' turmente vivsoifi.

FAŬNO (*post momenta paŭzo*)

Al sopiro tiel verva
sole birdo de MINERVA
povus la respondon doni;
tial ĝin enviis oni.
Sed ĝi mortis, nun surbilde
ĉe libristoj pozas gilde.
Kiel helpi vin kompleze
en arbaro noktomeze?

(*Post paŭzeto*)

Jes, mi pensas, forte kredas,
eĉ hibridoj ja heredas
pli kaj malpli de l' prapatro
la talentojn por la arto.
Mi do volas helpe spiti,
la pranepojn tuj inviti.
STRIGO estas, mortobirdo,
sed kun samaj saĝo, virto;
hibridnepo de l' Noktuo,
sed kun pli da kriĉa bruoj.
Voki lin mi ekrapidigas...

(*Ekiras sur la vojetojn al la arbaro, sed subite li
haltas ĉar supre aperas la proksimiĝantaj STRIGO kaj
VESPERTO*)

Senbezone . . . Lin mi vidas.

(Li ceremonie riverencas antaŭ la proksimiĝantoj)

Jen alvenas Via Moŝto,
eĉ sen voko, eĉ sen poŝto.
Alta gasto nin honoras,
kies vortoj ĉiam oras.
Vin salutas tuta aro
de la plebo en arbaro.

(Li revenas al ADAMO kaj klarigas al li)

STRIGO, jen saĝul' arbara,
geniulo senkompara.
De sciencoj li plenegas,
ĉar meditas, ĉiam legas.
Temposkribon de jarmiloj
tenas, vidu, la flugiloj.
De sur tio li komprenas,
kiam mortohoro venas,
kie, kiu devas morti,
kien la averton porti?
Lin salutu riverence
kaj ne timu! Rekompence
li ekkriĉos kun afablo,
eĉ aŭguros kun kapablo.
Lin demandu, sed kuraĝe;
li respondos tuj tre saĝe.
Granda estas lia kono,
scias li pri l' Vivo, Homo.

(ADAMO kaj EVA riverencas humile)

ADAMO

Saluton al saĝulo de l' arbaro!
Jen antaŭ vi nun staras juna paro
en kies koroj sankta fajro ardas,

sed ili time al estont' rigardas.
Instruu nin pri l' vivo, sorto, celo,
ke ankaŭ nin plenigu via helo.

STRIGO

Mi vin resalutas. Estu do bonvenaj,
por la instruo larĝe komprenemaj.

(Al VESPERTO)

Hej, famuluso, donu mian libron,
kvankam mi konas en ĝi ĉiun fibron,
deziras diri mi erarevite
nur tiel, kiel estas jam skribite.

(Li transdonas la pecon da arboŝelo, tenatan inter
la flugiloj kaj de VESPERTO transprenas grandan libron,
kies folioj konsistas el kolekto da similaj arboŝeloj)

VESPERTO (mokeme)

Ĉar vi imagas vin ja ĉioscia,
modesto de blufulo estas via.

Bluffon

STRIGO (post rektigo de siaj okulvitroj)

La Vivo ŝajnas monstra maro;
sur ĝi la Homo — ludoŝip'.
Ne gravas kvanto de la varo,
nek la kvalito, nek la tip'.
La ŝipo serĉas rodon; fate
ĉe bord' perdiĝas ĉiam cel';
do ondfrapite sortpelate
ĝi velas plu kun dub', esper'
kaj ek laŭtajde ondorajde
de ondosupro al ondvalo
ŝanĝinte ofte revojn trajte,
sed nesciante pri kialo.
Kialon senlimec' ne havas,

(la monstra maro ludas nur)
la ŝipon lulo, skuo trafas;
ĉe ĉiu ondo — aventur'.
La Homo, estro de la Ŝajno,
imagas sin ja suveren',
nur pensas pri la ebla gajno,
disipas forton en la pen'
kaj ek plenvele novacele
nescie pri la ŝiporompo
li drivas fide kaj fidele *sinfidele*
ĝis glutas lin la — ondotombo.

(Paŭzeto. *Li redonas la libron al VESPERTO*)

Jen por la Homo la destino dia.

VESPERTO

Programo monotona, anemia.

ADAMO

Por mi instruo via ŝajnas trista;
parolas same ĉiu pesimista.
De vi atendis n o v o n la imago.

VESPERTO

Pri morto kriĉi estas lia fako.

STRIGO (*iom ofendita*)

Sed kion volis scii vi finfine?

ADAMO

La Viv' eternas. En ĝi kial ni ne?

STRIGO

Pro peko de virino, la unua.

VESPERTO

Aserto jam delonge tro enua.
Eternan Vivon volu simple mendil

STRIGO

Freneze! Ĉu ne eblas pli pretendi?!

VESPERTO

Kial ne? En l' arbaro ĉio eblas,
se koroj flamas, kapoj arde febras.

STRIGO

Al la maleblo strebi, ĉion spiti,
eĉ Morton superruzi kaj eviti
ja estas superhoma ambicio.
Neeble rompi leĝojn de la Dio.

ADAMO (*iom moke*)

Dum pluva tag' galoŝojn prenas oni.
Pri via sci' ridinde fanfaroni,
ĉar via saĝo sengaloŝe trotras;
en koto via scio tuj — bankrotas.

VESPERTO

Galoŝojn prenu do, li rekomendas.

STRIGO (*kun aplomba digno*)

Je vort' ofenda la saĝul' silentas.

(Al ADAMO)

La suno ja aperas eĉ sen voko,
sen stulta kikerik' de vanta koko.
Nenio ĝin haltigas surorbite.
La suveren' sterkeja tamen spite
persistas pri sia collarĝa vero:

kokkrio portas lumon al la Tero.
La vanta homo same agas, bruas
pensante, sen li Vivo ne plu fluas.
En tiu vanto kaŝas sin la stulto homa,
ke tedas lin ekzisto monotona;
ĉi vanto tiklas lian fantazion,
por eternigi sin li kreas ĉion,
ĉar lin tre tedas «faktan veron» porti,
ke Vivo estas: naski, manĝi, morti.

VESPERTO (*al ADAMO*)

dewarf

Piediranto strebas super nubojn
por trovi pruvon, per ĝi peli dubojn.
Desupre nanaj ŝajnas Homo, Tero,
ne konkretiĝas la serĉata Vero.
Alterne Kreo, Scio nur varias:
kredant' ne kredas, la saĝul' ne scias.
Jen ĉe la fino la rezulto nula:
blindula palpo en la dens' nebula.

ADAMO (*amare*)

clowno, jester

Al vi erare estus turni min do,
pajacoj nigraj de l' eterna blindo.
Doktrinoj de l' noktmez' nur ombron konas,
la helaj pensoj en mallumo dronas,
ĉar kiel talpo, havas unu celon:
por si subtere bori — saktunelon.

EVA

Adamo, lasu! Mi tre ofte spertas,
virin' en petoj pli ol viro lertas.
Mi provos en pli milda lingvo diri,
al kio Amo igas nin aspiri.

(Al STRIGO)

Aĥ, saĝulo granda, Strigo,
jen mistero, jen mistiko
— vi ja scias — ĉion regas,
en la menso penson vekas.
Mi ne volas al vi flati,
tamen povis mi konstati,
via saĝo funden sondas,
se pri io vi respondas.
Junan vervon do pardonu,
kaj atenton al mi donu!

STRIGO (*flatite*)

Tio sonas alispece . . .
De mi estus tre maldece
vin rifuzi, ne aŭskulti,
aŭ revenĝe vin insulti.
Do parolu kaj sen timo;
mi ĝentilos al virino.

EVA

Iam ie kreis Dio
tutan mondon el — nenio.
Li ekpensis sesatage
ion formi skulptoage.
Koton knedis Lia mano
kaj pretiĝis jam — Adamo.
Plaĉis ŝajne tiu tipo,
ĉar Li el *adama* ripo
kun-inspiro milda, reva
skulptis plu; pretiĝis — Eva.
Por kreado pretis krono
kaj li nomis ilin — Homo;

enspirinta la «Bonvenon»
metis ilin en edenon.

STRIGO

Ankaŭ mi, jes, tiel scias,
vi de vero ne devias.
Regas nun min la scivolo,
kion celas la parolo?

EVA

La edeno Homon ravis.
Ĉu Li scion, vivon havis?
Tre verŝajne tiel estis,
ke la Homo nur — ĉeestis.
Pri la belo de l' edeno
al li mankis la kompreno.
Homo vagis senkonscie,
gape vidis ĉion ĉie.
En eden' du arboj staris,
kiujn Dio plante faris.
Homoj al la arboj paŝis.
Kreosenĉon ili kaŝis:
SCION kaj ETERNAN VIVON.
Tuj scivolon, vivsoifon
ili vekis en la Homo,
sed avertis leĝordonon:
«Se vi tuŝos ties fruktojn,
vi suferos punon, luktojn».
Homo tamen leĝon rompis
kaj la frukto lin *ne* trompis;
per ĝi venis scio, kreo,
povo, celo — ve, pereo ...
Sed la Scioarbo restis,

eĉ de tiam ĉiam kreskis,
superombras nun la Teron
kaj penetras en eteron.

VESPERTO

Ŝi parolas ne malsaĝe.

STRIGO

Interese, tiaaĝe
tiel pensi, vervi, pledi;
tamen peke estus kredi,
Scio povis tie manki,
Homo povas pro ĝi danki
ne la Dion, sed Satanon,
kiu tentis ja Adamon.
Jam mi vere tre scivolas,
kion fakte nun vi volas?

EVA

La Vivarbo ĉu pereis,
kiun same Dio kreis?
Fine kie ĝin ni trovas?
Nun respondu, se vi povas.
Ni sen timo leĝon rompos,
frukto same nin ne trompos,
ĉar en ĝia pulpo kerna
kaŝas sin la VIV' ETERNA.
Jen demandoj, jen la peto:
ĉu ekzistas nun rimedo
ĉiam esti juna, sana
kaj plenforte resti sama?
Eva povis mise fari,
sed *mi* pretas por ripari.

Ĉar mi fidas vian saĝon,
tial havis mi kuraĝon
vivosopiron interpreti,
vojmontridon de vi peti.

VESPERTO

Nestas en demand' — logiko.
Do cerbumu Majstro Strigo!
Lasi ŝin nun sen respondo
por vi estus — granda honto.
(Paŭzeto)

STRIGO

Vere, vane mi cerbumas,
en la kapo nun mallumas.
Birdo de la Mort' sensenta
ja ne estas kompetenta
per la Vivo vin stimuli,
sole kriĉi kaj ululi ...
Sed, ĉar tiel min vi fidas
kaj por vivo tiel spitas,
riske faros mi inviton,
sorĉe vokos tuj Spiriton.

*(Disetendante laflugilojn li danĉpaŝe faras magian
cirklon, poste saltinte el ĝi li mistike gestadas dum la
sensencaj magiistaj sorĉovortoj)*

Bali... Bila... Bolu... Bulo
Tero krevu en nebulo!
Rati... Rita... Roti... Rito
Ĉin mi vokas — Terspirito
Dani... Dina... Done... Deno
kiu vivis en edeno.

(Ventmuĝo, tondro, la tero fendigās antaŭ la pomarbo interne de la magia cirklo kaj inter fumo kaj fajroflamoj aperas la SPIRITO, longbarba monstro. La ceteraj songĝifuroj ĵetas sin sur la teron. Nur ADAMO, EVA dekstraflanke kaj STRIGO, VESPERTO aliflanke restas starantaj)

STRIGO (kun profunda riverenco kaj per unu flugilo kaŝante sian kapon)

? | Spirit', honoru cin salut', | ?
vortigu cia morna mut' !
Respondu rekte al demand' :
kie troviĝas — Vivoplant',
fruktanta iam en eden' ?
Du prageidoj staras jen
por rompi leĝon, iri jam
sur voj' de Eva kaj Adam'.

SPIRITO (levante la manon montras jen al la juna paro, jen al la pomarbo)

Viser ĉassuk onpros oif
porĉi ames tised kunjun
enar bopul sasti aviv
senmor tajpov osres tinun
kukuk kuko lasig nostuj
kajtem pahal tospor moment
dopre nupom onde pomujo
kajres tosju najkor posent.

(Li ree subteriĝas, la fendo rekuniĝas. La songĝifuroj ree leviĝas. Paŭzeto)

EVA

Animo, korpo en mi froste tremis.

ADAMO

En mi simile . . . sed mi ne komprenis.

VESPERTO

Ĉu vi ne scias, ĉiu sorĉokulto
enhavas ABRAKADABRON de l' stulto?
Atentu bone! Sekvos tuj saĝulo
kaj donos sencon al senseca nulo.

STRIGO (*solene pozante*)

mouldy | La Spirit' de tiu arbo |
| kun la longa ŝima barbo |
| al demando tuj respondis, |
| sed Li ruze vortojn tondis. |
| La enhavo ne surprizu; |
| ĉiun vorton kapen ĉizu, |
| ĉar klarigi mi jam pretas, |
| liajn vortojn mi ripetas: |

«Vi serĉas sukcon pro soif'
por ĉiam esti, sed kun jun' . . .
En arbo pulsas tia viv':
senmortaj povos resti nun.
Kukuk' kukola signos tuj
kaj Tempo haltos por moment';
do prenu pomon de pomuj'
kaj restos junaj — korpo, sent'».

ADAMO

Akceptu dankon, Strigo, pro komplezo.

EVA

Mi pretas jam . . .
(*Ŝi volas preni pomon*)

STRIGO

Atendu ĝis noktmezo!
(*Eva skuiĝas tremete*)

EVA

Mi tremas.

ADAMO

Sen la tuko ja malvarme.
(*Li prenas la tukon de sur la benko kaj sternas ĝin sur ŝiajn ŝultrojn*)

EVA

Nun mi anime tremas kaj ne karne
starante antaŭ sortdecida paŝo.

ADAMO

Ne superfluos tamen la lanaĵo.

EVA

Adam', min ĉirkaŭprenu forte, forte;
mi volas senti vin ĉe mi ĝismorte.

ADAMO (*ĉirkaŭprenas ŝin per la dekstra brako*)

EVA (*tre strikte plektas sian maldekstran brakon kun la lia kaj tiel aranĝas, ke la tukego ankaŭ liajn ŝultrojn protektu; ŝia dekstra mano estas aglibera*)

Jen tiel, tiel . . . prem' de via brako
pliigas la kuraĝon por la ago.

FAŬNO (*al EVA*)

Kukuk' kukola horon tuj signalos.

Ne pensu, ke la pomo per si falos.
Do tre rapide kaj tre lerte prenu!

NIMFO (*al EVA*)

Post voĉ' unua ĝin en mano tenu!
Ĝis lasta voĉ' vi devos jam aranĝi,
ke ambaŭ vi el pomo povu manĝi.

FAŬNO

Rapide faru do la distribuon
dum TEMPO haltas nombro la dekduon.

NIMFO (*al FAŬNO*)

Virino, kredu, ĉiam agas lerte,
ne preterlasas solan ŝancon certe
konservi Belon, Junon, porĉiame.

ADAMO (*al EVA*)

Mi dubas ...

EVA (*riproĉe*)

Ĉu hezitas vi *adame*?

ADAMO

Pripensi saĝe.

EVA

Dume TEMPO pasos,
pro vira prokrastem' eĉ ŝanco falos.

STRIGO

Li eble pravas ... Sed nun mi rigardas,
la arbotrunkojn kian skribon gardas.

(*Paŝas al la pomarbo, tre rigore esploras ĝiajn
ŝelosulkojn*)

ADAMO kaj EVA (*ĉirkaŭprenante unu la alian staras sub kliniĝanta branĉo de la pomarbo, de kiu pendas facile atingebla pomo*)

(*Momenta silento, post kiu subite eksonas tre lanta-takte la kukuado de kukolo. La sonĝfiguroj rigidiĝas en tiuj pozoj, kiujn ili havis en la momento de la kukuado*)

EVA (*rapidgeste deŝiras la pomon*)
Mi prenas.

ADAMO
Nel Mi timas; sekvos pun'.

EVA (*elmordas peceton da pomo*)
Mi riskas... Kia suk'!... Kunmanĝu nun!

ADAMO (*elmordas peceton da ĝi*)

STRIGO (*terurite*)
Atendu!

EVA
Jam malfrue!

STRIGO
Ah, terure,
ĉar ŝelosulkoj formas skribon sure.
La tempĉizitaj vortoj jen avertas:
MANĜINTO PEKA VIVON, TEMPON PERDAS.

EVA
Mensog'! De nun ni junaj povos vivi
sen morta fino...

STRIGO

... kaj je VIV' soifi.

ADAMO (*lamente*)

Mi diris: sekvos puno. Nun ni spertas,
ne nur edenon, VIVON, TEMPON perdas
denove homa par' pro pomo de l' virin'.

EVA

Adam', la vortoj ne timigu vin!
Cirkulas sang', amdikte batas koroj,
ni vidas ĉion en proksim', en foroj,
la kisdeziro lipojn loge vokas,
mil vivaj faktoj pri l' verdikto mokas,
nin vivaj vindas eĉ la tuk' patrone.
Ni vivas, vivas en eterno!

STRIGO

Ho, ne!

De VIVO, ve, al ESTO vi transsaltis;
eterne por vi VIVO, TEMPO haltis,
ĉar inter VIV' kaj TEMP' troviĝas ESTO.
Esence: nefinita dia gesto.

ADAMO

Mi ne komprenas ... ESTO estas gajno
de l' vivo porĉiama.

STRIGO

Nura ŝajno.

Senmorta lok', senviva stat' — nur esti,
sen partopren' pri ĈIO nur atesti,
kaj migri sur vojet' manstreĉe largâ,
senpove senti nenifaron ŝargâ;

nek retroiro, nek progreso eblos,
nur memorpovo foje-foje febros.
La puno: vidi VIVON preterkura
sen eblo agi en la ESTO nura,
ĉar Penson ne plu sekvas la Plenumo.
Senfruktaj restos vi . . . Terura puno!
De leĝoj universaj vi ekstere
t r a e s t o s milojn da jarmiloj tere.
ESPERO mem, restinta dia graco
post edenperdo, mankas en ĉi spaco;
nek vivi kaj nek morti povos vi jam.
ETERNA ESTO ĉesas ja — neniam.

EVA (*arde ĉirkaŭprenante ADAMON*)
Juneco, ama sento tamen restas.

STRIGO

Por vi en tio — dia graco nestas.
Ĉar mankas jam ESPER' por reve spiti,
konsole restas SENT', se VIVON vidi
vi tro laciĝis . . . SENTO, sed sen fazoj,
en la dezert' de l' ESTO la — oazo.
(*Paŭzeto*)

EVA

Mi tre soifas.

ADAMO

Al la fonto irul!

EVA (*ŝi dezirus liberiĝi el la tuko*)
Adam', neble! Iru vi! Kuntiru!
Kunvindas strikte nin ĉi tiu tuko!

ADAMO

Dek paŝoj nur ĝis refreŝiga suko.
Samtakte paŝu: unu, du, tri, kvar, kvin . . .

EVA (*tre dolĉe*)

Ĉu vi min amas?

ADAMO

Eĉ adore nur vin.

EVA

Ĉu vi pardonas mian senpripenson?

ADAMO

Negrave plu!

EVA

Pro vi mi perdis menson,
pro vi, por vi mi volis resti juna,
eĉ ne pensante pri la sekvo puna.
(*Ili atingas la fonton*)

ADAMO

Nu, jen la fonto. Ĉerpu per la mano!

EVA

Ni kune tostu je eterna amo!
Ĝi estu tiel kristalbrile klara,
kiel ĉi akvo!

ADAMO

Tia restos, kara.
(*Ili ambaŭ sammove kliniĝas super la fonton por
ĉerpi el ĝi. En tiu momento la lunlumo malheliĝas kaj*

*timiga ventomuĝo trazumas, eksonas longa ridego.
Fulmo zigzagas kun tondro en la fono. La sonĝfiguroj
diskuras, malaperas kaj el la fonto leviĝas SKELETO)*

ADAMO kaj EVA (*terurite ekkrias, rifuĝas sub la arbon*)

EVA

Rifuĝu!

ADAMO

Kuru!

EVA

Kien?

ADAMO

Sub la arbon.

EVA

La Vivoarbo donas certan gardon.

*(Ili atingas la arbon kaj eksidas sur la benkon en
sama pozo kiel ce la fino de la UNUA BILDO)*

ADAMO

Ridinde estus timi mortan finon;
la Morto havas tempopelerinon. | *pelerino = capo, kofhat*
Por ni la TEMPO haltis, ne plu estras.
Ĉi tie en *sentempa* spac' ni estas.

EVA

Vi pravas. Ni triumfis super Morto.
Juneco estas ĉiam venka forto,
la sola, kiu rajtas suvereni,
standardon de l' ETERNO alte teni.

ADAMO (*tre ameme*)

Spegulo, ci, en kiu sin rigardas
animo mia, montru kiel ardas
en mi la revteksanta vira amo!

EVA

Spegulo mia estas ci, Adamo.

(*La SKELETO subeniĝas en la fonton, ĝia ironia
ridego formorte mallaŭtiĝas. La scenejo perfekte mallu-
miĝas. Kurteno falas*)

DUA AKTO

UNUA BILDO

Ĉambro de la GEAVOJ. En la fono meze pordo. Super ĝi remburita aprokapo sur la muro. Dekstre kaj maldekstre de la pordo po unu fenestro kun malfermitaj ĵaluzioj. Tra la fenestroj oni povas vidi arbetaĵojn, *fenestro* } abiojn sur montdeklivo en sunbrila vetero. Antaŭ la dekstra fenestro staras granda tablo kun tri apogseĝoj. Super la tablo pendas de la plafono — granda petrollampo. Kolora tablotuko kovras la tablon; sur ĝi teleroj, manĝilaro por du personoj. Dekstre ĉe la muro, proksime al la scenejrando etendiĝas trouzita kanapo. Super ĝi sur la muro pendas breteto por diversaj pipoj, granda pentraĵo, montranta vulpoĉasadon, du pafiloj. Maldekstre ĉe la fenestro staras komodo; sur ĝi diversaj porcelanaĵoj, teleroj, supujo, pladoj k. t. p.; super ĝi sur la muro pendas granda spegulo. Maldekstre antaŭe staras korpulenta kahela forno, kiun triflanke ĉirkaŭprenas alkonstruita ligna benko kun dorsapogilo. *sofo, kano* } Supre sur la forno paradas remburita strigo. La murojn ornamas kelke da pentritaj argiltĉeroj. En ambaŭ fenestroj staras floroj, plantitaj en argilpotojn. La rolantoj de la bildo prezentas antaŭ per siaj aspektoj, movoj fabelece karikaturajn sonĝfigurojn. *dekstra tablo, staco tablo* } Post la kurtenleviĝo nur la AVO estas sur la scenejo. Li sidas ĉe la tablo sur tiu apogseĝo, kiu staras proksime al la muro

AVO (*malpacience tamburas per la kulero sur la tablo kaj kelkfoje rigardas al la pordo*)
Terure!

dish, plate, tray?

AVINO (*pasas en la ĉambiron alportante sur plado du telerojn da vaporanta kaĉo. Ŝi metas la pladon sur la tablon, poste servas per unu telero da kaĉo al la AVO*)

Jen!

AVO (*grumblante*)

Kiam virin' maljunas,
per ŝi la viron Di' duoble punas...

(*Provinte gustumi la vaporantan kaĉon*)

Aĥ! Ankaŭ nun!... Trovarmas tiu kaĉo.

AVINO (*dume eksidas vid-al-vide, prenas la alian teleron al si*)

Ne grumblul... Iom blovu ĝin, viraĉo!

AVO

Viraĉo?!... Nu, vi povas komplimenti
sciante, mi tro mildas por ofendi.

(*Post refoja gustumado*)

Pardonu, sed mi devas diri fine,
se vi kontentis pri tagmanĝo, mi — ne.

Trosalumita sup', legom' sengusta
kaj nun sur kaĉo mankas spico ĝusta.

AVINO (*senresponde manĝas plu*)

AVO (*post momenta paŭzo kaj kun amara moko*)

Mi ne komprenas, ĉu vi nun subite

forĝesis jam kuiru aŭ nur spite
al mia gust', kutimo kelkdekjara
vi iĝis *tre* malice *tro* avara?

AVINO (*tre milde*)
Nu, kio mankas?

AVO (*ironie*)
Nur — suker', cinamol

AVINO (*tuj leviĝas, iras al la komodo por preni suke-
rujon kaj cinamujon; ĉiam milde*)
Pro iom da sukero pretas dramo. | *drama. filmo*
Vi infaniĝis, kara, maljunaĝe.

Avo
Kaj vi?

AVINO
Kompare al vi — ne.

Avo
Domaĝe!

(*La pordo malfermiĝas per si mem. Sur ĝia sojlo
aperas ADAMO kaj EVA, vinditaj en la granda tuko.
Ili kvazaŭ somnambule paŝetante iras tra la ĉambro al
la ĉirkaŭforna benko. Profundiĝante en la reciproka
admirado ili ne rigardas al la GEAVOJ. Ĉe la benko ili
samtempe kaj sammove eksidas vid-al-vid al la publiko.
Post ili la pordo fermiĝas per si mem*)

AVO kaj AVINO (*tute ne reagis al ilia apero, trarigardas
ilin kvazaŭ tra neekzistantoj*)

AVINO (*portante al la AVO la du spicujojn*)
Bonvolu ... sed cinamo malutilas
por la stomako.

AVO (*ĉagrenite*)

Do vi ne konsilas.
Ve, eĉ dum manĝo ĝojon ne plu trovi
kaj ĉiam nur rezigni, tedon kovi ...
(*Rezigne gestas, flankenŝovas la cinamujon kaj
grimacante daŭrigas la manĝadon*)

ADAMO

Ne ĵetas ombron suno ĉezenite;
por ni la sun' de l' Amo stagnas spite,
paliĝas eĉ makul' pro ties ardo,
al ni senombre fluas lumogarbo.

garbo = sheaf

EVA

Vi pravas, ĉar senombra vidas vin mi;
mi volus nun ekstaze kanti, himni
pri kisindezir' surlipe jam tremanta.
Adam', ĉu kiso estas peko granda?

ADAMO

Al koro koron kiso firme ligas ... (*kisas ŝin*)

EVA

...salutas ... dankas ... al persist' instigas.
(*Post ĉiu aserto ŝi kisas lin*)

ADAMO

La kiso en batal' sur kuna vojo
amaron miksas kun miela ĝojo. (*Longa kiso*)
Amantaj koroj povas nur jubili.

EVA (*iom time*)

Se sciuz la geavoj?!-

ADAMO (*surprizite rimarkas la GEAVOJN*)

Scias ili.

Jen, vidu, eĉ Avinjo nin rigardas.

EVA (*mire*)

Jes!... Ankaŭ Avo... kaj li ne petardas||
per sakraj vortoj pro kunesto nia.

*petardo = fajro, cracker,
petard*

ADAMO

Nin kvazaŭ kaŝus cirklo, la magia.

EVA

Ĉu ni aŭ ili fantomiĝis? Provu!
Por min nun (svati) decajn vortojn trovu!

ADAMO (*solene ekstaras, kompreneble kun li leviĝas*

ankaŭ EVA pro la strikta tukovindo)

Sinjoro arbaristo, mi, studento,
humile petas vin pro arda sento,
min obsedanta kaj reganta tute...

AVO (*nerveme al AVINO*)

La pipon serĉas mi jam kelkminute.

ADAMO

Aŭskultu min, ĉar venis la okazo,
ni staras antaŭ vi...

AVINO (*al AVO*)

Sub via nazo,
kiel kutime, ankaŭ nun surtable.

ADAMO

Aferon nian traktu plejafable!

AVO

Nu, jes ... sed kie nun la fajron trovi?

ADAMO

Ho, fajron havas ni por ĉion povi.

AVINO

En via dekstra poŝ'.

AVO

Jes ... Mi forgesis.

ADAMO

Ni jam konsentis, ŝancojn bone pesis
kaj trovis, ke post jaroj ...

AVO (*grumblante*)

Aĥ, tre stulte ...

ADAMO (*ofendite*)

Kiel?!

AVO (*daŭrigante la frazon*)

... vivaĉi longe, lukti multe,
kiam kaduko rompas nian forton.

ADAMO

Sinjoro ...

AVINO (*ĝemante*)

Ĉiu havas saman sorton.

ADAMO

Al mi permesu ŝian manon svati.

AVO (*incitiĝante*)

Eĉ koron vi ne havas por kompatil
Jen, post duonjarcento ni atingis,
ke solidaron tempopas' estingis
kaj kaŭras nun ni en karcer' komuna,
frostante treme dum somero suna.

AVINO (*milde*)

De Vivo ĉiam multon vi pretendis.

Avo

Ĉar Ĝi la bonon ŝparis.

AVINO

Vi ne sentis.

Vi estis dorlotata de mi ĉiam.

AVO (*erupcie*)

Mi?! Dorlotata! Kiel? Diros mi jam:

(*plende*)

dum pro artrit' mi krias, veas drake,
la kuracilon portas vi — limake
kaj traktas la piedoj^N, ah, diablo,
kiel buĉisto krurojn sur tranĉtablo.
Eĥ, uzi vin mi povas por nenio!

drake = dragon

AVINO (*ploreme*)

Jen via danko!

Avo

Min kompatu Dio!

ADAMO (*al* EVA)

Rigardas ili min kaj ne komprenas.

EVA

Kolero eble eĉ blindige premas.

ADAMO

Kompreni geamantojn, tre domaĝe,
ne plu kapablas oni maljunaĝe.

EVA

Eksidu ni je nia vic' atendi.

(ADAMO *kaj* EVA *ree eksidas sur la benkon*)

AVINO (*lamente*)

Pro senpripensa «jes» mi povas penti.
Junecajn jarojn al vi mi oferis,
kapricojn viajn eĉ sen plend' toleris
kaj lavis kaj kuiris hejmlabore,
dum blufis vi en klubo grandsinjore
kaj pave dandis, koke amindumis,
planitan domon en aeron fumis.

AVO (*iom infanece*)

Se Vi riproĉas, ankaŭ Mi riproĉas:
Vi ne al mi, sed al mistik' vin kroĉas
kaj stulte kredas pri influ' de astroj,
dimanĉe larmas pro predik' de pastroj,
al kafrinkantaj inoj dum vizitoj
vi citas el *La libro de l' Spiritoj*,
lamentas, klaĉas, plendas, spitas, ĝemas
kaj ne rimarkas, ke vi ĉiun ĝenas.
Ne tion vi promesis iam al mi!

AVINO

Nek vi al mil . . . Vi povis himni, psalmi
pri via amo granda, eĉ transtomba,
pri tron' reĝina, kunvivad' kolomba.
Promesis vi min surmanplate porti,
sed volis mem en luksa nest' komforti;
promesis vi «edenon sur la Tero»,
mi sidas nun sur sojlo de l' Infero;
promesis vi alporti Lunon, stelojn,
ne helpas lavi nun — tomatbotelojn.
Aĥ, ĉiu viro «de l' kread' la krono»
nur estas vanta koko kaj fripono.

AVO (*tre kolere, erupcie*)

Kokino klukas, koko kikerikas!
Jen naturleĝo, kiun Viv' aplikas.
Ĉu ŝoke aŭ ne, vanas la protesto:
la viro estis, restos ĉiam — estro.

(*Per la piedo li forte ekbatas la plankon, sed tuj
poste ekveas pro la subita doloro*)

AVINO (*vigle leviĝas, iras al li kaj karesas lian dolo-
rantan genuon*)

Karulo mia, ĉu dolore?

AVO

Jes . . . trel!

AVINO

Vi ĉiam pentas, se vi agas estre.

AVO (*trankviliĝante sub ŝia karesado*)

Sed kulpas ci, stulteta bajadero,
starante kontraŭ la edzeta vero.

hinda dancistino

EVA

Adam', mi timas, ili nin figuras;
ni iĝos samaj, ĉar juneco kuras.

ADAMO

Al ni la Vivo, ho neniam, kara,
sin povos montri tiel fiavara.
Se oran blondon jaroj arĝentumos,
la harojn or' memora reorumos;
eĉ tempfenditajn sulkojn ni ne vidos,
ĉar bild' junaĝa en la kor' plu spitos
kaj nia amo pompos — sentas mi jam —
en la anim' triumfe viva ĉiam.

EVA

(*Post paŭzeto*)

Nun ili mutas . . . Venis nia vico.

ADAMO

Ĉu eble?

EVA

Regas nun la — armistico.

ADAMO (*kiel antaŭe levas sin kun EVA, faras paŝon al
la AVO; solenvoĉe*)

Sinjoro arbaristo, mi, studento,
humile petas vin pro arda sento,
min obsedanta kaj . . .

(*Forta frapado sur la pordo*)

AVO (*kun laŭta lojaleco*)

La gast' envenu!

AVINO

Bonvolu paŝi enen!

EVA (al ADAMO)

Poste penul

(La pordo malfermiĝas kaj aperas la groteske korpulenta KAZIMIRO, tia, kia li rolis en la priskribo de ADAMO. Surkape li havas cilindron, en la butontruo grandan krizantemon, en la dekstra mano li tenas florbukedon kaj en la maldekstra grandan rondan skatolon ĉirkaŭplektitan de ruĝa rubando)

ADAMO (surprizite)

Rigardu!

EVA (indiferente)

Kiu estas tiu viro?

ADAMO

Vi ne rekonas? ... Ĉu?

EVA

Nel

ADAMO

Kazimirol

EVA (mire)

Ĉu li?!

ADAMO

La filo de l' spicisto urba,
kun naz' kukuma kaj kun kap' kukurba.

*kukumo = cucumbers
kukurbo = pumpkin*

EVA

Kion li volas? Li ja ne ekzistas.

ADAMO

Li tamen — ŝajnas — vivi nun persistas.

EVA

Li min ne interesas . . . Ni eksidu!

ADAMO

Ni el loĝio komedion vidu!

(Ili reokupas sian lokon sur la benko)

| KAZIMIRO (*kun solena patoso kaj komike*) |

Mi estas Kazimiro,

| la filo de l' spicist', |

la urba kavaliro

por inoj revo, trist'.

Mi rompis, trompis korojn

per dande pompa vest',

disipe ĵetis oron

per grandsinjora gest' . . .

sed, ve, min vunde trafis

sageto de AMOR'.

Ĉi bubo lerte pafis

en mezon de la kor'.

Sendorme nokte tage

pro febre tikla am'

de tiam, ah, image

nur Ŝin mi vidas jam.

Kompatu min, Avino,

bonkore traktu, Av'!

En via hejmosino

sin trovas por mi sav'.

Avo

Respekton al la spicistido riĉa!

ramon,
grocer

AVINO

Vizito via faras min feliĉa.

EVA

Bluful' pozanta eĉ impertinentas.

ADAMO (*ridetante, ŝerce*)

Verdire li impone elokventas.

KAZIMIRO

Ne indus vin persvadi
per sola vortlavang';
por mi knabinon svati
parolu ne nur lang'.
Solfilo, heredonto
post patro estas mi;
do certos la estonto,
se min elektos vi.
Mi havas jam bienon,
sed faktan, ne en Lun',
sur placo — magazenon
kaj monon kun rentum';
sin paŝtas cent bovinoj,
sed propraj, en la val',
abundas servistinoj
ĉe servo dum regal'.
Mi ĉion dote donos
por ŝia eta man',
pri ĉio Ŝi disponos
se pet' ne restos van'.

EVA (*indigne*)

Blufulo!

ADAMO (*ŝerce*)

Jen propono pripensinda!

EVA

Elekti lin mi devus esti blinda.

KAZIMIRO

Kostumoj el Parizo
kun franca tajlorin',
safiro kaj turkiso
ornamos pompe Ŝin,
kaj ravos Ŝin, kredeble,
la rozĝardena dom':
la hejmo, luksa meble,
aldone mi — la hom'.

ADAMO (*incite*)

En lia koro vi tre alte lokas.

EVA

Min ĝuste la «aldono» stulta ŝokas.

Avo

Sinjoro, por profiti la okazon ...

KAZIMIRO (*transdonante la bukedon al AVINO*)

Bonvolu meti ĝin en ŝian vazon!

Avo

... decidi pri l' estont', pri ŝia sorto ...

KAZIMIRO (*transdonante la rondan skatolon*)

Singarde prenul La fianĉa torto,
punĉtorto ...

huvico = punch,
toddy

torto = tart, fruit pie,
fancy cake

EVA (*kun senvola deziro*)

Punĉo!

Punch, toddy

KAZIMIRO

... kiun ŝi preferas.

ADAMO (*iom malice*)

La punĉo jen — la peton dolĉe peras.

AVINO (*transpreninte la torton*)

Kun kremoj! Ĉu? Ho, iam mi tre ŝatis!

AVO (*iom nerve*)

Ne klaĉu nun! ... Sinjor' nepinon svatis.

Honoro granda, sed mi tre scivolas,

kiel por taga pano li laboras?

La riĉo estas kiel la pipfumo;

ĝi iĝas nevidebla en mallumo.

Forbruli povas farm' pro fulmotrafo,

forflui pro inund' la patra havo.

Kion valoros mon', se bank' bankrotos

kaj sengaloŝe vi en koto trotos?

Min interesas, kion vi permane

produkti povas, kion donos pane

al la nepino kaj al pragenepoj?

Ĉu ne ŝi tenos vin per kudrostebaj?

*knudi = to sew,
stebi = to quilt, stitch together*

ADAMO

Tre saĝe li parolas.

EVA

Ho, sendube!

AVINO (*malaprobe skuas la kapon*)

Skrupul' maljuna vidas ĉion rube.

Sinjur', eksidu! ... Tien sur la benkon.

(*Flustre al KAZIMIRO*)

La pesimismo ne alportas venkon.

KAZIMIRO (*deprenante la cilindron faras profundan riverencon antaŭ ŝi*)

Avinjo, koran dankon!

(*Li eksidas sur la benkon flanke de EVA kaj tute proksime al ŝi; la ĝenantan cilindron li metas sur la sinon de EVA*)

EVA (*konsternite rigardas la capelon*)

Ĉu ne stulte?!

Ĉi danda bub' permesas al si multe.

(*Ŝi volas forskui la cilindron el la sino, sed ĝi firme fiksiĝas al la tuko*)

Tre strange ... Mi ne povas ĝin forpuŝi.

ADAMO

Atentu ni kaj lasu ĝin plu kuŝi.

AVINO (*ree eksidas sur sian seĝon ĉe la tablo vid-al-vide al la AVO; post momenta ĝena silento ŝi afable komencas konversacion*)

Vi estas de l' spicisto ...

KAZIMIRO

... la solfilo.

AVINO

Tre brave ... Heredont'...

KAZIMIRO

... de multaj miloj.

AVINO

Kaj via magazeno'...

KAZIMIRO

... surplace staras
kaj ĉiutage ni enspezojn faras.

AVINO

Jes ... La trafiko ...

KAZIMIRO

... kreskas ĉiuhore.

AVINO

Ĉu vi laboras tie?

KAZIMIRO

Nur honore.

AVINO

Kaj tie kion bonan oni vendas?

KAZIMIRO (*fiere pri sia profesio*)

Kion klientoj ŝatas, volas, mendas.

Ĉiam freŝas niaj varoj:

ostroj, fiŝoj kaj omaroj.

Nur peceto el la ŝinko

jam sufiĉas por konvinko,

ke eĉ lardo kaj kolbaso

tre bongustos pro la graso.

AVINO

Vi vendas do por delikata gusto.

Ĉu estas ankaŭ spicoj?

Avo

Vino, musto?

KAZIMIRO

Jes! Mi ĉefe rekomendas,
se vi kvanton jam nun mendas

el likvoro, rumo, brando

por palata tikla frando; } *deliciaj*

se bieron vi preferas,

centbotele mi liveras.

Krome en la magazeno

freŝas kringo kaj krakeno, } *krakeno - croaker*

sin proponas varma flano, } *pancake*

dolĉa kuko, bulko, pano.

Mi ne blufas, mi ne klaĉas,

ĉe ni ĉiu varo plaĉas

kaj la prezon plenvaloras;

eĉ fromaĝoj — rozodoras.

AVO (*al AVINO*)

Li rapidlange povas lerte vendi,
marĉandi same. Ĉu?

AVINO (*responde*)

Kaj arde senti.

Jes, al nepino venis vera ŝanco

fariĝi riĉulino ... Jen avanco!

AVO

Sin pro virtemo sorto rekompencas.

EVA

Terure! La geavoj jam pripensas.

ADAMO
Negrave.

EVA
Vivon tio povus kosti!

ADAMO
Atendu! Poste sekvos mi riposti.
En vortduel' li krevos pro la piko
| kiel la troblovita — porkveziko. | *veziko - bladder.*

KAZIMIRO (*kvazaŭ inspire*)
Ĉe ni ĝuas gastronomo
la dolĉaĵojn el citrono;
krome en kvalit' ni havas
| kio/ la gingivon ravas: | *flesh at the root of the teeth.*
| en vinagro fungo, pruno | *meatroom, plum.*
aŭ prunelo kaj kukumo; | *sloe, cucumber.*
por eviti ĝenajn ruktojn
rekomendas mi la fruktojn:
| ribon, pomon, piron, figon, *currant*
abrikoton kaj persikon;
eĉ daktilo kaj banano
servas rekte al la sano,
| ananaso eĉ post festo | *pineapple*
bone helpas al digesto.

AVINO (*ravite*)
Diversaj gustoj apetiton vekas.

AYO (*same*)
| Frandem' vekiĝas, lango lipojn lekas, | *sweet-toothed.*
sed mi bedaŭre glutas nur — salivon.

AVINO (*persuade*)

Ĉe la spicist' ŝi havos bonan vivon.

KAZIMIRO (*kun pliiĝanta veruvo, ĉiam plirapide, kvazaŭ sen spiropreno*)

Sed ne estu miskompreno,
ĉar en nia magazeno
la kliento trovas ĉion:
poligonon, rizon, grion ?
kaj cinamon, pipron, salon
kaj salaton kaj okzalon, *sorel.*
ajlon, bulbon, petroselon, *panely panely*
napon, rapon kaj mielon,
makaronon, vermiĉelon,
alumeton kaj kandelon
kaj krajonon kaj plumingon,
pakpaperon, vakson, inkon,
nastuketon kaj rubandon,
ŝtrumpon, drapon, ŝtofon, ganton,
kalsoneton kaj ĉemizon,
«en-saketo-la-surprizo»;
por beligo pudron, tuĉon, ?
kisrezistan francan ruĵon. ?
ŝminkostangojn, noktan ŝmiron,
sapon, broson, laĉon, ciron,
kaj por fari fine finon:
eĉ — petrolon kaj benzinon.

(*Kvazaŭ elĉerpate, sed triumfmiene li ekpozas klinante sin*)

AVO kaj AVINO (*kun naiŭa miro samtempe*)
Mirinda magazeno'!

bechweat

*garlic
turnep, rape*

*cloth, fabric,
pantlets*

brush, lace, shoe polish

EVA (*malespere*)

Aĥ, damna lango!

Li venkos nin.

ADAMO (*same*)

Per butikaĉa slango.

AVINO (*konfideme al AVO*)

Pripensu bone, kion li proponas.

Simila ŝanco sin ne ofte donas.

Avo

Vi pravas. Al orfino la feliĉo
malofte venas kun komforto, riĉo.

Por varti ŝin ni iĝis tro maljunaj,
kaj sekvos tagoj pezaj kaj sensunaj,
kiam ni ne plu povos ŝin protekti.

Jes... jes... ni tial devas nun projekti.

(*La AVO profundigas en siajn pensojn, AVINO atendo-
plene rigardas lin. KAZIMIRO senmove sidas kaj
rigardas antaŭ sin*)

EVA (*al Kazimiro*)

Sinjur', absurde... Aĥ, mi ne komprenas,

De kie vi arogan penson prenas
kaj kiel povis vi impertinenti

sen mia «jeso», eĉ eksperimenti
por svato por akiri min edzino?!

Mi ja ne konas vin, nek vi min konas.

Al vi kuraĝon, diru, kio donas?

Al paŝo tia, kiu vin admonas?

(*Post ioma paŭzeto*)

Adam', li ne respondas. Stranga tipo.

ADAMO

2 | Li ŝajnas esti nur skulptita ŝtupo.
a | Satisfakcion mi delonge prenis,
se tiu damna tuko min ne ĝenus;
mi traktus lin per tia vangofrapo,
ke flugus al kukurboj lia kapo,
li povus ĝin proponi: jen legomo!

pumpkin

EVA (*flute kvietigante*)

Ne ekscitiĝu pro kanajlo^o homol
Mi amas sole vin . . . mi restos via,
decidu kiel ajn Aveto mia.

(*Turnante sin al KAZIMIRO*)

pumpkin

1 | Hej, ŝtip', kukurb', ĉu decas tiel muti,
ignore dorson turni kaj konduki
kiel bovido remaĉanta herbon?!
Ne volas mi ripeti la averton:
forprenu ĉi cilindron kaj reiru
al via aĉa magazeno! . . . Nu, irul

AVO (*solene kaj decide*)

Sinjoro estimata, mi konfesas,
la elokvento bone min impresas.
Kiu la langon estras tiel lerte,
tiu en vivo ne perdiĝos, certe.
Skrupuloj miaj do pri respondeco
nuliĝis. Ŝajnas vi ja tia speco,
kiu eĉ sur glacio povas remi,
bovidon el bovino ĉiam preni.

AVINO

Nun saĝe vi parolas, mia kara.

Avo

Ne ĝenu min!... Jes... Nia hejm' arbara
kompare al la via... tre modestas;
en ĝi trezoro granda tamen estas.

Vi tiun perlon volas havi ĝuste,

kiun ni vartis kun zorgem' ĉebruste,

ke ŝi perfektu en mastrumo, virto

por deca temp' je fianĉina mirtø.

inward looked after

myrtle

AVINO

Laŭ miaj pensoj, sentø vi parolas.

Mi do konsentas.

ca' senso'?

Avo

Mi respondi volas

al via peto.

KAZIMIRO (*ekstaras, forprenas la cilindron de sur sino
de EVA kaj solene mienante pozas*)

AVO (*ekstarinte kun aplombo*)

Do, Sinjoro,

rezigni eĉ dolore pri trezoro

kaj cede ĝin donaci al alia,

kio por ni ja estas sun' radia,

ĉe kies ardo koroj du varmiĝis.

EVA (*fere*)

Parolas li pri mi.

ADAMO

Li poetiĝis.

AVO (*daŭrigante*)

Sed sorto de knabino estas viro,
pro kiu revas ŝi kun amsopiro
por propran neston havi, tie ĉarmi.

AVINO (*emociite*)

Parolo via igas min eĉ larmi.

AVO (*daŭrigante plu*)

Tial pri l' perlo, ke ĝi pli pompadu,
ke vi, sinjoro, ne nur vane svatu,
rezignas nun ni kaj ĝin al vi donas.

ADAMO kaj EVA (*ekscitite kaj proteste ekstaras*)

ADAMO (*krie*)

Protestas mi!

EVA (*samtone*)

Sed lin mi eĉ ne konas!

KAZIMIRO (*post profunda riverenco*)

Honoro, la plej granda,
per tio trafis min.
Promeso estu sankta:
mi feliĉigos Ŝin.

ADAMO kaj EVA (*ekiras tiel, ke ili poste povu halti malantaŭ la sonĝfiguroj*)

EVA (*al la AVO*)

Mi lin neniam amos.

ADAMO

Vin estimi,

geavoj, mi ne ĉesos, sed esprimi
pri tio penson diros mi malmulte:
despota miopeco agas stulte.

AVO (*etendante la manon*)
Do Kazimir', bonvenon!

AVINO (*larmante*)

Filo nia!

EVA
Ah, ne! Neniam!

ADAMO
Ĉi decido via
por nia ama ĵuro estas — nulo!

hampster EVA (*al KAZIMIRO*)
Kukurbo danda, ci, spicista mulo! *male*
(*Liberiginte sian manon el la tuko ŝi batas KAZIMI-
RON, kiu ne reagis al la bato eĉ ne tuŝanta lin*)

KAZIMIRO (*kun profunda klino akceptas la etenditan
manon de la AVO. Longdaŭra manpremado*)

ADAMO kaj EVA (*volas malhelpi la manpremadojn, sed
ili sukcesas interveni nur ĝis la manoj, ne tuŝante
ilin*)

ADAMO (*mire*)
Mi ne komprenas.

EVA (*malespere*)
Ho, Adam', mi tristas.

ADAMO (*cerbumante*)

Ĉi fantazikreito ja ne ekzistas.

Por ŝerci lin nur mia menso naskis.

EVA (*plorante*)

Nun pro kreaĵo via ni — fiaskis.

(La manpremado finiĝas. La AVINO disetendas siajn brakojn por ĉirkaŭpreno. Kun swinga elano KAZIMIRO same faras. Tiu muta ludo okazas dum la du postaj versoj deklamataj de

ADAMO (*malespere*)

Mi ne komprenas.

EVA

Por mi tre aflikte.

ADAMO

Ĉi aĉa tuko ĝenas, premas strikte.

(En tiu ĉi momento kvazaŭ tondre, megafonvoĉe eksonas la voĉo de STRIGO. La citaĵo venas el ekster la scenejo tra la spektatorejo. La songĝfiguroj tuj rigidiĝas en la samaj pozoj, en kiuj ili troviĝis antaŭ la eksono de la voĉo. Oni havas la impreson kiel en kinejo, kiam la ludata filmo subite haltas)

ADAMO kaj EVA (*kun alte levita kapo, kiel homoj rememorantaj pri io grava, rigardas al la direkto de la voĉo, sed ilia rigidiĝo ne estas tiel komika kaj pupeca kiel tiu de la songĝfiguroj*)

VOĈO DE LA STRIGO (*iom mistere tirate*)

«Senmorta lok', senviva stat' — nur esti,

sen partopren' pri ĉio nur atesti
kaj migri sur vojet' manstreĉe larĝa,
senpove senti nenifaron ŝarĝa.

(ADAMO kaj EVA *kvazaŭ somnambule kaj samtakte
paŝante trapasas inter la songĝfiguroj netuŝante ilin kaj
proksimiĝas al la forlasita benko*)

La puno: vidi VIVON preterkura
sen eblo agi en la ESTO nura,
ĉar Penson ne plu sekvos la Plenumo».

(*La voĉo eksilentas*)

ADAMO kaj EVA (*samtempe dum la iro*)
«Senfruktaj restos vi. Terura puno».

(*Ili eksidas*)

(*Nun la songĝfiguroj ekvoigliĝas: AVINO kaj KAZIMIRO
reciproke ĉirkaŭprenas unu la alian, la AVO geste invitas
KAZIMIRON al la tablo. KAZIMIRO tre ceremonie eksidas
sur la seĝon, kiun pli frue AVINO okupis. Li metas la
cilindron sur siajn genuojn*)

ADAMO kaj EVA (*en kutima pozo sidas kaj afliktite
rigardas la songĝfigurojn*)

AVO

Eksidu, Kazimir'! Mi portos vinon.

(*Li ekiras*)

AVINO

Mi iros serĉi tuj la — fianĉinon.

(*Ŝi ekiras*)

AVO

Sub la pomarb' vi trovos ŝin verŝajne.

KAZIMIRO

Per ŝi mi havos novan vivon gajne.

(*AVO kaj AVINO foriras. KAZIMIRO restas senmove sidanta*)

(*Paŭzeto*)

ADAMO (*kvazaŭ forgesante pri ĉio*)

Kiam la ESTO montras sin sen celo,
amaron ja dolĉigas — kismielo.

Aĥ, Eva, vin prihimnas najtingaloj,
pro viaj lipoj ruĝas rozpetaloj,
dum vesperiĝo, kiam ombroj ŝvelas,
de vi la sunsubir' purpuron ŝtelas.

(*La scenejo duone malheliĝas*)

EVA

Adam', nur vin mi amas, vin mi vidas,
eĉ se la VIV' malice nun priridas
la junajn revojn de l' komuna vojo.

ADAMO

La karavanon ne haltigas bojo.

(*La scenejo plene mallumiĝas*)

Kurteno falas.

(*Tiel finiĝas la UNUA BILDO de la DUA AKTO*)

DUA BILDO

La scenejo prezentas perfektan duonkupolan ĉambregon, kies senangula rondforma muro havas blukoloran, brile fosforeskan lumon. La rigardanto havas impreson, ke la lumo heliganta la scenejon, kvazaŭ disradias el la muro mem. Dekstre antaŭe estas senkadra pordo, videbla nur, kiam ĝi ŝoviĝas en la muron okaze de aŭtomata funkcio. Tuj apud ĝi troviĝas marmora tabulo kun kvar ŝaltiloj. Super ĉiu ŝaltilo estas elektra lampo, kiu lumas okaze de ŝaltado. La lampoj estas diverskoloraj. En la fono staras granda, kadrumita ekrano, simila al tiu de kinejo. La meblaro konsistas nur el du remburitaj benkoj, kies longoj donas sidlokojn por kvar personoj. Ĉi tiuj benkoj estas starigitaj dekstre kaj maldekstre, ke la sidantoj estu bone videblaj de la publiko, tamen ili senĝene povus rigardi ankaŭ al la ekrano

Post leviĝo de la kurteno la scenejo estas tute sen rolantoj. Ĝi impresas per siaj stranga lumo, kupolformo kaj malpleneco. Post longminuta paŭzo la ŝovpordo malfermiĝas kaj enpaŝas ADAMO kaj EVA, vinditaj en la tuko. Ili samtakte paŝetadas, ĉirkaŭrigardas kaj dum la recitado de la unuaj versoj ili atingas la benkon, kiu staras maldekstre, preskaŭ vid-al-vide kontraŭ la pordo.

ADAMO

Soleca lok' kun lumo fosforeska.

EVA

Kaverno luksa en epok' groteska.

ADAMO

Atendas nin ĉiloke la ripozo
for de l' epoko, for de l' teda prozo,
reganta en la metropolo suba.

EVA

Kiel la talpoj, tra l' vojaro tuba,
subtere ni migradas nun profunde,
ĉar Teron tegas glaciari' abunde.

ADAMO

Jam cento da epokoj preterkuris,
dum kiuj la homaro aventuris
kaj neŝparante proprajn sangon, saĝon
ĝi havis jen plezuron, jen domaĝon.

EVA

Ĉar tajdo de la Viv' senstagne ondis,
detruiĝis ĉion, kion pene fondis . . .
(ili eksidas)
sed tamen' la Progres' senhalte pasas . . .

ADAMO

. . . kaj ESTON mem pli senkolora lasas.

EVA

Pri tio ne konscias nuna homo,

vivanta sub la ter' kiel fantomo
de l' propra memo, iam senté riĉa.

ADAMO

Nur ni en ESTO vidas lin malriĉa,
ĉar pasinteco en ni viva restis.
Li ne plu scias, Homo kia estis.

(La pordo forŝoviĝas kaj enpaŝas ABO, AZO, teknokratoj, kaj NOZA, teknokratino. Ili estas junaspektaj, belaj kaj gracistaturaj, sed kun haroj tre helaj kaj haŭto preskaŭ krete pala. Iliaj uniformoj ne montras diferencon, sole la ŝtatoj mem perfidas la seksojn. Ili parolo estas seke monotona, sen vervaj nuancoj, kaj iliaj gestoj, movoj impresas kiel tiuj de figuroj sur filmo malrapide projekciata. La ludo de la mienoj tre modere varias)

EVA *(rimarkante ilin)*

Jen ili venas . . . Dupiedaj ratoj.

ADAMO *(malestime)*

La maŝinhomaj idoj: teknokratoj.

ABO *(al NOZA)*

Jen centro de la kosma radiaro;
unu el centoj sub la tersurfaco,
ĝi dekmil metrojn kuŝas sube; sekve
mil metrojn super nia metropolo.

NOZA

Tre strange. Mi imagis ĝin ne tia.
Maŝinoj, dratretaro tute mankas.

ABO

Nur ŝajne. Ili kaŝas sin enmure

ligantaj nin al tuta Universo,
al la planedoj, satelitoj foraj.

NOZA

Diigās Homo.

AZO

Jes, kaj per evoluo
de la tekniko sola famuluso
de la Kreanta Vivo li fariĝis,
kun Ĝi konscie kaj science kreas.

EVA (*al ADAMO*)

Bluful' pozanta eĉ impertinentas;
se ŝajno lin favoras, gloro tentas,
li estas preta la mensogon kredi,
por sia falsa ver' obstine pledi.

ADAMO (*kun ĝemo al EVA*)

En teknokrato Homo mem pereas.
Inventis li maŝinon por diigi,
orgojle blufi kaj feliĉi
kaj jen maŝino lin mem maŝinigis,
murdinte sentojn lin al koto ligis.

EVA

Maŝino tiel iĝis suvereno
kaj Homo maŝinsklavo sen sentemo.

NOZA (*al ABO*)

Do vi deĵoras tie ĉi en supro.

ABO

Vi scias, ĉiam mi prirevis tion.

AZO (*al* NOZA)

Delonge do vi interkonatiĝis.

NOZA

Por la centra vartejo ni naskitaj
ja kune estis iam edukitaj
ĝis studoj profesiaj nin disigis.
Lin explorej' de l' kosma radiaro
atendis; min — la nutroproduktejo.

(*Al* ABO)

Ĉu vi progresas en esplor' scienca?

ABO

Jes, kiel asistant' ĉe majstro Xoxo,
la estro de ĉi kosma vivocentro.

NOZA

Ĉu li forestas?

AZO

Baldaŭ li revenos.

NOZA

Kaj kiomaĝa estas majstro Xoxo?

ABO

Ne pli ol tricentjara.

NOZA

Do, mezaĝa.

Centkvindek jarojn pli ol mi mem estas.

EVA (*al* ADAMO)

Ĉu aŭdas vi? La homa viv' longiĝis.

ADAMO

Ĉar rondkurado de la Ter' — kurtiĝis.
Efikas krome la pilola nutro,
kaj moderiĝis la proced' de l' putro.

EVA

Tricentjarulo estas nur mezaĝa!

ADAMO

Kun plilongiĝo venis vivo aĉa.

(Ekĝemante)

Collonga viv' kompare al la nia,
sed tamen vivo, ne nur esto tia,
en kiu penso por plenum' malfortas,
eĉ ne por stagno povon en si portas.

AZO (*al NOZA*)

Hodiaŭ ni atestos pri evento,
cent jarojn atendata de ni ĉiuj.

NOZA

Kaj tio?

ABO

Ni haltigos nian Teron
en kuro al la Sun', al kiu pafe
ni ĝin puŝigis antaŭ jam cent jaroj
por fine venki vintron de Arkturo,
la centro de la Sun' kaj planedaro,
kiun rondiras ni depost komenco.

AZO

Ni vivas en «arktura» vintromezo.

ABO (*al Noza*)

Por distri vin ni montros aparatojn,
kiujn la suba metropol' ne havas.

(Li paŝas al la tabulo marmora kaj turnas unu el la ŝaltiloj. Kolora lampeto ekheliĝas super ĝi)

Jes, «sferofon'». Ĝi peras la muzikon,
eternajn melodiojn de la Kosmo.

(Aŭdebliĝas ne tro varia, monotone ripetiĝanta melodio, ludata kvazaŭ per orgeno vitrosona)

La melodio ĉiam samas monotone,
escepte, se en la spac' perturbas io.

AZO (*paŝante al la tabulo*)

Jen «teroskop'» montranta tersurfacon
por la kontrolo de l' aspekto supra.
Vi vidos tuj! Rigardu al ekranol

(Li ekŝaltas. La scenejo duone malheliĝas kaj sur la ekrano aperas senmova bildo pri pejzaĝo tipe polusa kun neĝo kaj glacimontoj)

Pejzaĝo nuna ĉe la ekvatoro,
sub kiu dekmilmetrojn ni vivadas.

(Li malŝaltas, la scenejo pliheliĝas, sed la ripetiĝanta melodio plu daŭras)

ABO

Jen «astrooskop'». Ĝi aperigas bildojn
pri vivo sur planedoj, satelitoj.
Por scii kies vivon ĝi alportis,
ni devas koni — orbitologion,

traktantan pri kurado de la astroj.
Ni serĉu unu! Surekrane vidul

(Li ekŝaltas. La scenejo duone malheliĝas. Super la ŝaltilo kolora lampeto eklumiĝas kaj sur la ekrano aperas kolora bildo, montranta pejzaĝon kun bestaro, similaj al tiuj de la Tero en la pliocena vivoperiodo de la evoluo)

NOZA

Estaĵoj strangaj kaj ilia mondo
ne vekas en mi *penso* tie vivi.
Kaj kie ĝi troviĝas en la kosmo?

AZO

Respondi ni ne povas. Nur Qu kaj Pi,
servantaj ĉe la astronauĵiko,
informon povas doni. Per fotono
vagadas ili super stratosfero
zigzage ĉie en la universo.

NOZA

Ĉu per fotono? Ne atommotoro?

ABO

Atommotoro elmodiĝis longe.
Nun la foton', motoro de l' lumeroj,
distancon glutas inter la planedoj,
ĉar nur fotono venkas la graviton
de nia Tero facile kaj senriske.

NOZA

Vi diris Qu kaj Pi. Ĉu spacpilotoj?

AZO
Triumfo lasta de l' scienco homa.

ABO
Rezult' mirakla de l' biologio.

AZO
Kreaĵo de l' genio teknokrata.
Por venki interastre la distancon
kaj estre flugi per fotonaj kugloj
inventis ilin — niaj biologoj.
En metropolo ilin vi ne konas.

ABO
En cerbo ^{nestas}granda ĉelar' speciala
hipertrofie ^{granda}nestas por percepti
pri la matematiko absoluta ...

AZO
... kaj krome estas granda avantaĝo
ke ribeladi ili ne kapablas
havantaj nek pasion, nek sentaron.

NOZA
Do voku ilin!

ABO (*premante butonon sur la muro*)
Jes. Mi mem scivolas
pri loko de ĉi tiu fremda vivo.

(La projekciata bildo konstante prezentiĝas. Post paŭzeto aperas tra la forŝoviĝinta pordo QU kaj PI, homonkuloj. Ili ambaŭ havas la alton kaj staturon de okjara infano, ankaŭ vizaĝe aspektas infane junaj, nur

*la kranio de ĉiu estas kvaroble pli granda ol normala,
kaj senhara. Ilia uniformo ne diferencas de tiu de la
teknokratoj)*

ABO (*montrante al la ekrano*)

QU kaj PI, jen astroskopa bild'. Kie,
sub kiu nomo tiun astron havas
indekso registranta de l' astronomo?

QU kaj PI (*proksimiĝas al la ekrano kaj tie haltas por
bone observi la bildon*)

EVA (*terurite de tiu vidaĵo*)

Adam', rigardu! Spirhaltiga bildo!
Ne vidi ĝin nur blindo estus ŝildo.
Ĉi gnomaj monstroj koron terurigas,
la belosenton tiel vunde pikas,
ke eĉ fermiĝas naŭze la okuloj.
Ĉu ili estas homoj?

ADAMO

Homonkuloj.

Jen fuŝlabor' de diletanta dio,
kreinta kriplon el perfekta io.
Por ĉi diaĉo flate tio gravas,
ke la kreaĵ' al li similon havas.

EVA

Ĉu kontraŭ Vivo eble tiel krimi,
defii Dion, pri revengĝ' ne timi?

ADAMO

Homdion ne prijuĝu tro maljuste,
ĉar porporcie estas tute ĝuste,

ke lia verko tiom lin reflektas,
kiom li mem al Dio — malperfektas.

EVA

Absurde tiel vivi! Kia sortol!

ADAMO

Nur taŭgan ilon kovas la retorto.
Ĉi nanaj monstroj en seri' aperas,
en homa mondo tiel kooperas,
kiel la Hom' en mondo *dikreita*
pri la «kialo» mem ne informita.
Senseksaj ili senton eĉ ne konas,
la grandan cerbon nur ciferoj spronas.
En tiu cerb' giganta mankas ĉeloj
por la pasioj, sentoj, foraj celoj.
Homdio tamen estis — kompatema:
li kreis homonkulon — sensentema.

QU

Orb de nul

PI

al par orb sinstre un

QU

Jen!

ABO (*geste forpermesas ilin; la homonkuloj foriras tre la
ŝovpordo*)

NOZA

Rezult' ?

ABO

Qu diris: la orbit' de nulo.

AZO (*klarige*)

La «nulo» estas nia teroglobo.

ABO (*same*)

«al par orb sinstre un» signifas jenon:

al paralelorbit' maldekstren unu.

Do sekve ĝi VENUSO estas en la
pliocena aĝo la l' evoluo.

(*Li malŝaltas la aparaton. La bildo malaperas.*

Li malŝaltas ankaŭ la sferofonon. Muziko ĉesas. La scenejo heliĝas)

AZO

Tre distra estas tiu aparato,
ĉe kies ŝaltbutono jen ondlongoj
indikas periodojn kaj epokojn
de la socia vivo de l' homaro.

ABO

Jen «*telitempograf*». Ĉi peras bildojn,
fotite postrestintajn en sferondoj.
Inventis Xoxo, kiel rebildigi,
kunigi eblas oscilantajn erojn,
kiuj konservis bildojn pri eventoj,
sed por okuloj restis nevideblaj.

AZO

Ĉi aparato servas nin instrui
pri historio de l' homar' antikva.
Seminario nia, plej moderna.

NOZA

Ĉu ĝi funkcias nun?

ABO

Ni povas provi.

(Post ekŝalto la scenejo duonheliĝas kaj sur la ekrano aperas revolucia bildo: demonstracia procesio de senarmilaj gelaboristoj. Kontraŭ ili staras ĝendarmaro. La bildo estas kolora, sed neparolanta. Tempo laŭ la vestaĵoj estas el la XIX-a jarcento)

ADAMO

Rigardu, Eva! Ĉu vi rememoras?
Gefratoj, jam mortintaj, nun aktoras
por nin pensigi pri epok' kruela.

EVA

Jes! Home vivi estas pens' ribela,
aspiri juston, rajton ŝajnis krimo,
provokis ĉiam venĝon de l' reĝimo.

(Surbilde batalo komenciĝas inter la amaso kaj ĝendarmaro. La lasta uzante siajn armilojn pafas kaj masakras la amason jen luktantan, jen rifuĝantan)

AZO

Ĝin oni nomis «la batal' por pano»,
por rajtoj kaj libero de l' popolo.

NOZA

Rimedo stulta.

ABO

Prave, ĉar postrestis

ĉiam venĝemo en la aĉa plebo.
Sed la tekniko radikale solvis
problemon periode revenintan.
Ni serĉu tian bildon inter ondoj!

*(Li malŝaltas la aparaton. La scenejo heliĝas. Li
daŭre ekzamenas la tabelaron de la ondoj)*

EVA

La celo kvankam estis noble alta,
por grizaj milionoj eĉ ekzalta,
ide' majesta promesante grandon,
ve, tamen fine dronis en la sangon.

ADAMO

Mesioj venis kaj Mesioj iris,
mesaĝis pri Promeso kaj — martiris.
La postlasita vero pri Fiktivo
dekmilojn martirigis en la vivo,
centmilojn pelis al batal' socia,
milmilojn ĉenis al revad' pasia
ĝis fine realiĝis la Promeso
por nutri — parazitojn de l' Progreso
kaj... jen dekmiloj iluzion perdis,
centmiloj vanon por la lukto spertis,
milmiloj pentis pri la rev' pasia,
espero velkis sub kalkan' socia,
la Vivo saman melodion gurdis,
sub novaj signoj oni mortis, murdis
kaj dum popolo ĝemis kaj sopiris,
Mesioj venis, iris kaj martiris.

ABO (*al NOZA*)

Rigardu tiun bildon pri la solvo!

(Post ekŝalto malheliĝas la scenejo, sur la ekrano ruliĝas bildo pri samkaraktera demonstracio de la popolo. Ĝendarmaro ne estas videbla. La vestaĵoj similas al neniuj el la ĝis nun travivitaj epokoj de la homaro)

NOZA

Forestas la armiloj de l' potenco,
sed ŝajnas al mi, ke mi vidas samon.

AZO

Jes, en vestaĵoj de pli posta tempo ...

ABO

... kaj survizaĝe sama sovaĝeco
deformas trajtojn sangavide bestaj.

NOZA

Ĉu ili venkos nun?

ABO

Solviĝos plene
problem' socia.

AZO

Jes, laŭvorte plene.

(Surbilde la amaso iom post iom malaperas: unue la vizaĝoj, agitantaj brakoj, paŝantaj piedoj, kaj poste subite la vestaĵoj tute malplenaj falas sur la vojon)

NOZA

Subite kien ili malaperas?

ABO

Solviĝas organismo en aeron.

AZO

Postrestas nur la senorganaj aĵoj
kaj venkis la — dissolve radiaro.

NOZA

Genie inda al teknokratario.

ADAMO (*amare, dolore*)

Kruele sprita, murde farsa solvo,
ke proletar' fariĝis nura polvo;
se liberon, rajtojn, panon pli ĝi petis
kaj pro l' mizer', malsato ĝi sin ĵetis
al la armiloj de l' potenco aĉa,
en lukt' potenco restis fikuraĝa.
Martiroj frataj, kies hekatomboj
montiĝis monstre grandaj pro la trompoj,
viktimoj de ĉiama profitemo,
priridas vin profana rekviemo
de posteuloj jam gigante nanaj.

EVA

Batal' de l' plebo restis ĉiam vanaj.
Ni turnu la okulojn for de l' bildo!

ADAMO

El via kor' radias sorĉa mildo
al vund' de l' homa digno krucumita
kun pov' mirakla de la am' karita.

ABO (*denove malŝaltas la aparaton, la scenejo heliĝas
ĝis refoja ekŝalto*)

Genia solvo, jes, sed malprudenta,
ĉar dezertiĝis urboj, mankis forto

por plu konstrui, kion Homo celas:
konkeri krom la Tero fremdajn astrojn.

Azo

Ni poste plimultigis, kvazaŭ bredis
por sendi ilin per fotonaj kugloj
al astro plej proksima, al la MARSO.

Jen la unua paŝo, triumfiro
etendi homan povon ekster Teron.
Jen bildo, atestanta pro forflugo
kutima jam en nia temp' moderna.

*(ABO ekŝaltas la aparaton kaj la bildo, aperinta sur
la ekrano, montras la enmarŝon de amaso en la konus-
forman kuglon, poste ĝian forpafiĝon en la spacon)*

QU *(aperas en la kadro de la ŝovpordo)*
Uf sal tri, Azo.

Azo

Tuj mi iros al li.

QU *(malaperas)*

Azo

Min Xoxo vokas. Dume vin amuzu!
(Li foriras tra la ŝovpordo)

ABO *(forlasas la tabulon de la ŝaltilaro kaj kun NOZA
transiras al la flanko, kie ADAMO kaj EVA sidas
sur la mezo de la maldekstra benko; al NOZA)*

Por distri vin mi montros aparaton
el tre antikva tempo primitiva.
Ni trovis ĝin okaze de vojboro
en hermetike izolita loko.

*(Li premas butonon sur la muro malantaŭ la ge-
amantoj. Enmura ĝiceto malfermiĝas kaj elsoviĝas
kinoaparato)*

Rigardu, kiom da ridindaj radoj,
kiom da lensoj, tuboj, bildrubando.
Per tio eternigis efemeron
prauloj de la teknokratoj iam.
Ni kompreneble transkopiis tion
por plikomforte aperigi bildon
laŭ plej moderna maniero.

NOZA

Montru!

ABO

Eksidu sur la benkon!

NOZA *(eksidas tute proksime al EVA, kvazaŭ ŝin neri-
markante)*

ABO

Tuj! Ekŝalto.

*(La scenejo duone malheliĝas. Sur la ekrano ekru-
liĝas la kolora parolanta filmo pri la balkonsceno el
ROMEO KAJ JULIA de W. Shakespeare. Ankaŭ ABO ekssi-
das sur la benkon flanke de ADAMO par rigardi la filmon)*

EVA *(agrabla surprizite)*

Adam', rigardu! Kia travivaĵo!
En nuna viv' dezerta jen oazo.
Ĝi reaperas eble nin konsoli.

ADAMO *(ĝoje, emociite)*

Pasinto venis al ni nun paroli.

SURFILME:

JULIA

«Romeo, ho Romeo! Kial do
Romeo vi fariĝis? Vian nomon
forĵetu kaj rezignu vian patron!
Aŭ, se ne tio, ĵuru vin nur mia,
kaj Kapuleto mi ne estos plu!

ROMEO

(Ĉu plu aŭskulti, aŭ jam nun paroli?)

JULIA

... .. Ĉu gravas do la nomo?
Ja tio, kion ni titolas rozo,
sub nom' alia same dolĉodorus.
Romeo do, estante ne Romeo,
retenus sian dolĉan perfektecon
sen tiu nomo. Ĵetu ĝin, Romeo!
Kaj, por ĉi fremda parto de vi mem,
prenu min tutan!

ROMEO

Kore mi akceptas.
Min nomu amata kaj mi rebaptiĝos,
kaj plu neniam estos mi Romeo.

JULIA

Ha, kia homo estas vi, ke tiel
sub noktvualo vi aŭskultas min?

ROMEO

Per nomo, sanktulino, mi ne scias
respondi. Mian nomon mi malamas,

ĉar vin ĝi malamikas. Se ĝi estus
skribita, mi traŝirus ĝin detrue».

(*La filmo ruliĝas plu sen teksto*)¹

NOZA

Iom ridinde! Kial pridiskuti
la nomon, ne tre gravan.

ABO

Jes, ridinde.

EVA (*konsternita*)

Jen ili ridas kaj primokas tion,
kio inspiris iam la genion
priversi kaj prezenti amon junan.

ADAMO (*amare*)

Kondamnas tiu rid' la homon nunan.

EVA

Burlesk' fariĝis el tragika dramo.

ADAMO

Pri geherooj de l' ĝistomba amo
ĉi sentperdintoj ridas, ne komprenas,
ĉar maŝinhomon materio ĉenas.

SURFILME:

ROMEO

«... .. Sinjorino,
mi ĵuras laŭ la sankta luno, kiu
arĝentas jen la pintojn de l' fruktarboj —

¹ Citaĵoj laŭ majstra traduko de RETO ROSSETTI.

JULIA

Ho, ne ĵuradu laŭ la lun' kaprica,
kiu monate ŝanĝas sian rondon,
ĉar eble same via am' varios!

ROMEO

Laŭ kio do mi ĵuru?

JULIA

Ja ne ĵuru.

Aŭ eble ĵuru laŭ vi mem: la sola
idola di' de mia adorado,
kaj mi vin kredos.

ROMEO

Se laŭ mia koro —

JULIA

Ne ĵurul! Kvankam vin mi ĝoje vidas
ne ĝojas mi pri l' nuna amkonfirmo.
Ĝi estas tro impulsa, malprudenta,
tro flagra, kvazaŭ fulmo, kiu ĉesas
antaŭ ol oni povas diri: 'Fulmas!'

(La filmo senparole ruliĝas plu)

NOZA

Fruktarbo, luno, ĵuro?! Kiaj vortoj!
Mi ilin eĉ ne kōmprenas.

ABO

Sensence

babilas ili nur por sin amuzi.

EVA
Terure! Vel!

ADAMO
Terure eĉ milfoje
vivaĉi nur instinkte kaj senĝoje,
ĉar kiu nur al korpa dikto cedas,
neniam amas, sole rason bredas.

SURFILME:

ROMEO
«Ho, ĉu vi tiel lasos min malcerta?»

JULIA
Kia certeco eblas jam ĉi nokte?

ROMEO
La ama intersanĝo de promesoj.

JULIA
Mi donis mian antaŭ ol vi petis,
kaj tamen mi dezirus ĝin rehavi.

ROMEO
Vi volus ĝin repreni? Kial, kara?

JULIA
Nur por aperte doni ĝin denove.
Mi tamen, eĉ doninte, daŭre havas;
ĉar mia fonto estas, kiel maro,
senfunda: samprofunda mia amo.

... ..

ROMEO
Ho bona, bona nokto! Mi ektimas,

ĉar noktas, ke nur sonĝo estas ĉio,
tro dolĉe animflata por realo».

(La filmo senparole ruliĝas plu)

EVA (*emociite*)

Simbolas nin Romeo kaj Julia:
en vi flamante ardas amo lia,
en mi fajreras ŝia amo ĉasta,
al vi fidela ĝis korbato lasta.

ADAMO (*ravite*)

Mirakla am', jarmilojn postvivanta,
ni ĝin primiras, ĉar el fonto sankta
eĉ nun pravige kaj konstante fluas,
kio kun digno de la Hom' kongruas
kaj kio levas lin super la beston.
Pri tio ni ricevis nun ateston.

*(La filmo finiĝas. La scenejo heliĝas. ABO kaj
NOZA restas senmove sidantaj. Ili rigardas antaŭ sin
kvazaŭ pupece)*

EVA

Rigardu! Ili estas strangaj tipoj.

ADAMO

Ne homoj plu, nur movkapablaj ŝtipoj.

EVA

En mut' ilia ĉu efiko nestas?

ADAMO

Mi dubas. Ŝajne ili nun — digestas.

EVA

La vivon ili povas tre enui.
Ni devus ilin pri la am' instrui.

ADAMO

Vi pravas. Jen ideo grandioza!

EVA

Ke ili vidu vivon ne nur proza.

ADAMO (*turnante la kapon al ABO*)

Sinjor', aŭskultu kaj ne estu pupo
kiel ludilo el ĉifon' kaj stupo,
sed verve diru: «Via bel' min ravas».
Komparojn serĉu, kiuj rekte trafas
virinan vanton, kia ajn ŝi estu,
ke ŝi plej belas en la mond' — sugestu!

EVA (*turnante la kapon al NOZA*)

Fratino, kredu, por konkeri viron
vi devas montri al li nur — admiron.
Pri sia saĝo ĉiu vir' fieras;
ĉi tiu vanto certan venkon peras.
Ridetu flate kaj, sen ŝok' pri stulto,
sklaviĝo lia estos la rezulto.

ADAMO (*al ABO*)

Kuraĝe diru, ŝia pura blanko
en freŝfalinta neĝo estas — manko
kaj bluo de l' kupolo jam suferas
pro okulpara blu', ĉar ĝi superas
per brilo fosforeska ĉiun brilon,
al kiu vi ne trovas ja similon.

EVA (*al Noza*)

Al li konfesu, en la viv' neniam
vi trovis por kompreno viron tian,
kiu animon tiel povas sondi;
bonsanca sorto estis lin renkonti,
kaj poste dronu en gapantan muton,
purigu panje de li la — surtuton.

ADAMO

Konsilojn sekvu kaj vi certe gajnos.

EVA

Laŭ ĉi recepto anĝelin' vi ŝajnos.

ADAMO

Kaj tiel plu kaj tiel plu! Aŭdace!

EVA

Li falos antaŭ vi — kapitulace.

ADAMO (*kun pliiĝanta vervo*)

Amanton ĉio ravas: tuta mondo,
la suno, luno, nuba horizonto,
la montopinto kalva, valo verda,
rivervejneto, sablomar' dezerta.
Amanto ĉiam sentas sin feliĉa:
li eĉ sengroŝe sin imagas riĉa,
por li ĉielo bluas, eĉ se pluvas,
la nigra peĉo neĝoblankon pruvas,
la kuproflavo havas orvaloron,
eĉ glacifloro vintre — rozodoron.

EVA (*persvade, entuziasme*)

La amantino vivas en mirakloj,

animo ŝia flugas kiel agloj.
Revante, kvankam vagas ŝi zigzage,
de ŝi la sento celas, trafas sage
al tiu, kiun ŝi perfekta vidas,
kiun atingi ŝi direkte spitas,
ĉar ŝia idealo ĉiam noblas,
eĉ lia peko kiel virt' duoblas;
de ŝi forestas kritikemo sopra
kaj kredas sole al sugesto propra.
La idealo Vivon mem radias.

ADAMO

En tranco blinde la amant' ebrias.
Ĉu kondamninda blindo? Ĉu ridinde?
Ne! Ne! Nur am' protektas varte vinde
la homan koron en la viv' kruela,
ĉar ĝi sugestas la ekziston — bela.

EVA

Sen amo, kio estus viv' sur tero?
Migrado senkonsola en sufero.

(Paŭzeto, dum kiu ADAMO kaj EVA observas la efikon de la persvado. ABO kaj NOZA pupece restas sidantaj. Neatendite tra la spaco ensonas la VOĈO DE LA STRIGO. ADAMO kaj EVA tuj ekstaras, rigardas foren kiel homoj rememorantaj pri io grava)

VOĈO DE LA STRIGO

«De VIVO, ve, al ESTO vi transsaltis,
eterne por vi VIVO, TEMPO haltis».

(La voĉo eksilentas. ADAMO kaj EVA penseme ree eksidas. Paŭzeto)

EVA (*ĝemante*)

Por komprenigi nin ni vane spitas,
ĉar ili nin nek aŭdas kaj nek vidas.

ADAMO (*amare*)

Manstreĉe larĝa vojo de l' imuno
pro pom' ŝtelita estas monstra puno.

ABO (*tre seke*)

Mi pensas nun pri la surbilda paro.

NOZA

Jes, ankaŭ mi.

ABO

Tre strangis la konduto.

NOZA

Jes! Nenormale.

ABO

Jes! Praula stulto.

NOZA

Jes!...

ABO

Jes!...

NOZA

Ĉe ili ja kutimo estis
kompliki simplon.

ABO

Jes!

NOZA

Ĉu min vi volas?

ABO (*seke*)

Se eble.

NOZA

Mi senfruktas. Vi ne riskas.

ABO

Mi genetike estas jam sterila.

NOZA

Do bone! Post deĵoro.

ABO

Konsentite.

EVA (*naive*)

Pri kio temas? Mi ja ne komprenas.

ADAMO (*embarasite*)

Nu... cikoniön peli ili penas.

EVA

Ĉu nova lud'?

ADAMO

Mi pensas, jam — edena.

AZO (*revenas tra la ŝouporo*)

Momento proksimiĝas — Xoxo diris.

La teroskopon ni direktu norden!

ABO kaj NOZA (*leviĝas, transiras al la tabulo de la ŝaltilaro kaj kun AZO ili manipulas per ĝi. La scenejo duone malheliĝas, sur la ekrano aperas polusa pejzaĝo*)

ADAMO kaj EVA (*ne plu atentis pri ili*)

ADAMO

For de l' scienco en la korprofundo
ni vivu plu en am' eterna nun do!

EVA

Ni nutru nin per revoj bagatelaj,
naivaj eĉ, sed neskribeble belaj.

AZO

Laŭ kronometro tuj.

ABO

Atentul

NOZA

Bone!

(Surbilde aperas timiga erupcio de fajrokolono el sub la glacitavolo de la Tero)

AZO

Okazis: nia Tero sur orbito
inter VENUSO kaj MERKURO kuras.

ABO

Centkvindek tagojn daŭros unu jaro.

NOZA

Tre stulte. Tro rapide ni aĝiĝos.

ABO (*iom patose*)

La teknokratoj jen diigis Homon.

(Subite la sonĝfiguroj, kvazaŭ perdinte ekvilibron, forte ekŝanceliĝas)

AZO (*konstatante*)

La Tero ekmoviĝas.

ABO (*samtone*)

Ĝi skuiĝas.

(La bildo sur la ekrano malaperas. Fulmobrilaj lumoj zigzagas tra la malhela scenejo, parto de la kupolo super la teknokratoj fendiĝas, falas enterigante ilin sub sin. En la restinta blue fosforeska lumo nur ADAMO kaj EVA estas klare videblaj. Ili, netuŝitaj, sidas plu en sia kutima pozo kaj tute ne konscias pri la okazinta tragedia kataklismo)

ADAMO (*kvazaŭ amebrie*)

En vi printempo pompas, Maj' eternas,
vualon, el florpomp' teksitan, sternas,
la ĉarmo porĉiama por primiri,
ozonan spiron de l' freŝec' enspiri.
En bonhumor' de Di' kreita, Eva,
reale vivas vi en mondo reva.

EVA (*ridetante*)

Por komplimenti vi neniam lacas,
eĉ se kaprice iom mi grimacas.

ADAMO (*entuziasme*)

Unuafoje vidas mi kaveton
sur vang' pliĉarmiganta la rideton.
Ridetu, Eva! La seren' beligas.

EVA

Volonte, se ridet' vin al mi ligas.

(La scenejo malheliĝas kaj la kurteno falas)

(Tiel finiĝas la DUA BILDO de la DUA AKTO)

TRIA AKTO



UNUA BILDO

La scenejo prezentas dezertan pejzaĝon kun roka montdeklivo kaj kun valeteto sen iaj ajn arbetoj, vegetaĵoj. Meze staras ŝtoniĝinta arbostumpo, el kiu tre maldika branĉeto kun du verdaj folioj etendiĝas supren kvazaŭ mirakle demonstrante pri ekzisto de la Vivo. Malhela, sed tre forta ruĝa lumo regas super la mortinta naturo. Post la kurtenleviĝo, ADAMO kaj EVA, kiel ĉiam junaj, vinditaj en la grandan tukon, samtakte paŝante venas de sur la montdekliva supro, kelkfoje haltas, ĉirkaŭrigardas. Subite kun tondra tono aŭdebliĝas la VOĈO DE LA STRIGO. Dum la citado ili rigardas rigide antaŭ sin.

VOĈO DE LA STRIGO

«De leĝoj universaj vi ekstere
traestos milojn da jarmiloj tere.
Nek vivi kaj nek morti povos vi jam;
eterna Esto ĉesas ja — neniam».

(Post ioma paŭzo. ADAMO kaj EVA daŭrigas la iron malsupren)

ADAMO

Principo stulta «ĉi on por potenco!»
detruis per la povo de l' scienco

la Vivon mem sur Tero. Jen finfine
pereis la Homaro . . . Nun ruine
ĉi kotoglob' sen viva kerno kuras;
per ĝi *nur ni* en spaco kunveturas.

EVA

Edena frukto, la ŝtelita pomo,
la homan scion gvidis ĝis atomo
kaj plenumiĝis la malbeno dia:
«Formortu, Homo, pro scipov' pasial!»

ADAMO

Homaro glora sur Merkur', Venuso,
portita tien per lumerkonusoj,
la komedion eble nun reludas,
ĉar Vivo ĉiam samajn varojn trudas
al sia klientaro tre naiva,
donanta sin mem por valor' fiktiva.
La VIVO translokiĝis; restis ESTO.
Turniĝas Tero en dezerta vesto.
La viv- kaj tempregita mond' forpasis,
eĉ la termitoj lastaj nin forlasis.
La iam rava blua mondkupolo
por ni fariĝis morna en la solo,
eĉ Luno pala, iam tre afabla,
nun apartenas al ekzisto fabla.
Nur tiu varmperdinta ruĝa astro,
kiel pro kolereg' senpova mastro,
al Tero sendas vane la radion:
vivigas ĝi neniun kaj nenion.

EVA

Nur kalvaj montoj, rokoj, sablo regas.
Kadavre terokruston ili tegas.

Ventego foje-foje uragane
dancigas sablon, kirlas monstromane
kaj veas, muĝas, hurlas, agonie ...
pri Morto memoriĝi ĉion ĉie.

ADAMO

Ĉi postretinta signo de la movo
atestas moke pri vanec' de l' povo.
Riveroj, mar' sekigis dum mortfebro;
ostar' surfunde blankas en funebro.

EVA

Ni migris ... migras ...

ADAMO

... migros senespere.
Pro pom' prenita — pun' kruela, verel!
Despota Dio, sen-kompat' ĉiela,
en Esto kial tenas nin sencela?

EVA (*rimarkas la du foliojn*)

Adam', rigardu! Du folioj verde
sur branĉ' de ŝtoniĝinta arbo certe
pri Vivo elokventas ekster Esto.

ADAMO

Forgeso de detrua dia gesto ...
Folioj du ... Tre strange ... Ili verdas.
De kie, orfoj, vi la sukon ĉerpas?

EVA

Simbolas ili nin ... Folioj karaj!
En la freŝeco ili senkomparaj
demonstras pri l' ĉiama juna volo,

sorbanta vivosukon el tavolo,
en kiu homa vido vane serĉas . . .
En koron ili nun vivĝojon verŝas.
Ĉu ne, Adamo? Ĝoje estas vidi,
kiel por vivo ili povas spiti.

ADAMO

Al ŝtoniĝinta stumpo ni eksidu!
Eĉ se la varto vanas, tamen vidu
ni preterkuron de l' printempo lasta
sur formortinta vivokampo vasta.

*(Ili eksidas teren al la ŝtoniĝinta arbostumpo en la
kutima pozo. Paŭzeto)*

EVA

Aĥ, kiel bone senti vin apudel!
Por mi negrave, Esto stagnu krude,
sed preni for la amon Ĝi ne povas.
En vi, Adamo, mi konsolon trovas.

ADAMO

Ci, mia Ĉio, kvankam Temp' detruas
la teran vivon, sed kurente fluas
el via kor' — magia fort' emane,
ke esti kun vi, aĥ, ne ŝajnu vane.
Perturboj de jarmiloj povas morni,
ekstermi ĉion, sed ci restis por mi.

EVA

Du korojn, kiujn ligas arda amo,
eĉ en dezerto nutras ĝojfontano.
(Paŭzeto, dum kiu ŝi ĉirkaŭrigardas)
Ĉu vi konjektas, kion rememoro

al mi nun skizas el pratempa foro?
Al mi, jes, ŝajnas tra nebula denso,
ĉiloke estis iam la — komenco.
Tre strange . . . La imago fantazie
rekreas arbojn tie . . . fonton tie,
mi vidas klare vojon . . . tie domon,
subarbe benkon, kie vi demonjon
priskribis kispasia kaj koketa
laŭ febra revo de student' poeta.
Ĉi loko vekas rememorojn. Aŭ ne?

ADAMO

Jes . . . Ŝajnas tiel . . . Ĉiloke faŭne
por ni aperis tento por pekumi,
la pomon de l' Eterna Viv' gustumi.
La Faŭno . . . Jes, por ni li estis fata.
Pro li nin trafis puno senkompata.
Sed ĉi tentinto kie sin nun trovas?
Li morti, same kiel ni, ne povas.

FAŬNO (*ekstersceneje*)

Ve! Ve! Dolore, vane!
Kial vi min vokas
el tombo nun pagane?
Morton vi primokas!

(*Unu el la rokoj fendigās kaj el ĝi paŝas la FAŬNO.
Proksimiĝante al la paro*)

Dezertas monto, valo;
morno ĉie sidas.
Arĝente lun-opalo
ne plu loge ridas.
Formortis kanto gaja,

elfoj, gnomoj mankas,
ne plu printempo maja
diojn flore dankas.
Sen bosko, sen cipreso
nur la Esto mutas;
la polvon de l' forgeso
muĝa vento ŝutas.
Ve, Nimfo mia mortis,
ĝojo kun ŝi same;
la Belon ŝi forportis.
Vivi estus vanel!

ADAMO

Ĉu Nimfo mortis, ankaŭ vi? Vi diris.
Ĉu sole ni provoke vin retiris
el tomba mut' por hante nun reveni?
Senmorta estas vi. Kiel kompreni?

FAŬNO

Nin ne la Dio, nur la homoj kreis.
Kun la homaro ankaŭ ni pereis.
Al Vivo ligis nin nur mito, moro;
fordormis ni kun paso de l' memoro.
Ekster la Estolim' nin Tempo estris:
ne estas ni, ĉar ni neniam estis.
Pro memorvoko mia kriptu krevis;
pri mi vi pensis, mi aperi devis.

ADAMO

Mi vin envias. Post momentokuro
vi povos kuŝi plu sub kriptu muro,
sed ve al mi, al homo dikreita,
mi migros plu pro pek' ne-pardonita.

FAŬNO

De vi dependas tio:
ŝanĝon ĵeti, porti.
Al vi jam donis Dio
ŝancojn «esti, morti».
Post peko Li prezentis
al vi tuj vin savi.
Vi ŝancojn ne atentis
Vivon, Morton havi.
Pardonon jam demonstre
font', soifo peris,
kiam el akvo monstre
Morto mem aperis.
Revenis nun okazo;
sidas vi samloke,
de kie vivekstazo
al ESTO tentis loge.

(Retroirante al la fendiginta roko)

Jen tie font' de l' Morto;
du glutetoj en ĝi
por savi vin el sorto,
Vivon mem revenĝi.
Du gluttoj nur. Jen ŝanco!
Esto morto palos,
folioj du de l' branĉo
ankaŭ kun vi falos.

(Starante en la rokofendaĵo)

Mi ne pli povas diri;
dormi vokas denso.
Do lasu min foriri;
ne plu voku penso.

(Li malaperas en la fendaĵon, la roko rekuniĝas)

ADAMO

Ĉu aŭdis vi, la lasta ŝanco venis? !
Post du glutetoj por ni ESTO svenis.
Post du glutetoj ni resaltos nove
al voj' de l' VIVO, TEMPO agopove.
Ni ree luktos, kreos kun kuraĝo,
limigos nian volon nur la aĝo.
Ĉu grave, ke ni devos tombon fali,
se vivon, tempon havos ni batali?
Ĉu grave pri ĉiama jun' rezigni,
se povos ni sen ĝeno home digni,
ne plu pupece migri, gapi, esti,
nur per ĉeesto pri la viv' atesti?

EVA

Se glut' el mortofonto ĉion finas,
rezigni pri la Esto mi ne timas.
Sur tempovoj' mi timas tion perdi,
kio neniam ĉesis freŝe verdi
dum mil miljaroj, dum la migro kuna:
printempan amon de l' juneco suna.
Tineo de la Tempo, la kutimo,
se tiun amon murdus antaŭ fino
ja pli dolorus ol la ESTO nura;
por BEL' komenca estus FIN' terura.

ADAMO

Mi tiel amas kiel vi: s e n t e m p e.
La Dio nian amon hardis trempe
en eliksir' de l' Vivo por konservi
du purajn korojn indaj por kompato.
Ĉi amo estas: vivo, sorto, fato
surtere, trans la tombo, en la spaco,
kie ni vivos plu en dia graco.

EVA

Vi pravas. Kial do surtere spiti
en teda Esto? Kial plu heziti?
Ni lasu for la vanan, vantant tuton
kaj iru ĉerpi la restintan gluton!

(Ili leviĝas, lantapaŝe iras al la fonto)

ADAMO

Se tio estas la ordon' destina,
la glut' de akvo estu lasta, final

(Ili klinas sin super la fonton)

EVA *(ĉerpante per la mano)*

En fora temp' pro mi nin trafis puno;
per sama mano prenas mi de nuno
la savon por forlasi pekan teron,
leviĝi jam libere en eteron.

*(Dum tiuj versoj ili atingas la arbostumpon kaj
eksidas)*

Du gluttoj nur . . . Adamo, ni dividas.

ADAMO

Havi la morton, ah, mi ne hezitas,
se ĝin proponas via mano eta.

EVA

Adiaŭ do, mi estas mortopreta.

*(ADAMO prenas al sia buŝo ŝian manon kaj trinkas
unua, poste EVA kun rapida gesto trinkas la restaĵon)*

(Paŭzo. La scenejo ĉiam pli malheliĝas)

EVA

Adam' amata, kisu min lastfoje!

ADAMO

Mi sentas, Eva, estas mi survoje . . .
Vi firme tenu vin al mi, amata!

EVA

Ah, ne disigu nin . . .

ADAMO

. . . la Di' kompata . . .

(La tuta scenejo malheliĝas, la fono fariĝas peĉe nigra. En tiu nigra fono, kiel stranga pentraĵo en la kadro de la scenejo, videbliĝas tre akre konturite nur la blankaĵ vizagaĵoj, manoj de ADAMO kaj tiuj de EVA, ĉar la korpojn mem ja tegas la granda nigra tuko, kies koloro kunfluas al tiu de la fono. Akre restas videbla la branĉeto kun la du folioj. Post momenta silento ventmuĝo trakuras la scenejon kaj malantaŭ la ŝtoniĝinta arbostumpo aperas giganta skeleto)

MORTO

Mi estas blinda,
senokula,
skelet' senvinda,
senskrupula.
Do min ne ravas
Bono, Belo;
por mi ne gravas
Vivo, Celo.

(Ekdancante)

Hej! Hoj! Hopsa!
Samas ŝanc'

kun mi por la
lasta danc'!
Osta brak' al frosta sin'
ĉion, ĉiun, lin kaj ŝin
prenas
tenas
premas
ĉenas.
Ankaŭ vin
ĉe l' fin'.

*(Per larĝaj gestoj, longaj paŝoj kvazaŭ pleniganta
la tutan spacon sur la scenejo)*

En imperio
de l' NENIO
nek ambicio,
nek envio;
jam ĉesas esti
Am', Malamo,
Vant' kaj Vano
en NIRVANO.
Hi! Hi! Hi!
Ha! Ha! Ha!

(Kun plirapidigintaj dancmovoj)

Por foren ŝvebi
al neni',
por ne plu strebi
al neni',
por fini svene
kaj sen pen'

nuliĝi plene
sen reven',
al bal' fatala,
farso pala,
sed senbalanca
ŝanco danca
mi vokas vin
ĉe l' fin'.

(Sovaĝe, verve)

Hej, hoj, hopsa,
samas ŝanc'
kun mi por la
lasta danc'!
Osta brak' al frosta sin'
ĉion, ĉiun, lin kaj ŝin
prenas
tenas
premas
ĉenas.
Ankaŭ vin
ĉe l' fin'.

(Saltante de loko al loko)

Mi estas reĝo
ĉiusfera,
eĉ ekster leĝo
plenlibera.
En mond' dancanta
mi dancemas,

pri Fat' finanta
suverenas.

Turnodance
ringe svinge
senbalance
vivestinge
sendistinge
neniun mi neglektas
sed ĉiun mi elektas.

*(Per siaj ostaj manoj montrante al diversaj
lokoj en la senluman rigardejon)*

Kiu neniam rajtis vivi,
kiu tro lacas jam plu vivi,
kiu nur stulte por si ŝparis,
kiu por multaj ĉion faris,
kiu karesis, kiu vipis,
kiu la vivon nur disipis,
kiu psalmante preĝis pie,
kiu diboĉis, sakris fie,
kiu konservis ĉastan virgon,
kiu putine mokis virton,
kiu la veron serĉis vane,
kiu rikanis nur profane,
kiu tiranis, kiu sklavis,
kiu mensoge trompis, ravis,
kiu el koto dion knedis,
kiu nur neis, kiu kredis,
ĉiu, ĉiu, ope, are
foje dancos kun mi pare.

Neniun mi neglektos,
sed ĉiun mi elektos.

Hi! Hi! Hi!

Ha! Ha! Ha!

Se rid' senlipa jam provokas,
se voĉ' sentona loge vokas,
se man' senkarna vin arogas

vanas spiti

fuĝe gliti

tempon spliti

timheziti

min eviti.

Hi! Hi! Hi!

Post la invit'

al — infinit'

ĉiu, ĉiu, ope, are,

foje dancos kun mi pare!

(Ree verve, sovaĝe)

Hej, hoj, hopsa,

samas ŝanc'

kun mi por la

lasta danc'.

Osta brak' al frosta sin'

ĉion, ĉiun, lin kaj ŝin

prenas

tenas

premas

ĉenas.

Ankaŭ vin

ĉe l' fin'.

(Post la lasta verso, la MORTO subite malaperas, la du folioj desiriĝas kaj ^{ĉiun} en muĝo de longmomenta vento ili forŝvebas. Post paŭzeto, kiel la voĉo de la STRIGO iam, same tiu de ADAMO eksonas ekstersceneje. Dum la citaĵo el la UNUA BILDO de la UNUA AKTO malaperas la figuroj, la dekoraĵo kaj ĉion kaŝas la plena mallumo)

VOĈO DE ADAMO

«Transtere, tra l' eter', en Universo
ĉien emanis Vivo per disperso;
komenco, fino ĉiam nur alternas,
ne estas Morto, sole Viv' eternas».

(Post eksilento de la VOĈO DE ADAMO komencas heliĝi la scenejo kaj eksonas ĉiam pli diverstrile la matena koncerto de la arbaraj birdoj, mateniĝas kaj en la lumo de la leviĝanta suno reaperas la pejzaĝo de la unua akto, kaj tiel finiĝas la UNUA BILDO de la TRIA AKTO kaj sen kurtenfalo transiras al la



DUA BILDO

ADAMO kaj EVA en la kutima pozo sidas sub la pomarbo
kaj dormas

EVA (*ankoraŭ en duondormo iom post iom prenas de si
la tukon*)

Ni ŝvebas... Ve, la tuko cedas jam!
Aĥ, tenu!... Forte tenu min, Adam'!
Mi falas... Ve, malfortis via teno...

(*Subite vekiginte ŝi malfermas la okulojn, ĉirkaŭri-
gardas*)

Terure!... Kiel?... Kiel?! Ĉu mateno?
Do nur inkubo, spirhaltiga premo
katenis min...

(*Rimarkinte ADAMON*)

Li dormas plu nescie,
ke mi kun li jarmilojn migris ĉie...
Tre stranga song'! Vekiĝi estas bone,
denove vivi, vivi, vivi... krome
konscii, ke la Temp' ne haltas por ni;
ni ree povas agi, lukti, formi
kaj celon trovi, propran sorton forĝi.
Esper' revenis... Estis longe for ĝi.

(Konsciigante pri la situacio subite ŝi liberigas sin el la tuko kaj ekstaras)

Tagiĝas jam. Avinjo tuj vekigōs,
min netrovante ŝi skandale kriĉos,
la Avo grumblos... Certe senpardone,
ke nokton mi pasigis eksterdome,
ne sola eĉ... ne sola... tamen dolĉe,
se nin katenas ĉasta amo sorĉe
per arda prem' de brakoj protektantaj
dum batas ritme koroj du kantantaj.

(Delikate, iom panje ŝi alĝustigas la tukon sur ADAMO)

Dormetu plu! Mi iras por aranĝi,
ke havu vi survoje ion manĝi.
Finfine edzinet' mi estas. Ĉu ne?
Mi tuj revenos... vi dormetu dume.

(Tuŝinte la frunton de ADAMO per karesa gesto ŝi kuras sur la verandon, haltas ĉe la pordo, subaŭskultas)

Silento... Ĉu por vekigi tro frue?
Ŝteliru mi en ĉambron kaj senbrue...

(Ŝi malfermas la pordon kaj piedpinte iras en la domon)

ADAMO *(duondorme)*

Aĥ, cedas tuk'... Mi vin ne sentas ĉe mi!
Ve, vanas mia volo vin alĉeni...
Hej, Eva... Eva! Kie vi?

(Vekiĝinte)

Ĉu for?

Nu, jes, mi dormis ĝis matena hor'.
Ĉu ŝi? Verŝajne nokte ŝi foriris . . .
La nokto . . . Ĉi nokto strangan songon spiris
al senkonscia menso dum la dormo:
de farsa gajo ĝis drameca morno
la preterkura Viv*variis bilde,
junecon SENTEMPECO gardis ŝilde,
ĉar mil miljaraj migroj senton hardis,
senĉese koroj du en amo ardis;
krom sorĉ' printempa ĉenis nin ĝia fino
ĉi vintra varma tuko de l' Avino.

(Ekridante)

Jes, tuko de l' Avin'. Ĉu ne ridinde
kiel kiras' ĝi nin protektas vinde,
malhelpis agi kaj libere movi,
permesis sole nur brakumi povi? !
Ĉi tuko estis jam simbola beno,
konsento eĉ — por nia ĵuroteno.

(Ĉirkaŭrigardante)

Tagiĝas jam, sed ĉu eble nun foriri,
kiam je ŝi ne ĉesas mi sopiri?
Ĉu mi rezignu pri la ŝanco tenta,
eĉ se revido daŭrus nur momenta?
Ne, nel Ĝis la instruo pasos horoj,
kiam severe sekaj profesoroj
komencos nin torturi, pridemandi,
parkere citi, senerare skandi.
Reciti, skandi! Ah, tre teda devo,
kiam mem poezi' vivanta, Evo,
ne fremdajn, proprajn ritmon, rimojn diktas,
pri la metriko nur la kor' verdiktas.

(Elpoŝiginte libreton li parkerige legas)

*Ándra moj énnepē Mūsa polütropon hos mála polla
Plánhthē epej Trojēs hieron ptoliethron éperse.¹*

(Penante rememori)

*Ándra moj . . . ándra moj . . . Ĉu estas peko,
ke nun min tedas ĉi antikva greko?*

Ándra moj énnepē Mūsa . . . eĥ . . . Mūsa . . .

Ĉi ŝima tekst' ne ŝajnas tre amuza.

Aĥ, ODISEO kaj Unua Kanto,

verkitaj estis ne por la amanto!

Al moŝta maljunul' ĝi decas, plaĉas,

kiu pasintan gloron nur remaĉas,

ĉar li hero' neniam povis esti,

ĉi glor' antikva servas por digesti.

Ándra moj énnepē Mūsa polütropon . . .

polütropon hos . . . hos . . . hos mála polla

Se perceptem' rigidas tro malmola,

ĝin parkerigi kiu povus? Mi ne!

*(Enpoŝiginte la libron ekstaras, streĉas la brakojn
kaj fine etendas sian manon por preni pomon de la
pomarbo)*

*EVA (en tiu momento venas el la domo tenante sitelon
en la mano; rimarkante, ke ADAMO volas deŝiri
pomon, ŝi terurite ekkrias)*

Adam', ne tuŝu ĝin!

¹ * Ἄνδρά μοι ἔγνεπε, Μοῦσα, πολύτροπον, ὅς μάλα πολλὰ
πλάγγθη, ἐπεὶ Τροίης ἱερὸν πτολίεθρον ἔπερσε (*Odiss. I, 1-2*).

[Rakontu al mi, ho Muzo, pri la ruzospertega vagulo, kiu tre multe vojaĝis, post kiam li ruinigis la sanktan urbon Trojo].—NOTO DE LA ELDONISTO.

ADAMO (*turnante sin al ŝi*)

Aĥ, Eva, fine!

Sed en rigardo via timo tremas.

Ĉu pro geavoj?

EVA

Ilin dormo ĉenas.

Al ili ellitiĝi estus frue.

Mi lerte agis, movis min senbrue.

Jes. Ĉion nun pretigi mi dezirus,

ĉar — nur se ankaŭ volus vi — mi irus
kun vi al urbo por aĉeti ion.

ADAMO (*ĝoje*)

Ĉu vere?

EVA

Mi ja havas komision.

De tagoj sur la tablo kuŝas listo

de varoj aĉetendaj ĉe l' spicisto.

Jen tiel venis la okaz' por iro.

ADAMO (*ŝercotone*)

Bonege! Vin priservos — Kazimiro.

EVA (*petole*)

Ne moku! Li vin foje jam ŝakmatis;

jes, antaŭ via nazo miĝ li svatis.

ADAMO (*frapite*)

Kiel? ... Ĉu tiu ...

EVA

... brava kavaliro

jam foje venkis vin en amturniro.

ADAMO (*mire al si*)

En songo ... jes ... en song'?. Ĉu eblas tio?

EVA

Pri kio vi murmuras?

ADAMO (*ĝenite*)

Pri nenio.

EVA

Nu, bone! ... Sed mi devas nun rapidi
por antaŭ ol foriri jam pretigi,
kion bezonos la geavoj dume ...
Jes, jes, mi devas lerti nun mastrume

(*Ŝi ekiras al la fonto*)

ADAMO (*terurite*)

Aĥ, haltu! Eĉ ne pli da paŝoj plu!

EVA (*iom mire*)

Sed kial?

ADAMO (*kiel pli frue*)

Ne! Ne! Eĉ ne paŝon plu!
Memoru! M o r t o s u k o tie fontas.

EVA (*faliginte la sitelon ekkrias*)

Adam'! Adam', pri songofin' reondas
en mi memor'... Viciĝas bildoj drastaj...

ADAMO

Kunmigris ni jarmilojn ...

EVA

... restis lastaj,
vagantaj senespere inter krutoj...

ADAMO

... kaj fine savis nin...

EVA

... du ŝlimaj gutoj
... el tiu font'...

ADAMO

... el fonto mortregita.

EVA (*enpenseme*)

Sed kial do?

ADAMO

Pro pek', pro pom' prenita
de l' Vivoarbo.

EVA

Jes... jes, ĝin mi prenis.
Mi rememoras... Vi reteni penis...
Adam', ĉu samon songi estas eble?
Ĉu homojn tiel povas ligi febre
la tagaj revoj en la nokta dormo,
ke ili sentu, pensu en la sama formo?
Eĉ tiu song' nin fakte unuigis.

ADAMO

Jes! Korpojn tuko, mensojn penso ligis.
Simbolo stranga pri estonto nia;
plektiĝis sorto via kun la mia.

Sed ĉu l' unuan fojon? Kiu scias?
Nediveneble VIVO ja varias
kaj kio nun fantome preterpasis,
ĉu foje en la kosma mond' okazis?
Ĉu subkonscio febra ĝin ripetis?

EVA (*medite*)

Ni e s t i s nur, ne vivis, nur vegetis,
ateste haltis, migris foje-foje,
konsolis sole amo nin survoje . . .

ADAMO

Uter' de l' Tempo estontecon kovas;
naskota ĝi nur e s t a s kaj senpovas,
sed post naskiĝo tuj ĝi havas forton
esti e s t a n t e c' kaj ŝpini sorton.
Ni eble ŝvebis en la TEMPUTERO;
la sonĝ' pri l' ESTO eble iĝos vero
kaj tiam ni ne gapos stulte pupe,
sed naŝkitaj jam — agos multokupe.

EVA

Nur tiuj lastaj bildoj morne tentas;
per pesimismo, dubo min turmentas,
sugestas timon kaj inerton aĉe,
ke vivi vanas, lukti — tre domaĝe.

ADAMO

Plej nigras nokto antaŭ la tagiĝo;
vin ne timigu plu la strigo-kriĉo
el la inkub' restinta rememore!
Juneco povas venki ĉion glorie.

EVA

Forgesas vi, kiam sunriĉo pasas,
al nigra ombro ĝi la lokon lasas;
espero, fido svenas dum l' aŭtuno.

ADAMO

Plej nigras ombro dum plej brilas lumo
kaj tamen fantomad' nur tiun ĝenas,
kiu al lumofonto dorson tenas,
ĉar tiam tre timige kaj surprize
sur voj' varias ombro-monstro skize,
sed kiu kontraŭ lumo rekte iras,
ne vidas ombrojn, sen ŝancel' aspiras,
ĉar banas sin en brilo ĉiu movo.

EVA (*kun malgaja rideto*)

La ombro tamen sekvas ...

ADAMO (*optimisme*)

... sed sen povo!

EVA (*rigardante jen al la fonto, jen al sia sitelo*)

Pro stulta song' ni mortu pro soifo?

ADAMO (*laŭte ekridas*)

Ni bapte nomu ĝin la — «Font' de l' Vivo»!

(*La sitelon li prenas el ŝia mano kaj ekiras al la fonto*)

Malsaĝe estus pro la song' bizara
rezigni pri la akvo kristalklara.

(*Li ĉerpas; poste la plenigitan sitelon portas sur la verandon*)

Eĉ, mastrineto kara, vin konvinki
al mi permesu glason da ĝi trinki.

EVA

Ne, ne! Ĉe mi jarmilojn vi jam gastas
sen manĝo, trinko, ve, terure fastas!
Jam tempo estas fine manĝi ion.

ADAMO (*ridetante*)

Princip' virinal «Nutru la bestion!»

EVA

Al Eva decas nutri ja Adamon;
vi tuj ricevos lakton, buterpanon.

ADAMO

Eĉ buterpanon?! Ĉu?

EVA

Jam pretigite.
Survoje por konsumi apetite.

(*Transpreninte la sitelon*)

Momenton daŭros veston iom ŝanĝi,
kaj manĝon por geavoj finaranĝi.
Mi tuj revenos sen minuterperdo.

(*Kun la sitelo ŝi iras en la domon*)

ADAMO

Jen specimen' pri mastrineta lertol!

(*Li revenas al la benko, tre zorge faldas la postlasitan tukon, penseme rigardas la pomarbon, poste ride-
tante leviĝas*)

Priridas mi ja ĉiun superstiĉon,
nun tamen por provoki la feliĉon
al viv' komuna, kiun ni ja celas,
de nia Vivoarb' mi pomon ŝtelas.

(Deŝirante unu pomon)

Kiel en sonĝo ĝi la amon gardu,
en ni ĝistombe harmonion vartu!

(La pomon enpoŝiĝas kaj ree eksidas sur la benkon)

EVA *(reaperas en laŭmoda surtuto, kun ĉapeleto; en la
mano ŝi havas grandan mansakon)*

Jen mi! Se volas vi, ni povas iri.

ADAMO *(ravite de ŝia ĉarmo)*

Ho, lasu min momente vin admiril
Kiel edzinjo unutaga, vanta,
ĉarmanta ĉiun, mode eleganta,
vi ŝajnas fieradi nun pri tio:
nin unu por alia kreis Dio.

EVA *(post ioma paŭzo)*

Eraras la impresoj... Mi konfesas,
en mia kapo duba penso pezas.
Ho, ne pri mia amo, nek pri via,
sed... Ĉu ne gvidos vin al voj' devia
la ama blind' elekti min erare?
Adamo kara, estus ja fatale!

ADAMO *(ŝercatone)*

Se mil jarmilojn povis ni kunesti,
jardekoj bagatelos por kunresti.

EVA

Ne ŝercu nun! Ne decas sprito, rido,
se pri kunvivo temas la decido.

ADAMO

Tre prave, tamen . . . vin mi ne komprenas,
subita dubo kial vin katenas?

EVA

Moment' pasanta iĝos bildo nura,
pli poste eĉ nebule senkontura;
kio por vi nun ŝajnas multsignifi,
tion impresoj freŝaj povos ĉifi.

ADAMO

Absurde! Nun matene kial dubo
afliktas vin kiel dum nokt' — inkubo?

EVA

Mi timas nun, ke post vekiga horo,
simile al flamruĝo de l' aŭroro,
paliĝos am'. Min montros taga helo
knabino simpla, eĉ sen plaĉa belo,
nur virinet' por epizod' hazarda,
kiun atentis vaga tuŝ' rigarda.

ADAMO

Terure! Ne! Ĉesu min ĉagreni,
la sanktan puron en la koton treni!
Akuzi tiel min motivoj mankas;
en tiu dub' diablo tente hantas.

EVA

Erare. Sentoj vivas korprofunde,

sed ilin por detrui jam inunde
tre sobraj argumentoj en mi svarmas,
nun ili viglas, pri danĝer' alarmas.

ADAMO

Sed, Eva, mi . . .

EVA

Adam', ne interrompu!
Por dubo argumentoj jen aplombu:
ĉu eble ami min? Mi estas fora
de la medio por vi tre favora,
por vir', kies aspiroj flugas alte
kaj kiu devas marŝi nur senhalte
sur propra voj' kun inspirita hasto.
Ĉu mi sur voj' ne estus nur — balasto?
Mi estas kampa flor', ne lukse pimpa.
Adam', pripensu; estas mi tre simpla.

ADAMO (*emociite*)

Animo nura, vi, de koro plena,
pri sentoj, pensoj, celoj komprenema,
ĉu eble vin ne ami, ne dorloti,
povantan panje cedi kaj komploti
por gvidi viran vanton tiel takte,
ke sin li kredis triumfanta fakte?!
Ĉu eble vin ne ami, ne adori,
per pomp' solena de la kor' dekori?
De sklav' ĉu saĝo estus liberiĝo,
kiam ĉe vi li vivas en feliĉo
kaj sentas en la tiranina rego
vartantan amon de l' edzinja flego?
Ne! Ne! De nun sur sama voj' ni migros

dum suno ridos, nokto morne nigros.
En harmoni' nin tenos emocio;
vi estas, restos ĉiam — mia Ĉio.
Vi mem sur mia vojo lumos torĉe,
al fora celo instiganta dolĉe,
admonos vi al fortostreĉo brava,
heroa eĉ en vivturnir' senglava.
Vi spronos pigran menson penson naski,
persisti, peni, venki, ne fiaski;
el via amo fontos fort' por lukti,
por viv' komuna plani kaj produkti.
Ah, laŭron por mi, via kavaliro,
edzinja mano donu post turniro.

EVA (*ĝislarne tuŝita*)

Adam', en vortoj estas mi malriĉa
por diri kiel estas mi feliĉa,
sed, kvankam mi ne povas elokventi,
vi devas, jes, vi tamen devas senti,
ke por la kordonaco, la plej bela,
ĝis tomb' mi restos danka kaj fidela.

(*Ŝi etendas sian manon al li*)

ADAMO (*kisas la etenditan manon, poste senvorte, per sia atendo kvazaŭ provokas la kisperponon de EVA*)

EVA (*cedas siajn lipojn al longa kiso*)

ADAMO (*irprete*)

Adam' kaj Eva, ek al tera marŝo!

EVA

Sampaŝe, kiel en la songofarso,

geedze brakon al la brak' plektante ...

(*enbrakumas sian brakon*)

ADAMO (*ekirante kun ŝi al la montdekliva vojo*)

... kun firma fido ni ekiru kante!

(*Kantante*)

Nin en fidel'
al fora cel'
komuna voĵo gvidu!

EVA (*daŭrigante*)

Per juna fort'
por bona sort'
ni en konsento spitu!

ADAMO (*atingante la unuan kurbon de la vojo*)

Maneton vian ŝovu en la manon,
ke dum batalo mi ne sentu vanon!

EVA (*feliĉe obeas, post du paŝoj haltas*)

Ve, nia tukol!

ADAMO

Ĝi surbenke kuŝos
faldita zorge. Ĝin neniuj tuŝos.

EVA

Ho, ne priridu min pro superstiĉo,
mi petas, ne rifuzu por feliĉo
kun mi surporti ĝin, sed nur komence.
Pro tio tera vivo providence
similos eble al la vivo reva.

ADAMO (*rekuras al la pomarbo por preni la tukon*)
Okazu laŭ deziro via, Eva!

(*Kure li revenas, metas la tukon sur ŝiajn ŝultrojn
ĉirkaŭprenante ŝin*)

EVA

Vi ne primokas, ĉu? Orkora homo.

ADAMO (*elpoŝigante la pomon*)

De Vivoarbo jen — ŝtelita pomo.

(*Ili ambaŭ ekridas*)

EVA

Do ankaŭ vi simile superstiĉas.

ADAMO

Poetoj, geamantoj ĉiam riĉas
en stultaj ĥimeretoj sendanĝeraj
sin gardi kontraŭ plagoj fantomsferaj.
Mi, modernulo, devus vere honti,
ĉar por la akcidentojn ne renkonti
mi havas ĉe mi stultan talismanon:
en ĉiu vesto portas mi — kaŝtanon.

EVA (*kun erupcia rido*)

Tre interese! . . . Same ĉe Aveto
en ĉiu vest' troviĝas kaŝtaneto.

(*Ŝerce*)

Mi antaŭvidas mian sorton. Ho, ve!
Kiel Avinjon Avo despotpove,
vi traktos same min. Kia domaĝo!

ADAMO (*same*)

Ve, mia sortó: s e n c i n a m a kaĉo.
(*Ridetante ili atingas la duan kurbon de la vojo*)
Memoru! Tie ĉi mi kaptis vin.

EVA

Ĉar tie ĉi mi lasis kapti min.

ADAMO

Ĉu eble vi kaptita volis esti?

EVA

Nu, jes, por ĉiam, kara, kun vi resti.
Se vi bedaŭras . . .

(*Ŝerco*)

Iru, vagabondo!

ADAMO

Kun vi volonte ĝis la fin' de l' mondo.
Ĉu vi pripensis, feinet' arbara?

EVA

Sklavin' mi restos de tiran' barbara.

ADAMO

Ci, dolĉa tiranin', mi volus peti,
el sorĉa pov' de l' tuko iom cedi
por via sklavo tiel sendefenda.

EVA

Do venu, kara, al protekto tenda!
Min premu al la kor', perbrake ĉenu,
sur ni la tukon strikte forte tenu.

ADAMO

Kaj poste ek — kun juna fid' aktivi,
ne nur ĉeesti, sed batali . . .

EVA

...vivi!

*(La leviĝanta suno kvazaŭ supernature orumas per sia
blindige blanka brilo la geamantojn, starantaj sur
la vojo ĉe la lasta kurbo)*

ADAMO

For pesimisman dum ni junaj estas!

EVA

La suno levas sin . . . Nin pompe vestas.

ADAMO

La pomp' radia ŝirmos nin kirase
la vivmuelajn dubojn ne tralase.

EVA

Ho, sunteksita pomp' ne ĉesu lumi,
ke homan devon povu ni plenumi
kreante harmonion per la AMO
por ĉiuj postaj Evoj kaj Adamoj!

(Ili strikte vindas sin per la tuko)

ADAMO

Avinja tuk', protektu nin en ardo;
ni vivu kiel sonĝe sub pomarbo!

*(Ili ekiras al la arbaro tiel, kiel en la sonĝbildoj, sam-
ritme paŝetantaj. La scenejon regas la sunlumo kaj*

*gaja trilkoncerto de la arbaraj birdoj. La geaman-
toj malaperas inter la arboj. Momenta paŭzo kaj
la kurteno falas)*

*(Tiel finiĝas la LASTA BILDO de tiu lirika komedio,
kiun mi surpaperigis por rifuĝi el la anim- kaj nerumu-
ela angoro dum la morna historia tempo en vintro de
1956-1957)*

Warszawa-Budapest

DEVIGA POSTPAROLO

Kara Leganto!

Tre bedaŭrinde en tiu ĉi libro troviĝas nekutime pli da preseraroj, pli da korektendaĵoj, ol en la antaŭaj STAFETO-libroj. La faktaj malfacilaĵoj plede motivas: 1) la poŝto de mia lando ne akceptas poŝtaĵojn ekspedotajn al la lando de la verkisto; 2) sekve de tio sendo kaj resendo de presprovaĵoj kaj senerarigoj bezonis ofte longajn semajnojn; 3) la sendaĵoj tro malfrue atingis la presejon por utiligi ilin; 4) okazis, plurfoje, ke la sendaĵo ne atingis la adresiton.

Konsiderante tiujn kaŭzojn, la Leganto devas kompreni, kaj espereble pardoni, kial la eldonisto trudas al li laboron per la prezento de la suba listo.

En kunsento kun la verkisto, mi enlistigis nur tiujn erarojn, kiuj troviĝas en la versoj, kaj neglektis preskaŭ ĉiujn preserarojn en la prozaj partoj. Kvankam en unu verso ekzistas nur unu litereraro, tamen, por pli facile trovi ĝin, mi rekompostigis la tutan verson kun kursivigo de la ĝusta leciono.

Petante pardonon de la Leganto, mi prezentas la suban liston de korektendaĵoj.

J. RÉGULO

LISTO DE KOREKTENDAĴOJ


ds = de supre

dms = de malsupre

Paĝo	ds -a verso	dms	Bonvolu la numerigitajn versojn korekti laŭ la sekvantaj:
41	4		aperis nova senc' de mia vivo; ✓
44		7	Jen ĉesiĝis bruo bala. ✓
46	10		Penso tiras min tien: ✓
48		4	kaj jen real' sin montras tro amara: ✓
56	7		Ĉu paró pli feliĉa vivis jam, ✓
		2	Kiam vin mi vidos? ✓
59		3	eĉ se butonoj donos la respondon. ✓
62	4		Eĉ kiell... Ne pro tim', sed pro surprizo. ✓
63		8	bolanta fajre en la kor' amanta. ✓
64	11		fenestrokadron) ✓

65		1	eĉ baptoakvon viŝus ĝi pagane. ✓
66	2		ĝin trafis katarakto pro l' krepusko; ✓
67	3	8	la koron donis <i>mi al vi</i> surmonte ✓
68		7	Jen ankaŭ nun kruele vi koketas, ✓
		6	kie nin dia leĝo faros paro. ✓
71		1	Vi svatis min. Ni estas gefianĉoj. ✓
78		8	<i>Avinjo</i> , se vekigōs, <i>tuj</i> skandalos. ✓
		6	kun foliora fal' ni falos kune ✓
		5	se vintra frost' penetrīs en animon. ✓
79	11		Fordormos ni, jes . . . sed ĉu krizalidoj ✓
		17	por formo vivas <i>li, lin</i> formo finas, ✓
89	6		la vundojn vindi, lacon forekzili, ✓
97	4		<i>Pro ŝercofendp</i> punon ci meritas. ✓
98	5		li jam kadukas, dum mi restos juna. ✓
99		5	Aĥ, ne olimpa dio <i>estas nia</i> ; ✓
100	10		Kaj mil fiaskojn <i>tial</i> li neglektas, ✓
106	10		Mi cerbumas nun pri tio, ✓
108	14		li drivas fide kaj <i>sinpele</i> ✓
116	7		Alterne Kredo, Scio nur varias: ✓
		1	dum TEMPO haltas nombri la dekduon. ✓
129	8		la arbotrunko kian skribon gardas. ✓
131		5	Por <i>svati min nun</i> decajn vortojn trovu! ✓
134	11		kaj traktas la piedojn, aĥ, diablo, ✓
			EVA (metu antaŭ la suban verson!) ✓
			Nun ili mutas . . . Venis nia vico. ✓
142		7	Li rapidlanga povas lerte vendi, ✓
143	9		<i>kio</i> la gingivon ravas: ✓
145		5	per svato por akiri min edzino?! ✓
146	7		Ne ekscitiĝu pro kanajla homo! ✓
148	2		pri kiu revas ŝi kun amsopiro ✓
156		7	orgojle blufi, <i>pozi</i> kaj feliĉi ✓
161	8		En cerbo <i>nestas</i> ĉelar' speciala, ✓
		9	hipertrofie <i>granda</i> por percepti ✓
164		9	Jen « <i>teletempograf'</i> ». Ĝi peras bildojn, ✓
165	6		Jes! Home vivi estis pens' ribela, ✓
168	11		montiĝis monstre grandaj pro la trompoj, ✓
169	8		Jen bildo, atestanta pri forflugo ✓
182		7	vualon, el florpomp' <i>teksitan sternas</i> ✓
193	2		ŝarĝon ŝeti, porti. ✓
196	11		(Ne en la verso-linio: <i>blanka vizaĝo . . .</i>) ✓
201	2		(» » » <i>dum muĝo . . .</i>) ✓


DEKORACIOJ






Finpresita: 10 jul. 1958


Eldonombro: 1100 ekz.




UNUA AKTO, unua kaj dua, TRIA AKTO, dua bildoj



DUA AKTO, dua bildo



DUA AKTO, unua bildo



TRIA AKTO, unua bildo